


Espero Katolika



Numero 9-12/2003

Jubilea Numero 2003



JARKOLEKTO **100** - N. 986-989 - Septembro/Decembro 2003
Finpresita la 14.11.03 — Finito di stampare il 14.11.03

Sur la kovrilo: 03.09.1997: fronte al la Papo staras tri IKUE-prezidantoj. Taŭga foto por bildigi la oktobrajn jubileojn, al kiuj ni dediĉas ĉi tiun numeron de EK.

ENHAVO

25 JAROJ, 100 JAROJ 147

25a DATREVENO

DE LA PAPADO DE JOHANO PAŬLO LA 2a

1978 - 16an de oktobro - 2003 148

Johano Paŭlo la 2a kaj Esperanto 150

100a DATREVENO DE ESPERO KATOLIKA:

Cent jaroj da Espero Katolika

Cent jaroj de katolika Espero 152

LA PREZIDANTOJ DE IKUE (1910-2003) 186

57A IKUE-KONGRESO 2004

Bazaj informoj 198

Aliĝilo 199

IKUE-BALOTOJ 2003

La rezultoj 201

La nova Estraro por la periodo 2003-2007 202

Mesaĝo de la nova prezidanto de IKUE 203

Estraranoj de IKUE - Biografioj 205

DANKON! 211

Radio Vatikana, 197 - Radio Romo, 202 - Landaj Re prezentantoj, 212

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italia

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29

pĉk 23290000 Roma

Elektronika poŝto: <esperokatolika@ikue.org> aŭ <ikue@ikue.org>

UEA-konto "ikue-v"

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org>

Dissendolisto: <ikue@yahoogroups.com>

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italia
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03

E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910. Ĝi estis agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Honora Prezidanto:** Sac. Duilio Magnani - **Prezidanto:** Milošlav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Sac. Lajos Kóbor - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Rilatoj kun la Eklezio:** Serio Boschin - **Enlanda agado:** Bogusław Sobol - **Kongresoj:** Laurynas Skupas.

25 JAROJ, 100 JAROJ

Karegaj Gefratoj,

du gravaj jubileoj markas ĉi tiun numeron de EK. Ni malfermas ĉi tiujn revu-paĝojn memorigante la 25-jariĝon de la papado de Johano Paŭlo la 2a, kaj ni traktas speciale pri tio, kion lia papado signifis por la katolika E-movado.

La alia jubileo estas la 100-jariĝo de EK. Pro mistera aranĝo de la Providenco - kiu foje estas vere mistera, almenaŭ rilate al mi - iu Carlo Sarandrea, esperantisto ekde 1978 (do, de kvarono da jarcento - nenio kompare kun aliaj gravaj kaj karaj samideanoj) troviĝas kun la tasko redakti la jubilean numeron de Espero Katolika, kiu markas ĝian centjariĝon.

Sen flati min, sen pligravigi mian personon (la vorto "mizera" ne estas fremda adjektivo por karakterizi min, ankaŭ morale), mi pensas, ke se mi estas la redaktoro de ĉi tiu eta revuo en la momento kiam ĝi solenas sian gravan jubileon, tio ŝuldiĝas nur kaj simple al la fakto, ke mi amas ĝin; ke mi amas tion, kion ĝi signifis kaj signifas.

Mi amas Espero Katolika'n per amo, kiun tutcerte havas ankaŭ multaj aliaj. Tamen, pro la fakto ke mi povis de pli proksime studi ĝian "vivon", ke mi povis legi dokumentojn, jarkolektojn, enpenetri la vivon de multaj pioniroj (ĉar, eble Vi scias, mi loĝas en la C.O. de IKUE) tiu mia amo fariĝis pli granda, pli dankema, pli preĝanta.

Jen kial mi deziras, ke por festi la centjariĝon de ĉi tiu revuo, oni ne parolu pri "grava atingo", pri "rekordo", sed ke oni ĉefe esprimu dankon al la Providenco, kiu helpis ĝin; ke oni reliefigu la sinoferon de multaj karaj gefratoj. Por ke oni ekkonu, kaj lernu ami, tiun sinoferon de la multaj, kiu ebligis ĉi tiun transdonon de torĉo, cent jarojn poste. Temas pri mil kaj mil konataj kaj nekonataj nomoj. Mil kaj mil konataj kaj nekonataj eventoj parolas al ni el la pasinteco. Ili parolas al ni ne tiom pri Esperanto, sed pri la maniero igi tiun ĉi lingvon "Diregna".

Esperanto ricevis plian rapidon kiam ĝi eniris la domon de katolika pastro, la litova Dombrovski, kiu vidis en ĝi valoran rimedon por la disvastigo de la mesaĝo de Kristo. Aŭ kiam laiko (en epoko kiam la rolo de laikoj ne estis ankoraŭ plene valorigata) proponis al katolika pastro la starigon de esperantista katolika societo. Aŭ kiam iu franca episkopo komprenis, 60 jarojn antaŭ la dua vatikana Koncilio, la utilon de lingvo, kiu ne estis la latina, por unuigi la ĉiunaciajn katolikojn. Aŭ kiam oni parolis pri dialogo kaj renkontigo de la diverskonfesiaj kristanoj, en tempo dum kiu ekumenismo estis vorto ankoraŭ por "inventi". Aŭ kiam liturgiaĵo reehis sub la kupolo de katolika preĝejo en Esperanto. Aŭ kiam... aŭ kiam... aŭ kiam...

Kiel eblas ne ami ĉi tiun lingvon? Sed ĉefe kiel eblas ne ami la paŝtistan, religian agadon kiu efektiviĝas per ĝi? Dankon, Sinjoro, por ĉiuj atestantoj, kiujn Vi sendis al ni.

Al ĉiuj ĉi atestoj de amo ni deziras dediĉi la nunan, jubilean numeron de Espero Katolika. Ni festu la ondon de amo, de fideleco, de sinofero, kiu trafluis dum unu jarcento. Amo granda, kiu ekradiis dekomence, kiam nia fondinto Peltier transdonis EK al sia posteulo.

Ni ĝoju kaj festu, ĉar estas nenio pli granda por festi ol la Amo.

25a datreveno de la papado de Johano Paŭlo la 2a 1978 - 16an de oktobro - 2003

“Nuntio vobis gaudium magnum. Habemus Papam”. Mi anoncas al vi grandan ĝojon. Ni havas Papon!

Estis la horo 18a 45 de la 16a de oktobro 1978. Kardinalo Pericle Felici, inter la miro de multaj, anoncis la elekton al papado de la pola kardinalo Karol Wojtyła, ĉefepiskopo de Krakovo. La nekonata Papo, kiel difinis sin mem Johano Paŭlo la 2a, tuj konkeris ĉies korojn, kiam je la horo 19a 15, aperante je la centra loĝio de la baziliko de sankta Petro, salutis la fidelulojn ariĝintajn en placo sankta Petro. “Mi ne scias ĉu mi povos bone klarigi min en via lingvo, en nia itala lingvo. Se mi eraras, se mi eraras, *‘vi koriktos min’*”.



Ses tagojn poste, la 22an de oktobro, je la komenco de sia petra servado, li eldiras la paroladon de la programo de la papado, kiu daŭre hodiaŭ estas la esencaĵo de lia mesaĝo: komuniki la esperon de la Evangelio, Kristo elaĉetanto de la homo, centro de la universo kaj de la historio. “Ne timu! Malfermu, eĉ malfermegu la pordojn al Kristo!”.

Li naskiĝis en la eta urbo Wadowice la 18an de majo 1920; li mem rakontos la naskiĝon de sia vokiĝo, kiam li laboris en minejoj por rompi ŝtonegojn kaj poste kiel laboristo en fabriko: “Ĝi estis vokiĝo de plenkreskulo, ĝi maturiĝis meze de la suferoj de mia nacio, ĝi maturiĝis per la fizika laboro, inter la laboristoj”.

Ekde 1978 la statistikoj pri ĉi tiu papado estas impresodonaj: 102 eksteritaliaj vojaĝoj, pli ol unu miliono kaj cent mil trairatataj kilometroj laŭlonge de la mondo, 1095 ĝeneralaj aŭdiencoj kun 17 milionoj da partoprenantoj, 14 enciklikoj, proklamo de 1319 beatuloj kaj de 476 sanktuloj. La Papo estas profunde misiista kaj petas al ĉiuj kristanoj esti en konstanta misiado: “Misiista Eklezio signifas Eklezion amatan de Kristo, vivanta Eklezio, Eklezio patrino, Eklezio amika de la homo, Eklezio juna, Eklezio kuraĝa, Eklezio martiro, Eklezio lumo de la mondo, Eklezio salo de la tero, Eklezio kunuleco de amo”.

La Papo kiu anoncas Kriston al ĉiuj, dialogas kun ĉiuj. Li estas la unua Papo kiu ĉeestas dum granda renkontiĝo de islamanoj. En Kazablanko en Maroko, en 1985, li nomas ilin: “Fratoj en Abrahamo”. Kaj li estas la unua Papo, kiu eniras en sinagogon. Jaro 1986: li difinas la hebreejn: “niaj pli aĝaj fratoj”. Tiun saman

jaron li arigas en Asizo la grandajn religiojn de la tuta mondo por preĝi por la paco. La paco, unuigita kun la justeco kaj kun la kuraĝo pardoni kaj peti pardonon, estas unu el liaj plej profundaj sopiroj: “Sufiĉe kun malamo! Sufiĉe kun sango! Sufiĉe kun milito! Kiu respondecas pri tiaj agoj kaj kiu planas ilin, tiu devos respondi fronte al Dio kaj al la homoj!”.

Johano Paŭlo la 2a petas kuraĝe pardonon pro la kulpoj de la filoj de la Eklezio, sed li proponas siavice pardonon, aparte post la atenco plenumita kontraŭ li fare de Ali Agça en 1981: “Mi preĝas por la frato kiu frapis min, al kiu mi sincere pardonis”.

Ok jarojn poste falas la berlina murego. Komunismo fiaskis, diras Johano Paŭlo la 2a, sed ne venkis kapitalismo. Granda parto de la homaro daŭre vivas sub la jugo de mizero. Kaj la Papo de la falego de la muroj inter Oriento kaj Okcidento, volas alproksimigi ankaŭ la Nordon kaj la Sudon de la mondo, turnante la rigardon al la homaj rajtoj. Necesas pli da libereco, necesas pli da justeco, pli da solidareco. Li lanĉas alvokojn por la tuta forstreko de la eksterlanda ŝuldaro kaj por la ĉesigo de la ekonomiaj embargoj kiuj malsatigas la popolojn. La Papo diras malkomfortajn vortojn, ankaŭ koncerne la respekton de la vivo: “Ne al abortigo, ne al eŭtanazio, al genetikaj klonado kaj manipulado de la embrioj, ne al mortopuno”. “La homa vivo estas sankta, nur Dio estas ĝia Sinjoro. Ĉiu breĉo malfermita en la plena respekto de la vivo konsistigas minon metitan en la fundamento de la homa kunvivado, de la sana demokratio kaj de la vera paco”.

Kaj li tre defendas la familion: “Ni ĉiuj, la Eklezio, devas esti tre prudentaj kaj tre kuraĝaj por defendi la veran familion. Havi grandan komprenemon rilate al ĉiuj homaj malfortajoj, ĉar estas klara Kristo... ĉiam. Sed koncerne la familion kiel komenca konstruo de la socio ni devas esti kuraĝaj, firmegaj, mi dirus”.

Hodiaŭ, li substrekas, la vero estas en krizo, regas relativismo. Sed la vero ekzistas, ĝi estas unu: Kristo, vera homo kaj vera Dio. Li estas la vero kiu liberigas: ĉi tiun mesaĝon la Papo liveras aparte al la junularo, invitante travivi la kredon tutece. “Karaj junuloj, sekvu Kriston, kiu venis ne por esti servata sed por servi kaj por doni sian vivon elaĉete de multaj”.

Alia konstanta zorgo de Johano Paŭlo la 2a estas la unueco de la kristanoj kaj li instigas ĉiujn trovi novajn vojojn al kunuleco, ankaŭ rekonsiderante la manieron plenumi la primasecon de la Papo.

Senlaca Papo kiu ne timas elmontri sin en suferado. Lia forto venas el la preĝado, ĉefe el la Rozario, kaj el la Eŭkaristio. La plej gravajn decidojn li alprenas ĉiam fronte al la Tabernaklo. La Papo konfidas sin senkondiĉe, pere de Maria, al la mizerikorda koro de Kristo. “Mi renovigas fronte al Kristo la oferon de mia preteco servi la Eklezion tiom longe kiom Li volos, komplete forlasante min al lia sankta Volo. Mi lasas al Li la decidon pri kiel kaj kiam Li volos forpreni min el ĉi tiu servado”.

JOHANO PAŬLO LA 2a KAJ ESPERANTO

Aldone al nia "fideleco je Petro", por ni katolikaj esperantistoj ekzistas plia motivo de amemo kaj dankemo rilate al la Sankta Patro. Li elmontris - daŭrigante la longan serion da patrecaj subtenoj de liaj antaŭuloj - multe da proksimeco kaj kuraĝigo al la idealoj de la katolika E-movado, kaj tio jam antaŭ la papeco.

Ĉiuj scias, ke Esperanto estas apreciata en Pollando, en kies katolika medio ĝi estas uzata de jardekoj. En tiaj cirkonstancoj ne estas mirige, ke la tiama Metropolito de Krakovo, kardinalo Wojtyła, sekvis kun simpatio la katolikan E-movadon. Tio kulminis en 1977, per la akcepto de la Alta Protektado de la 37a IKUE-kongreso, al kiu li sendis jenan mesaĝon (legeblan en la libro de tiu Kongreso): *"Patro Sankta, gardu en via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu unu tiel same, kiel ni. (Joh. 17,11). Kiel Jesuo Kristo preĝis por siaj disĉiploj pri la unueco, tiel same mi en la nomo de la Eklezio preĝas viaintence. Unu kredo kaj unu amo helpu al vi unuigi la disbatitan mondon en unu ŝafaron sub unu Paŝtisto. Unu supernacia lingvo - Esperanto - ankaŭ servu efike al ĉi tiu nobla celo. En mia propra nomo kaj en la nomo de multaj favoraj al vi polaj episkopoj, mi benas vian*


8



ESPERO KATOLIKA

agadon kaj deziras al vi la Dian gracon".

Okaze de la Kongreso, la tiama kardinalo Wojtyła estus devinta ne nur ĉeesti, sed eĉ celebri la Sanktan Meson kaj prediki en Esperanto. Papo Paŭlo la 6a, **per telegramo** kiun li sendigis de mons-ro Innocenti, rajtigis kardinalon Wojtyła celebri tiun Meson en Esperanto. Ĉio estis jam preta, kiam neatendita cirkonstanco devigis la kardinalon rezigni pri la aranĝo. Sed ni legu la vortojn, kiujn li mem tre delikate skribis (en pola lingvo) al la organiza komitato: *"Bonvolu akcepti mian senkulpigon pro la foresto la 18an de aŭgusto sur la Hela Monto. Neatendite por ni ĉiuj okazis en tiu tago la enterigo de la sankte memorigata pastro arkiepiskopo Antonio Baraniak, la metropolito de Poznań. Kvantkam la funkcioj konfiditaj al mi fare de la organizantoj de la Kongreso estas ege honoraj kaj gravaj kaj mi tre volus ilin*



plenumi, nepre necesa estas mia partopreno en la funebraj ceremonioj, ligitaj kun la sepulto de la metropolito de Poznań, tre proksima al ni ĉiuj kaj meritplena por la Eklezio en nia patrujo. Tial mi petas la Prezidiumon kaj ankaŭ ĉiujn estimindajn Kongresanojn kompreni la motivon de mia foresto kaj pardonigi ĝin. La ĉefcelebranton de la Sankta Meso elektu la kongresa Prezidiumo laŭ sia bontrovo. Spirite kunligita kun la preĝo kaj la laboroj de la Kongreso, mi esprimas la esperon, ke sub la sankta patroneco de la Helmona Sinjorino, ĝi donos benatajn fruktojn”.

Alian esprimon de simpatio kardinalo Wojtyła faris malmultajn monatojn antaŭ la elekto al papado, kiam li bondeziris al EK okaze de la 75-jara datreveno de nia revuo (v. EK 8/1978, p. 132).

Tre afablajn vortojn li ankaŭ skribis, pli antaŭe, por danki por la sendo al li de kelkaj fotoj faritaj de la tiama landa reprezentanto de IKUE por Germanio, d-ro Josef Kondor.

En EK 12/1978, la tiama redaktoro d-ro De Salvo skribis: *“ni varme esperas, ke Papo Wojtyła, havos por ni, katolikaj esperantistoj, la saman simpation, kiun li montris al ni kiel kardinalo, kaj eventuale eĉ iom pli multe”.* Neniu dubo, ke la espero siatempe esprimita de De Salvo konkretiĝis. Dum la papado de Johano Paŭlo la 2a la katolika E-movado travivis multajn gravajn momentojn de sia historio: agnosko de IKUE kiel asocio laŭ papa juro, aprobo de la Meslibro kaj Legafaro, enigo de Esperanto inter la lingvoj uzataj de la Papo Kristnaske kaj Paske.

Kun Johano Paŭlo la 2a Esperanto fariĝis ne nur lingvo “aprobata”, sed ankaŭ “parolata” de la katolika Eklezio.

La unua fojo, kiam Papo parolis en Esperanto dum publika ceremonio okazis en Ĉenstohovo, kadre de la monda junulara tago: la 14an de aŭgusto 1991, vespere, okazas lia bonveniga saluto. *“Mi donas*

ankaŭ en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo, en ĉi tiu tago de universala frateco, kiu vidas nin unuigitaj kiel filoj de unu sama Patro en la nomo de Kristo, vero de la homo!”

La postan tagon, ferme de la celebroy, la Papo denove adresas siajn plurlingvajn salutojn al la gejunuloj en Ĉenstohovo. En Esperanto li diras: *“Karegaj junuloj! La sperto de kredo, travivita ĉe la piedoj de la “Nigra Madono”, restu neforigebla gravurita en viaj koroj. Sanktega Maria akompanu Vin”.* Nepras memori, ke pro la amaso da junaj ĉeestantoj, la programo de la ceremonioj prokrastiĝis, tiel ke la Papo devis tranĉi kelkajn el la plurlingvaj salutojn, sed li ne saltis la esperantlingvaj salutojn.

Ekde Pasko 1994 la Papo aldonas Esperanton al la plurlingvaj bondeziroj “Urbi et orbi” (al Romo kaj al la mondo). Ekde tiam je Pasko li diras: *“Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta”;* je Kristnasko: *“Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron”.*

En 1997 la IKUE-kongreso okazas dum la komencaj 3 tagoj en Romo, kaj la kongresanoj partoprenas en la ĝenerala aŭdienco en placo Sankta Petro de la 3a de septembro. Al ili la Papo adresis sin en esperanto per la vortoj: *“Mi ĝojas bonvenigi la respon-sulojn de Internacia Katolika Unuigo Esperantista engaĝitajn en sia kvindeka Kongreso. Karegaj, la temo de via renkonto reprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de universaleco, kiu estas ĉe la bazo de la lingvo kiun vi kulturis”.*

Alia papa saluto al IKUE-kongresanoj ripetiĝis en la jaro 2000, sed en la itala lingvo (ĝenerala aŭdienco de la 06.09.2000).

Ĉiuj ĉi personaj elmontraj de simpatio kaj atento estas verŝajne la plej karmemoraj eventoj por ni, el ĉiuj subtenoj, kiujn la Eklezio dum la historio donis al katolika E-movado kaj al Esperanto

Cent jaroj da Espero Katolika cent jaroj de katolika espero

Propono de Societo

Ian tagon de aŭgusto 1902, senfama esperantisto, sinjoro Henri Auroux el Bretonio (Francio), skribis leteron al alia senfama franca esperantisto, **pastro Émile Peltier**, kiu nur de kelka tempo estis lernanta Esperanton. En tiu letero, s-ro Auroux proponis la fondon de speciala societo por la disvastigo de Esperanto inter la katolikoj.

Laŭ pastro Dombrovski (EK nov. 1913) ĉi tio estis ebla ĉar “dank’ al konstanta multiĝado de esperantistoj katolikaj, precipe en Francujo, oni komencis pli kaj pli sentadi la bezonon de aparta katolika esperantista societo kaj revuo. Oni atendadis nur iniciatoron. Kaj tiu ĉi iniciatoro baldaŭ aperis. Li estis energia kaj talentplena abato Emilo Peltier”.

Peltier, malgraŭ sia ankoraŭ nematura esperantisteco, ne hezitis akcepti la proponon de Auroux. Tiam komenciĝis intensa korespondado por bone difini la regularon, aranĝi ĝian disvastigadon kaj varbi aliajn esperantistojn. Al la alvoko



respondis ne pli ol okdeko da personoj, kaj en decembro 1902 estis fondita la Societo “Espero Katolika”, kiu ricevis aprobon de la tiutempa Ĉefepiskopo de Tours, René

1903-04

OKTOBRO

N. 1.

Espero Katolika

REVUO MONATA

«Unum ovile et unus pastor». — (Johan. X. 16). — «Unu ŝafaro kaj unu paŝtato».

DIREKTORO

P-o EM. PELTIER, à Cheillé
par Azay-le-Rideau (Indre-et-Loire)
FRANCE

REDAKTORO

S-o HENRI AUROUX, à Porsal
par Pladamez (Finistère)
FRANCE

François Renou (130a episkopo de Tours, de 1896 ĝis 1913) rekta superulo de pastro Peltier: “*Kara Sinjoro, Vi petis mian juĝon pri entrepreno, kiu celas unuigi la ĉiunaciajn katolikojn per la internacia helpa lingvo nomata Esperanto. Mi tre volonte aprobas tiun projekton, kiu al mi ŝajnas favori la disvastigadon de l’ Evangelio kaj la pliuuigon de l’ popoloj. René François, Ĉefepiskopo de Tours la 6-an de decembro 1902*”.

Por la aliĝantoj al ĉi tiu katolika esperantista praorganizo aperis 4-paĝa organo, entenata en la franca gazeto “*L’Aube*” (La tagiĝo) ekde januaro 1903.

La klopodoj por plivastigi la membraron daŭris ĝis somero de 1903, tamen sen rimarkinda sukceso: la malmulta nombro da aliĝantoj, sed ĉefe la fakto, ke “neniu volis iĝi membro de la administrantaro” ne ebligis, ke la societo ricevu juran aprobon laŭ la franca leĝaro”: tiusenca klopodo ne sukcesis ĉar kiam oni sendis al subprefekto la regularon “li ne volis akcepti ĝin, ĉar leĝe la societo ankoraŭ ne estis formita”.

En aŭgusto Peltier vizitis Auroux; post pripensoj kaj interparoladoj, ili decidis formeti, dum kelke da tempo la ideon de societo, kaj intertempe fondi revuon, “kiu celu ne la propagandon de Esperanto, sed ĝian *utiligon*: revuon, kiu estu ne lingva, sed *literatura revuo*, kaj internacia ligilo inter la katolikoj”.

Aperas la unua numero

Oni decidis, ke Auroux estos la redaktoro kaj Peltier funkcios kiel direktoro, kun la speciala tasko zorgi pri la propagando. La unua numero de “*Espero Katolika*” (redaktoro Auroux, direktoro Peltier) estis presita en oktobro 1903, post longa malfruo kaŭzita de la malfacilaĵo spertita de la presisto (A. Barbot en Tours) ricevi de la fandisto la karaktrojn kun la ĉapelitaj literoj: efektive tiam ekzistis nur 12 E-gazetoj.

Laŭ la poŝta stampo, de unu el la senditaj ekzempleroj kiuj konserviĝis, la enpoŝtigo okazis la **14an de novembro 1903**: simbole tiun daton oni povas alpreni kiel naskiĝdaton de *Espero Katolika*.

Kortuŝaj estas la du “avizetoj” publikigitaj en la kolofono de tiu unua numero. Peltier kaj Auroux petis preĝojn: “Ĉiuj abonintoj de E.K. bone faros, dirante ĉiutage “*Patro Nia*” kaj “*Mi salutas vin Mario*” por akiri de Dio la favorojn sube ĉi petatajn. Ili formos tiele asociacion (*tiel!*, *ndlr*) por preĝoj, kiu kondukos nian revuon al ĝia celo”. Kaj kiuj estis la petataj favoroj? “*Patro nia*, sendu al ni vian lumon, favoru nin per bona farto, por ke, per tiu revuo, ni kreskigu vian gloron kaj la bonon de l’ homaro”.





La unua numero malfermiĝis per la fama poeziaĵo de **pastro Aleksandro Dombrovski** (26.08.1860 - 19.02.1938) “Al lia plej sankta Moŝto Papo Pio X”.

La enkondukaj vortoj de Auroux (Vekiĝu esperantistoj!) prezentas klaran ribelon kontraŭ la deviga neutraleco, kiun la E-movado komence sekvis. En ĝi legeblas: “*Neŭtrala estas ankaŭ tiu, kiu, dirante ĉion, kion li pensas, permesas al ceteraj diri ĉion, kion ili volas: tiele ĉi neŭtralos Espero Katolika*”.

La unua numero de la revuo entenis kelkajn sanĝetojn pri la lingvo, por kiuj pledis precipe Auroux. Peltier mem rakontas en *Espero Katolika*: “Mi tamen estis ankoraŭ juna, seneksperimenta Esperantisto. Mi, bedaŭrinde, allasis kelkajn sanĝetojn pri la lingvo, kaj nia unua numero, je nia eniro en la mondon, ne tre plaĉis al la gazetaro Esperantista”. Tre baldaŭ, estiĝis malkonsentoj inter Peltier kaj Auroux. “Ĉi-lastaj - rakontos Peltier - pli kaj pli ema al “plibonigoj”, komprenis, ke li kompromitis la revuon, kaj li proponis al mi forlasi sian oficon. Mi akceptis lian ekŝigon, kaj en la kvina numero (februaro) de l’ jaro 1904, *Espero Katolika* aliĝis al la letero, kiun D-ro Zamenhof estis adresinta al la Direktoro de la Belga Sonorilo”. Temis pri letero per kiu Zamenhof fiksas kelkajn gravajn principojn, inter kiuj estis la netuŝebleco de la lingvo. Peltier surpronis la tutan laboron por EK, kiu fine de la unua jaro da aperoj atingis nur ĉirkaŭ 300 abonantojn.

La figuro de Peltier

Kiu estis Peltier?

Li naskiĝis en Villandry apud Tours (Francio) la 20an de septembro 1870 (ĝuste en la sama tago, en kiu finiĝis la surtera povo de la Papoj) je la horo 23a, filo de

AL LIA PLEJ SANKTA MOŜTO PAPO PIO Xa

Ĉesis jam viva malgajo publika
Dio ĝojigis la Kristeklezion:
Sur trono Petra la mond’ katolika
Salutas Pion

Grincu per dentoj infera serpento!
Nin ne timigas jam via envio:
Tra l’ maraj ondoj kaj forta la vento
Nin gvidos Pio!...

Oni diradu, ke Petra la Ŝtono
Jam detruigas, fariĝas nenio...
Granda mensogo! Jen sankta la trono
Kaj sur ĝi Pio!...

Tial laboru sen tim’ kristanaro
Ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio:
Unu paŝtisto kaj unu ŝafaro...
Vidu ĝin Pio!...

18 IX 03.

P. A. DOMBROWSKI

La poemo, verkita la 18.9.1903, estis dediĉita al la nova Papo, Pio la 10a, elektita la 4an de aŭgusto de la sama jaro. La poemon oni devas lokigi en la historio kaj kompreni, ĉar ĝi multe estas influata de la periodo dum kiu ĝi estis verkita, periodo dum kiu la Eklezio sentis sin ĉirkaŭata de multaj malamikoj, kiujn ĝi taksis koaliciitaj por ĝia detruo.


Auguste Peltier, forgiŝto de caroj, 31-jaraga kaj de Ernestine Anne Gachereau, merceristino, 26-jaraga. Li ricevis la nomojn Émile Claude. Li studis en la Seminario de Tours, paŝtrigis la unuan de junio 1894 (laŭ aliaj biografiistoj, la jaro estis 1893). Li estis paroĥestro en Sennevières kaj poste en Cheillé. Malbona farto (probable en 1904) devigis lin forlasi la paroĥon por fariĝi profesoro en Tours: li estis instruisto ĉe la Supera Seminario kaj ĉe la lernejo “Grégoire-le-Grand”, ankoraŭ en Tours.

Ekde junaĝo, Peltier interesiĝis pri lingvoj; la latinan lingvon li eklernis tre juna, kaj ĝin majstris jam antaŭ la sacerdotiĝo. Li konis (divers-nivele) ankaŭ la anglan, la germanan, la italan, la hispanan kaj la portugalan.

Laŭ tio, kion li mem deklaris, respondante al la *Demandaro* de la *Esperantista Centra Oficejo*, li lernis Esperanton en 1900. Laŭ kelkaj, li estis “varbita” de la informado realigata de Louis de Beaufront. Ĉiuokaze malprecizaj estas la informoj, kiujn oni havas pri li ekde esperantiĝo ĝis majo 1902.

Li celebris la S. Meson dum la unua Universala Kongreso en Bulonjo-sur-Mar (1905), sed ne povis prediki en Esperanto, pro malpermeso de la tiea Episkopo. Dum tosto en granda fest-kunveno, fronte al samcelanoj el 22 landoj, li diris: *“Karaj gefratoj, la koroj de ĉiuj ĉi tie estas plenaj je frataj sentoj. Sed ĝis nun oni parolis nur pri la frateco inter diversnacionoj. Mi esprimas la deziron, ke per Esperanto ankaŭ fratiĝu la diversreligianoj; ke ĉiuj pastroj, katolikaj aŭ protestantaj, hebreaŭ aŭ rusortodoksaj, per Esperanto unuiĝu por kune labori al la universala frateco”*.

Peltier estis homo, kun amaso da ideoj. Tra la paĝoj de EK de li redaktitaj aperas tie kaj tie la propono de projektoj, kiujn oni povas ja difini “avangardaj”:



La naskiĝdomo de Émile Peltier en Villandry. Sur la enirpordo estas memortabulo de 1959. (foto de Georges Lhuissier).

jam en la unua numero (kaj en la oka) li lanĉas la proponon de universala poŝta marko (eble oni memoras la respondkuponojn de la Universala Poŝta Unuiĝo: ili estis enkondukataj depost 1906, okaze de la UPU-kongreso en Romo); sekvas la propono de speciala stenografio por Esperanto (sed F. Schneeberger, pastoro, prezidanto de la svisa E-societo, estonta prezidanto de la unua UK, estis jam prilaborinta ion tian). Sed Peltier multe pli famas pro sia “Publika letero al ĉiuj pastroj kristanaj”, per kiu li pledis por la reunuiĝo de la kristanaj religioj, deirante el la renkonto kaj dialogo inter esperantistaj pastroj kristanaj. Estis la jaro 1906...

Apostola Beno

Tiu sama 1906 estis feliĉa jaro por EK kaj Peltier. De marto EK eliris 32-paĝa sub verda kovrilo, sur kiu brilis kruco. Kaj la revuo ricevis sian unuan Apostolan Benon.

La esperantista monsinjoro **Luigi Giambene** (26.11.1866 - Romo, 04.07.1944), akceptite en privata aŭdienco de Pio la 10a (02.06.1906), prezentis al la Papo la tutan kolekton de EK. Kun li ĉeestis aliaj romaj esperantistoj kaj la renkonto - laŭ tio, kion rakontos poste la partoprenintoj - ne estis formala, sed ĝi disvolviĝis kiel afabla interparolo.

La Papo legis laŭtvoce (kvankam mal-korekte) la poeziaĵon al li dediĉitan, dirante je ĉiu verso: “*Mi komprenas!*”. Ĉi tiu estas la “transrakontita tradicio”, ĉar laŭ tio kion Giambene mem notis en la frontpaĝo de la bindita EK-kolekto donita al la Papo (kaj rericevita donace, kaj nun konservata en la IKUE-arkivo en Romo), la okuloj de Pio la 10a “*falis sur la paĝon 65an. Li provis legi, ridetis, kaj poste diris: Mi ne povas legi, sed mi bone komprenas*”.

En la menciita bindita kolekto estas du “paĝoj 65” (ĉar ĝi enhavas plurajn jarkolektojn). La unua paĝo 65a entenas alian poemon de Pastro Dombrovski, titolitan “Dio”; la dua paĝo 65 entenas anoncon de la fondinto de EK, pastro Peltier, pri kunveno de katolikoj kadre de la unua kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.

Giambene prezentis esperante skribitan peton de Beno por Peltier kaj la redaktoroj de EK.. Ankaŭ ĝin la Papo legis laŭte, kaj poste diris: “Mi ne skribas nun; sed mi sendos al vi skribaĵon pri tio”. Kaj 25 tagojn poste, 27.6.1906, la Papo sendigis leteron kun Apostola Beno “al la redaktoroj de l’ Revuo”. Jen la

elitaligita teksto: “*El la Vatikano, la 27an de junio 1906. Via tre respektinda Monsinjora Moŝto. Mi ricevis la honoran komision sciigi al vi, ke la Sankta Patro favoranime kaj kun speciala plaĉo bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de l’ revuo Espero Katolika, kiun vi humile prezentis al Li je la nomo de l’ Pastro Emilo Peltier. Bonvolu Via tre respektinda Monsinjora Moŝto konigi al la nomita Pastro la Papan plaĉon kaj komuniki la apostolan Benon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de l’ revuo.*

Plenuminte la ricevitaĵajn ordonojn, kun la sentoj de grandega estimo mi diras min, De Via Respektinda Moŝto, Tre sindonema Servanto, Giovanni Bressan”.

La novaĵo pri la Beno alvenis al pastro Peltier la 28an de aŭgusto, ĝuste en la malferma tago de la Universala Kongreso en Ĝenevo. La Papa Beno estis oficiale anoncita ĉe la Kongreso, fare de ĝia prezidanto, la protestanta pastoro Schneeberger (“niaj katolikaj amikoj ricevis de la Papo altan aprobon, kiun mi komunikas al la Kongreso”); tondre aplaŭdis eĉ liberpensuloj. La franclingvan tradukon de la letero publikigis ĉiuj ĝenevaj ĵurnaloj.

Peltier humile skribis en EK: “mi, ne eĉ unu momenton, konsideris la Benon Apostolan kiel kuraĝigon al mi persone donita, sed kiel supernatura helpo, kiel alta aprobo de la celo de Espero Katolika: utiligi Esperanton por la disemado de la Vero Katolika kaj por la frata unuiĝo de ĉiuj homoj en “unu ŝafaro”.


Post la papa aprobo, io ekmoviĝis. Venis la permeso por prediko en Esperanto, kiu okazis 2.9.1906 en la preĝejo S. Francisko: “*Hodiaŭ estas kvazaŭ bapto de Esperanto*”, ĝoje diris Peltier.

Kulmino de la sukcesoj, la apostola beno konsistigas gravan momenton en la vivo de Peltier, valoran rekonon por tiu ĉi pastro, kiu - kiel dirite, rifuzante, pro humileco, la ateston kiel “al li persone direktitan” - fine vidas ion konkretan moviĝi ĉirkaŭ si.

En 1907 la graveco de EK estis rimarkita de la francaj gazetoj: interalie, la famkonata ĵurnalo *La Croix*, en sia numero de la 15.5.1907, rekomendis la legadon de EK.

INTERTEMPE...

La 10an de januaro 1907 okazis granda akademia kunveno en Romo, okaze de la 50a datreveno de la unua meso de kardinalo Gotti, prefekto de “Propaganda Fide”. Oni deklamis prozaĵojn kaj versaĵojn verkitajn en 32 diversaj lingvoj; inter ili estis ankaŭ poeziaĵo esperanta, kies deklamado oni grandege aplaŭdis. Ĉeestis inter la gravega aŭdantaro multaj fremdlandaj diplomatoj. (el “*La Revuo*”, n-ro 7, 1907)




Do, novaj subtenoj alproksimiĝas, dum la sanstato de Peltier pli kaj pli malboniĝas. Kvankam la laboro por “Espero Katolika” estas peza kaj temporaba, Peltier daŭrigas sian vojon, eĉ plibeligante la revuon laŭ enhavo kaj paĝokvanto: Peltier fondis ĉe si esperantistan presejon - presejo S. Martino - por presi EK kaj eldoni katolikan libron.

En septembro 1907 Peltier pilgrimis al Lurdo, de kie li revenis - tiel li opiniis - “korpe pli forta kaj sana”; li eĉ promesis al la Sankta Virgulino, “kiel ateston pro mia resaniĝo”, la publikigon de kelkaj miraklaj faktoj okazintaj en Lurdo. De la 13a ĝis la 18a de junio 1908 li pilgrimis por la dua fojo, kaj en julio samjare li fiere anoncis la aperon de la promesita libreto, titolita “La lando de mirakloj”.

Tamen, la pliboniĝo de lia sanstato montriĝis nekonstanta. Ekde aŭgusto 1908 EK ne aperis, pro nova sankrizo de la direktoro; ĝi reaperis nur komence de 1909 (duobla numero januaro-februaro). En ĝi Peltier anoncis novan “Komitato direktanta”n, kun la membroj: p. Austin Richardson (1843-1913), direkcio; Claudius Colas (1884-1914), ĉefredaktoro; kaj p. Dombrovski, ĉefa kunlaboranto.

Fine de 1908, timante la malvarmecon, li foriris al Pau, kaj post tri monatoj li petis ke oni alkonduku lin ĝis Lurdo, kie li deziris ricevi resaniĝon aŭ morti apud tiu Sanktega Patrino (kiel sciigis poste Josée Guivy, en EK de marto 1909).

La morto trafas la fondinton de EK la 17.2.1909, je la 7a matene, dum li estas en la domo “Saint-Frai” por malsanaj pilgrimuloj de Lurdo. La kaŭzo de lia morto tre verŝajne estis tiu stomaka malsano kiu turmentis lin jam de du jaroj antaŭ la forpaso.



Lia tombo, en la tombejo de Lurdo, difektita de la tempopaso, en 1983/1985, dank’ al internacia kampanjo, estis rebonigita. Ĝi situas tuj malantaŭ tiu de familio Soubirous.

*La tombo de p. Peltier en Lurdo.
(foto de Rudolf Skoruppa).*

Claudius Colas

La nova redakta komitato transportas la administracion kaj redakcion de EK al Parizo, dum la presejo restas tiu en Tours (en 21, rue du Hallebardier). Colas portempe redaktas la revuon ankaŭ post la forpaso de pastro Peltier, pri kiu li skribas: "Li enmetis [EK] en niajn manojn, kiel patrino mortanta komisias en manojn amikajn sian amatan infanon... Vian ekzemplon sekvante, ni daŭrigos ĝis plena triumfo, la noblan laboron, kiun por Dio kaj por la Homaro vi kuraĝe entreprenis".

Dum la redaktperiodo de Colas, alvenas subten-letero de d-ro Zamenhof: "Varsovio, 8-II-09. Kara Sinjoro, kun ĝojo mi ricevis vian sciigon pri la reviviĝo de la Espero Katolika. Mi deziras al via gazeto la plej bonan prosperadon". Zamenhof sendis alian leteron, kondolence pro la morto de Peltier.

La komitato, nomumita de Peltier antaŭ ol morti, entuziasme komencis sian taskon, sed bedaŭrinde novaj malfacilaĵoj baldaŭ ekestis. Richardson, ne nur direktoro de EK, sed ankaŭ prezidanto de IKUE, en aprilo 1910 sendis abdikan leteron al pastro Camille Duvaux (1865-1962), ĝenerala sekretario de IKUE, klarigante sian motivon precipe per la fakto, ke li "loĝas tre malproksime de Parizo" (en Bruselo) kaj sekve li ne plu povas plenumi la gravajn devojn de direktoro de EK. Stariĝas nova tripersona redaktoraro: direktoro, pastro Camille Duvaux; ĉefredaktoro, prof-ro Gustave Gautherot (1880-1948); lingva konsilanto, d-ro Eugène Noël (1855-1921).



De maldekstre: Claudius Colas, p. Aleksandro Dombrovski kaj p. Austin Richardson, dum la 3a IKUE-kongreso 1912.

INTERTEMPE...

Pli proksime de Vi, Sinjor!
Vortoj de Fr. Izidoro Clé Muziko de Lowel Mason

Pli prok-si-me, pli prok-si-me de Vi, Sin-jor!
Jesu la kre-iv, jesu la pre-ig.
Be-ni-a, Lo-cit! Se mult-ig-ig-ig,
la do-lor-ig, se var-mig-ig-ig, jesu la ple-ig.
Dej prok-si-me, a-pud Vi, gard-u nin, ho Ple!

Himno: Pli proksime de Vi, Sinjor'
Vortoj de Frato Izidoro Clé - Muziko de Lowel Mason
(al la memoro de l' Viktimoj de la "Titanic")
el EK aŭgusto 1912

Colas sin dediĉas al “*L’espérantiste catholique*” de li fondita por propagando en Francio kaj li laboros en IKUE, prizorgante i.a. la kongreson en Romo 1913. En 1911 pastro Duvaux restas la sola redaktoro.

Al kiu apartenas EK?

La proprieto de “Espero Katolika”, tamen, daŭre apartenis al la patrino de Peltier - Ernestine Anne Gachereau. La problemo de la proprieto de la revuo longe turmentis la fruajn jarojn de la katolika Esperanto-movado. La demando stariĝas tuj post la fondo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (unuan de aprilo 1910): kian rilaton havu al IKUE ĉi tiu revuo, kiu entute estas privata propraĵo?

En 1911 iu “pariza Komitato” (gvidata de p. Duvaux) aĉetis EK’n: oni intencis krei societon inter la membroj de IKUE por ke la gazeto estu la propraĵo de ĉiuj, kaj ke ĝi estos direktita laŭ la volo de la partoprenontoj.

Speciala komisiono de la dua Kongreso de IKUE (Hago, 14-18.08.1911) starigis finanĉan entreprenon por la oficiala organo de IKUE, kies celo estis aĉeti EK de la tiama posedanto (pastro Duvaux). Sekve de tio pastro Duvaux forlasis la redakcian postenon, ĉe kiu anstataŭis lin la nederlanda d-ro **Johan Nikolaus Joseph Smulders** (1872 - 16.11.1939), redaktoro de Nederlanda Katoliko. Tamen EK daŭre estis presita en Tours ĝis la numero de januaro 1912, kiu estas presata en Nederlando: religia direktoro estas p. Richardson, redaktoro Smulders.



Finfine la antaŭanoncita “Anonima Akcia Societo: Internacia Eldona Societo Espero Katolika” estis definitive kaj leĝe starigita la unuan de majo 1912, kun 10 akciuloj kaj kapitalo de 12.100 nederlandaj guldenoj dividita en 200 akciojn po 60,50 guldenoj, el kiuj 40 jam venditaj kaj pagitaj je la momento de la fondo-akto ĉe notario. Ĉi tiuj ciferoj verŝajne nenion diras al ni. Por kompreni:

INTERTEMPE...

Pastro Decoene, la konata redemptoristo-misiisto en Kanado, sciigis al p. Richardson, ke Lia Eminenco Kardinalo Van Rossum, konsultoro de la Sankta Ofico en Romo (lia eminenco estas redemptoristo kaj naskiĝis en Nederlando) alte aprobas Esperanton kaj eĉ estas membro de la Belga Katolika Esperantista Ligo. Lia eminenco skribis laŭvorte al p. Decoene: “L’Espéranto du Dr. Zamenhof rendra de grands services à l’église”. (el “*Espero Katolika*”, marto 1912)

la “aĉet-povo” de 12.100 guldenoj de 1912 egalas al 104.852,79 eŭroj de 2002. La Statuto de la Akcia Societo antaŭvidas du direktorojn, el kiuj unu rolas kiel ĉefredaktoro de EK. Oni fiksas komencan salajron de 300 guldenoj jare por ĉiu el ambaŭ direktoroj, kiuj tamen devas posedi almenaŭ 3 akciojn.

La Akcia Societo efektive prizorgis la aperon de EK ĝis 1936, kun du interrompoj (de aŭgusto 1914 ĝis 1920, pro la unua mondmilito kaj en 1920-1921, pro la eldonado en Aŭstrio). Nur en 1936, post longegaj kaj tre komplikaj diskutoj (*foje eĉ disputoj*) la proprieto de EK estis formale transigita al IKUE.

La unua mondmilito, cetere, draste batis la movadon: inter la multaj pereintaj IKUE-anoj tiuperiode, menciindas Claudius Colas, apenaŭ 30-jara. Jam la antaŭan jaron (1913) estis mortinta pastro Austin Richardson, religia direktoro de EK kaj unua prezidanto de IKUE.

La “aŭstria pruntepreno”

La tuj postmilita renaskiĝo de EK estas karakterizita de la ŝanĝoj en la redakcio kaj de la travivaĵo de “Internacio Katolika”.

Post la lasta publikigita en Nederlando (julio-aŭgusto 1914) la unua postmilita numero estas tiu realigita en Vieno, kun la dato januaro-februaro 1920. La novan eldonlokon estigis interkonsiliĝo de la komisaraj de la Akcia Societo: pro manko de mono, kaj pro la “alta valoro de la nederlanda valuto”, oni decidis ne reaperigi EK. Tamen, pro la fakto, ke la ĉeso de EK estus grava malhelpo por la movado, la komisaraj decidis “mezan vojon”: Smulders petas al d-ro **Johann Schröder** (1869-13.01.1928, ĵurnalisto), ĉu ekzistas

la ebleco eldoni la revuon en Aŭstrio: post la jesa respondo, la revuo estas eldonita en Vieno, memstare, sendepende de la Akcia Societo, kiu “kvazaŭ pruntedonis EK al la novaj direktoroj en Aŭstrio, almenaŭ dum 1920”. La “provizora” aŭstria eldono estas realigita de la benediktana p. **Ludoviko Koller** (1882-19.02.1958, redaktoro), de la piarista p. **Franz de Paul Meŝtan** (01.04.1865-1941) direktoro, estonta



Ĉi-alte: *Johann Schröder.*

Ĉi-sube (maldekstre)
p. *Franz de Paul Meŝtan* kaj (dekstre)
p. *Ludoviko Koller.*



IKUE-prezidanto) kaj Johann Schröder (administracio).

La 6a IKUE-kongreso en Hago (15-16.08.1920), kiu estus devinta repreni kaj perfektigi la strukturon de IKUE, rezultigas male ĝian malaperon kaj la fondon de nova asocio: “*Internacio Katolika*”. Kaj *Espero Katolika* fariĝas ĝia oficiala organo (kiel montras la ĉi-maldekstra kovrilo de EK aŭgusto-septembro 1920).

12^a JARO No. 69. (105)



AUGUSTO-SEPTEMBRO 1920

Unan vian eton tiam pastro,
Ĉiu fido ĉi nun pastro,
(Job. 1., 16.)

ESPERO KATOLIKA


INTERNACIA MONATĜAZETO, OFICJALA ORGANO DE LA INTERNACIO
KATOLIKA.

La VI^a Internacia Kongreso de Esperantistaj
Katolikoj

en Den Haag, la 15^a kaj 16^a de Aŭgusto 1920, rezultigis

la fondon de

Internacio Katolika.



La Internacio de la preĝejo S^t. Jakobo


en la Grazenburgo, la foto de la 6a Internacia Katolika Kongreso
Esperantista.

Ne helpas kompreni la precizan titolon de EK dum tiu dujaro (1920-21) la komunikado publikigita de la “Direktoraro” en EK oktobro 1920, kiu tekstis jene: “por malebligi konfuzon ni atentigas [...] ke laŭ deziro de la estraro de la Anonima Akcia Societo *Espero Katolika*, la sola materia posedanto de [...] *Espero Katolika*, tiu ĉi revuo ankaŭ dum la venonta jaro 1921 estos eldonata en Wien (Aŭstrio) de la nuna direktoraro kun la nuna titolo”. Kaj tio laŭ propono de Smulders aprobita de akciuoj dum kunsido de la 14.08.1920. La sama komunikado aldonas, ke la revuo de *Internacio Katolika* “eble eldonata dum 1921 en Graz” neniel anstataŭos la “vianan” EK.

Evidente ĉi tiu komunikado - publikigita kun iom pli grandaj karakteroj kaj dikliteraj

emfazoj - tamen ne diris la tutan veron (*aŭ almenaŭ, la direktoraro de EK ne komprenis la verajn celojn de la gvidantoj de Internacio Katolika*), ĉar jam en la posta numero de EK (novembro-decembro 1920) aperas “klarigo”,

subskribita de p. **Max Josef Metzger** (Schopfheim, 03.02.1887 - malliberejo de Branderburg-Gorden, 17.04.1944), ĉefdirektoro de la centra administra oficejo de IKa en Graz. Esence, li anoncas, ke ne estas vere, ke aperos dua revuo, sed la oficiala organo de IKa, eldonata en Graz, estos la “pligrandigita *Espero Katolika*”. Metzger sciigas, ke okazas intertraktoj kun la Akcia Societo por realigi la planon. Intertempe, EK daŭre aperas kiel la oficiala organo de IKa. Kaj por ke ĉi tiu estu pli evidenta, la posta numero estas “aparta eldono”, ĉesas la indiko de la eldon-datreveno



(nombrata ekde 1903), kaj EK eniras “novan serion, unuan jaron”. La numero de januaro 1921 estas “numero unu”. Ankoraŭ pliaj 5 numeroj, kaj en la numero de junio 1921 aperas la oficiala komunikado de la Anonima Akcia Societo, kiu invitas al kunsido de la akciuloj en Graz (10.08.1921), kun la intenco aprobi la daŭrigon de IKUE kaj de la eldono de EK kiel ĝia oficiala organo. Estus simple diri, ke la akciuloj aprobis tion kaj ke la revuo forlasis Aŭstrion. La transigo okazis tra la interŝanĝo de ŝtormaj leteroj kaj protokoloj, kiel rakontas la rekorda numero de EK de januaro 1922: 98 paĝoj plus 4-paĝa kovrilo. Ĉiel ajn, EK fine revenas al Nederlando (kaj rekreiĝas IKUE), “samkiel antaŭ la milito” (kompreneble, la unua mondmilito, ne tiu inter IKUE- kaj IKa-anoj...). En Vieno restas - precipe sur la ŝultroj de la administranto d-ro Schröder - pagenda ŝuldo ĉe la presisto. Dum la “aŭstria epoko” EK ricevis denove Apostolan Benon (20.08.1920), ĉi-foje de Papo Benedikto la 15a.



EK denove estas redaktata de Smulders. La episkopo de Hago, **mons-ro Arnold Frans Diepen** (’s-Hertogenbosch 12.03.1860 - 18.03.1943), en kies diocezo, ’s-Hertogenbosch (Bois-le-Duc), estis eldonita EK, post peto de Smulders, ne nur sendis sian benon, sed eĉ aldonis mondonacon por apogi la movadon. Krome, la episkopo nomumis eklezian cenzuriston de EK, en la persono de paroĥestro de Tilburg, p. J. Vroomans, sed bedaŭrinde ĉi-lastata forpasis ne multe poste. Tial, alia paroĥestro de Tilburg, p. A.J.G. Verschure, estas elektita de la Episkopo.

Dum la konfuza epoko, kiu sekvis la aperon de Internacio Katolika kaj de ĝia esperantlingva organo “**Katolika Mondo**”, ne estis facile kompreni pri du unuiĝoj (IKUE kaj IKa) inter si konkurantaj. Smulders strebis klarigi la situacion, sed post esperigaj interrilatoj estigis novaj kvereloj, ĝis la problemo konkrete solviĝis pro la laciĝo aŭ morto de la interbatalantoj kaj pro la laŭgrada malesperantistiĝo de IKa, kiu preskaŭ ne plu uzos Esperanton, ĝis alpreni latinlingvan nomon: “*Foederatio Catholica Internationalis*”. En IKa aktivos kelkaj konataj IKUE-anoj (i.a. p. Carolfi kaj p. Ramboux: ĉi-lastata, antaŭ ol esti redaktoro de EK, estis redaktoro de Katolika Mondo).

KATOLIKA MONDO

Universala Organo por ĉiuj katolikaj interesoj
 Universale de la Katolika Eklezio
 La Katolika Mondo
 Ĉiuj katolikaj interesoj
 Ĉiuj katolikaj interesoj
 Ĉiuj katolikaj interesoj
 Ĉiuj katolikaj interesoj

La lasta numero redaktita de Smulders aperis en julio 1922; koncerne la kaŭzojn de la halto, oni menciis “financajn kialojn”, sed ankaŭ “aliajn gravajn problemojn”, verŝajne ligitajn kun la kuracistaj okupoj de Smulders.

Georges Ramboux

La renaskiĝo de EK ŝuldigas al pastro **Georges Ramboux** (Reims, 28.07.1887 - Parizo, 26.06.1964). Kurioze li naskiĝis du tagojn post la eliro el varsovia presejo de la unua eldonaĵo pri Esperanto. Kelkfoje li uzis por subskribi siajn artikolojn la pseŭdonimon Max Roub, anagramon de lia familia nomo. Liaj gepatroj estis Jean Baptiste François Aristide kaj Marie Victoire Olympe Chopin, dum lia kom-pleta nomo estis Paul Eugène Georges.



Dum la 9a IKUE-kongreso en Vieno la reapero de EK estas unu el la kongresproponoj. Dum la kunsido de la 09.08.1924 f-ino **Marie Larroche** (Metz, 20.03.1854 - Rodez-Aveyron, 27.05.1940) legas leteron de p. Ramboux, kiu pretas tuj elirigi EK (je propra risiko). La protokolo de tiu kunsido estas kelkloke amuza: d-ro Halbedl el Graz eĉ promesas ĉesi fumi kaj disponigi la pordestinatan monon al EK; s-ro Schendeler sciigas, ke la proponata abonkotizo, 7000 aŭstriaajn kronojn, egalvaloras la prezon por du bonaj cigaroj kaj s-ro Chiba, kiu antaŭe estis espriminta dubojn ĉu aŭstrianaj povus pagi tiun prezon, rebatas per simpla: "Mi ne fumus!". Je la fino oni flankemetas la detalojn kaj la ĉeestantoj, kontraŭ 3 voĉoj, aprobas la reaperon de EK kaj lasas, ke p. Ramboux kaj la IKUE-estraro decidu pri ĉio alia (presejo, kotizoj ktp).

Kiel aperis je la horizonto la mempropono de Ramboux por la reviviĝo de EK? Ni ne dubas, ke en tio kunludis la agado de f-ino Larroche, kiu, loĝante en Parizo, certe konis lin. De 1910 la juna pastro kunlaboris en la katolika E-movado. De 1916 datiĝas lia eta, 15-paĝa E-gramatiko. En 1924 "konscia pri la urĝa bezono por la katolikaj esperantistoj havi ortodokse katolikan kaj pure esperantistan gazeton", ĉi tiu franca pastro, profesia ĵurnalisto kontaktas d-ron Smulders. La propono pri "prenado de la redaktado", kaj la anonco, ke "F-ino Larroche, ŝatate konata de la katolikaj esperantistoj, akceptus la multpezan financon taskon, kiun

ESPERO KATOLIKA REKLAMAS (1924)

SENEPERAJ MALSANULOJ

vi retrovos esperon, resanigon kaj feliĉon
per la

ELEKTRATERAPIO

Prezo de la aparato: 55 fr. + sendkostoj

P. CARRIÈRE,

46, quartier des Tuareg, MARRAKECH (Maroko)

la Akcia Societo ne plu kapablis porti”, plifaciligas la efektivigon de la plano, aprobita, kiel dirite, en Vieno.

Ramboux tuj plenumas sian promeson pri tuja apero: la unua numero de la nova kolekto de li redaktata aperas en septembro 1924: ŝanĝiĝas la formato el cm 13,5 oble 21,5 (kiu restis la sama ekde 1903) al cm 17,5 oble 24,5. La paĝonombro estas 16, sed jam ekde la numero de julio 1925 aldoniĝas kovrilo el verda papero kaj de temp’ al tempo la numeroj aperas kun 4-paĝa verda kovrilo ebligita verŝajne dank’ al la komerca propagando, kiun ĝi gastigas. La paĝonombro restas pli malpli la sama, kun fojaj duoblaj numeroj, kiel, ekzemple, numeroj de oktobro 1925 kaj oktobro 1926 (32 paĝoj plus kovrilo) aŭ numeroj 24-paĝaj. La presejo estas firmao Monnoyer en Le Mans.

Espero Katolika

Internacia Monata Gazeto

Fondita de P^{ro} Eug. PAULISE, Tours (Francujo) en 1923

Honorita per Apostola Benon

de Papo Pio X, 27 junio 1906, kaj de Papo Benedito XV, 20 aŭgusto 1921


Voĉo Vivanta Vokas Vin

per societo el

Gramofondiskoj “Linguaphone” en Esperanto.

★ **ESPERO** ★

La plej bona
klango por
razaparatoj



Specimens kartono k. s. (10 k. s. koncizaj
koncizaj k. s. s. s.)
Kartono - 21, 1. 500 k. s. s. s. s.


Andr. Reul, Würselen
bei Aachen (Germanio)

Posta Adresaro: KOLN n. 4362

La reapero de “Espero Katolika” estas salutata ankaŭ de la Papo. Kiam oni prezentis la numeron “unu” (oni relkalkulis de la komenco la novan eldonserion) al Pio la 11a, ĉi-lastata (en novembro 1924) ne hezitis doni sian Apostolan Benon, jam la trian por EK.

Ne nur al EK p. Ramboux dediĉas siajn zorgojn. Unue kiel aldono, poste kiel konstanta rubriko, li gastigas en EK “Skolta Heroldo” ekde numero de julio 1926, kaj li poste li realigas samtitolan memstaran monatan gazeton. En 1926 p. Ramboux fondas la Societon “Sankta Miĥaelo” kies celo estis kolekti monon por ebligi la eldonadon de katolika literaturo.

En 1928 EK fariĝas 25-jaraĝa revuo: porokaze Ramboux eldonas jubilean numeron, ekstervican, en kiu li resumas tiun jarcentan kvaronon, sed antaŭ ĉio li esprimas la deziron, ke “eksonu dankegaj



laŭdoj al Dio, kiu ameme zorgis kaj protekte gardis ĝin ĝis hodiaŭ”. La 25-jariĝon feste salutos, ankaŭ en la postaj numeroj, diversaj atestoj de ekleziuloj, inter kiuj estis la ĉefepiskopo de Parizo, kardinalo Louis Dubois.

Dusemajna ofteco

Anoncita kiel “alloga projekto”, en la numero de la unua de decembro 1928, ekde januaro 1929 EK fariĝas dusemajna gazeto. Kaj de la numero de la 15a de aprilo 1929 okazas plia ŝanĝo, kiu igas des pli belaspekta la revuo: la kovrilo, antaŭe farita per tutverda papero, fariĝas dukolora, kun artaj bildoj (ni notu, ke la dua arta kovrilo estis dediĉita al Nia Sinjorino de Ĉenstoĥovo).

Kompreneble tia plia kaj plia luksigo de la grafikado implicas

kostojn. La abonkosto de EK, komence fiksita ponumere je 2 francaj frankoj (la 7000 aŭstria kronoj por aĉeti du bonajn cigarojn), fariĝas jara kotizo de 25 frankoj en 1926, poste 30 frankoj por nefrancaj landoj (1930), kiuj plialtiĝos al 35 en 1931. Ĉu etaj plialtiĝoj? Ne, ĉar dum tiu sama periodo multaj valutoj konis egan inflacion, dum la franca franko, pro la ekonomia politiko de Poincaré, estis supervalorigata. La 35 frankoj de 1931 havis aĉetpovon kiu egalvaloras al 17,35 eŭroj de 2002 (en 1931 unu kilo da pano kostis en Parizo 2,15 frankojn).

Denove monata

Tia aranĝo ne povis daŭri. En la numero de januaro 1931 la ĉefartikolo de Ramboux titoliĝas: “unu paŝo returnen, du paŝoj antaŭen!”. La paŝo returnen estas la denove monata apero de EK, 16-paĝa. La du paŝoj antaŭen estas la forigo de kelkaj rubrikoj gastataj de EK por krei per ili novan gazeton, kaj la ebleco por abonantoj de EK, povi ricevi senpage la alian revuon. Naskiĝas “Katolika Vivo” (KV), dusemajna, kvarpaĝa laŭ ĵurnala formato 30 x 45 cm, por havigi informojn pri ĉiuj katolikaj okazaĵoj kaj movadoj. EK restas propre esperantista gazeto.


Tamen baldaŭ pruviĝis, ke Ramboux estis trotaksinta siajn monrimedojn.

Pastro Ramboux, en la artikoloj de li verkitaĵ por EK, aspektas sufiĉe firma pri siaj ideoj, aparte pri la konceptado de EK. Ne malofte piednotoj al oficialaj protokoloj estas de li aldonitaj, por esprimi sian vidpunkton, foje malmolan. Iusence, la laboro de Ramboux komenciĝas tuj malbone. Li plendas pro la atakoj al li direktitaj de kelkaj, kiuj ne ŝatas lian samtempan partoprenon en “Internacio Katolika” kaj en la redaktado de “Espero Katolika”. Ĝuste pro tiu duobla rolo, Ramboux esperas esti taŭga arbitracianto; sed li estas senĉese akuzata labori por malpaco. Lia “polemika vervo” plej sensacias, kiam en la ĉefartikolo aperinta en EK de la unua de oktobro 1930 (“Ĉu Esperanto estas nur amuzilo?”) li esprimas sian opinion laŭ kiu “la katolikaj E-kongresoj alprenas karakteron de nura jarfesto”. Kaj subtene al sia opinio, li rakontas pri la 15a IKUE-kongreso en Budapeŝto, kien, laŭ li, “oni venis por amuziĝi”. Estiĝos vigla diskutado kun la Estraro de IKUE.

Alia “riproĉeto” de Ramboux estas la preskaŭ ĉiunumera invito al abonado por subteni la revuon (*kio estas nobla*); sed - kun la paso de la tempo - li komencas eĉ kalkuli la nombron da membroj de katolikaj E-kluboj kiuj ne abonas EK'n (*kio estas malpli eleganta*), difinante ilin “postiĝantoj”, en la ĉefartikolo de marto 1931, kiu finiĝas jene: “Mankas al ni prosimume 1000 abonantoj. Kaj ĝuste tiu cifero estas la sumo de la postiĝantoj. Se vi volas, ke EK kaj KV daŭre aperu, varbu ilin. Se vi pli ŝatas, ke niaj ambaŭ organoj formortu denove kaj verŝajne por ĉiam, nenion faru! La sorto de niaj organoj ne estas en la manoj de la redakcio, sed en la viaj, katolikaj esperantistoj. Ni ne aldonos alian vorton”.

La sekva numero (aprilo 1931) publikigas alian “laŭtvoĉan” ĉefartikolon de Ramboux: “Ni imagas al ni vian ĝojan mienon ricevante ĉi tiun numeron de EK, ĉar vi ĝin atendis la tutan monaton. Kaj fine, jen ĝi, en la sama luksa vesto. Certe sur la paĝoj ne estas ilustraĵoj, sed ĝi ankaŭ bone aspektas. Jen ĝi! Do, la financa krizo estas forpasita. Ho! tiu pastro Ramboux, kia troigulo!

P. Ramboux dum la 14a IKUE-kongreso en Prago 1929



Ĉu Esperanto estas nur amuzilo?

Ĉiujare okazas universala kongreso de Esperanto kaj alkaŭ fakaj internaciaj kongresoj esperantlingvaj: tiu de SAT kaj tiu de IKUE. Tiuj kunvenoj estas la ĉefaj manifestadoj de la Esperantovivo, preskaŭ eĉ la solaj, kiuj pli malpli tiras la atenton de la granda publiko. Nu, kion rimarkas tiu publiko? Ĝi rimarkas certe, ke la esperantistoj, kiaj ĉiuj, estas...

Kian terursonĝon li travivigis al ni pri la morto de nia organo! Sed jen ĝi! Kaj ŝanĝante vian pozicion, vi reendormiĝos sur la alia flanko. Bonega estas malzorgemo! Se vi tiel pensas, se vi tiel agas, karaj legantoj, vi tute eraras. Tiu [ĉi] numero de EK fine eliris pro la monapogo de kelkaj sindonemuloj, kaj tute ne ĉar la financa krizo estas solvita". Ĉi tiu estas lia lasta ĉefartikolo.

Post la aprila numero, la sekva aperas nur oktobre; la kovrilo refariĝas simpla: verda papero kun nur titoloj. Ĝi entenas la oficialan raporton pri la ĝenerala kunveno de IKUE okazinta la 16.08.1931 en Eindhoven. Dum ĝi, IKUE donacas 200 guldenojn por pagi la ŝuldojn de la "Akcio Societo Espero Katolika", kaj metas 100 guldenojn en la "Rezervan Kason" de IKUE, cele al plia eniro de IKUE en la administradon de EK.

La novembra numero estas des pli malriĉa: ne plu estas la verda papero por la kovrilo. Poste, EK denove ne plu estas eldonita dum kelkaj monatoj. La subskribo "Max Roub" (la pseŭdonimo de p. Ramboux) denove aperas dum la redakto-periodo de lia posteulo, kiu republikigos liajn artikolojn de 1914 pri Lurdo. Sekvos en la jaroj silento aŭ nur duonmencioj pri Ramboux. "Enciklopedio de Esperanto", je la artikolo "Katolika movado", sciigas: "spite de la riĉa donaco (10.000 francajn frankojn) de frato **Wigbertus (Martinus) van Zon** (Vught, Nederlando, 22.03.1869 - 29.07.1951) kolektita inter la nederlandaj katolikoj, Ramboux devis rezigni la eldonadon de siaj karaj revuo kaj gazeto". Ĉi tiun tekston



verkis frato Wigbertus mem, kiu estos rememorigata kiel granda mecenato de EK, sed ankaŭ de la tuta katolika E-movado. Por kompreni kio okazis, nin helpas la leteroj konservataj en la arkivo de IKUE kaj kiuj interŝanĝis tiuperiode Font-Giralt, Larroche, Ramboux, Schendeler kaj fr. Wigbertus. Fine de decembro 1931 ĉe la presisto (s-ro Solsona), kiu eldonis EK kaj KV, ekzistis ŝuldo de 15.131 francaj frankoj (t.e. 8.182,69 hodiaŭaj eŭroj): la presisto eĉ riskis bankroton kaj ne povis pagi salajrojn al laboristoj. Letero de Schendeler (prezidanto de la "Akcio Societo"), datita 18.01.1932, forprenas de Ramboux la eldonon de EK kaj transdonas ĝin al p. Font Giralt, kiu kandidatiĝis.

Pri Ramboux (kiu forlasis la movadon, eĉ kun la intenco - laŭ kelkaj atestantoj - bojkoti estonte ĝin) oni denove parolos okaze de la ĝenerala kunveno de IKUE en Romo (08.08.1935), kiam oni devas decidi pri la havaĵo de la Societo de Sankta Miĥaelo de li fondita. Letero de frato Wigbertus memorigas "kelkajn sendaĵojn" (oni legu: mondonacojn) de li faritajn kaj kiuj ne aperas en la bilanco. F-ino Larroche respondas: "eble p. Ramboux ilin ricevis kaj malaperigis en sia senfunda poŝo". Epitafio pri lia malkapablo administri kaj malŝparemo.



Font Giralt

Kiam Ramboux eksiĝas el la redaktado de EK, la tiama Prezidanto de IKUE, pastro Juan Font Giralt (Gerona 04.08.1899 - vojo iranta de Banyoles al Olot tra Santa Pau, 17.08.1936) fariĝas nova redaktoro, administranto, kaj proprakosta eldonanto de la revuo. Li skribas: “Vi rememoras la neregulan aperadon de EK dum la pasinta jaro kaj vi konas la fakton, ke la iama glora Espero Katolika, la plej malnova el la esperantaj gazetoj, fariĝis kvazaŭ la Cindrulino de la Esperanto-gazetaro. Kaj tion ni ne povis plu suferi... Ni tute ne volas akuzi aŭ ataki iun... sed estas absolute necese preni novan direkton kaj alporti novan vivon en Espero Katolika-n... La nuna eldonado de Espero Katolika estas nur persona entrepreno de Pastro Font Giralt, sen ia rilato kun ĉefestraro de IKUE” (*sed kun la Akcia Societo, jes, kiel ni vidis*).

INTERTEMPE...

Letero el Hispanujo - Oni ne sufiĉe atentis la Cirkuleron de la Direktoro Ĝenerala de Unugrada Instruado, datumita la 12an de januaro (1932) [...] motivigitan pro la publikigo de la nuna Konstitucio. Ĝi tekstas: “La lernejoj, laŭ la ordono de la artikolo 48 de la Konstitucio, devas esti laikaj; tial ili ne montros ian signon, kiu implikas kredemecon [...]”. Per tiuj ĉi vortoj, tiel simple oni forpelis la Krucifikson el la lernejoj. La Krucifikso estas jam forpelita el la lernejoj!!! Ie, kie la instruistoj estis vere katolikaj, kortuŝe. Alie kun malsanktigoj. En multaj vilaĝoj kun ĝenerala protesto de la enloĝantaro, kio donis okazon al kontraŭkatolikaj Provincestroj por malliberigoj kaj monpunoj. En multaj lokoj estis la infanoj mem, kiuj plej energie postulis la reponon de la krucifikso en ĝia antaŭa loko. (*el “Espero Katolika”, marto-aprilo 1932*)

P. Font Giralt redaktos la revuon, pli-malpli regule, de januaro 1932 ĝis oktobro 1934, kiam oni ne plu havas sciigojn pri li. Post multaj provoj starigi kontaktojn, sensukcese pro nerespondo fare de la pastro, nederlandanoj (ĉefe la ĝenerala sekretario de IKUE, Schendler) ekprenas la taskon redakti la revuon. Estiĝas redaktorado, konsistanta el **Paulus Antonius Schendeler** (’s-Hertogenbosch, 26.02.1878 - Eindhoven, 26.01.1953), “prezidanto-komisaro de la “Akcia Societo”, kun Smulders kaj s-ro Elias.

Nur poste oni eksciis pri la kaŭzo de la silento de pastro Font Giralt: grava malsano. Lia vivo, cetere, ne konis pacon: li mortis en 1936, viktimo de la interna milito en Hispanio.



Propraĵo de IKUE

En decembro 1936, ankaŭ pro malkonsento kun la IKUE-Estraro, Schendeler adiaŭas kiel redaktoro de EK. La revuo ĵus fariĝis, finfine, propraĵo de IKUE; la revo

longtempe alcelita realiĝis. Dum kunsido de la "Akcia Societo" de la 15.12.1936 la direktoroj (Smulders kaj Smarius) subskribis la kontrakton per kiuj ili deklaris transdoni al IKUE la posedrajton de EK, kontraŭ la pago de 600 nederlandaj guldenoj, de kiu monsumo estos pagataj ĉiujare minimume 60 guldenoj, ekde la 01.02.1937. Ĉu tio vere okazis, ni ne scias. Senkomente EK de novembro de la sama jaro, publikigas leteron de la sekretario Berka al d-ro Smulders, reprezentanto kaj kontrolinto de la Akcia Societo, per kiu oni informas, ke la



ĝenerala kunveno de IKUE aldonis al la regularo de la Unuiĝo la difinon, ke EK estas ĝia oficiala organo. "Per tiu ĉi ago senvalidiĝas la akto [...] kun la dato 15.12.1936". Kio okazis? Ĉu oni "aneksis" la revuon, ĉar oni ne volis pagi, sojle de la datlimo por la unua pago, la antaŭe interkonsentitan monsumon? Dum ne estos aliro al aliaj informfontoj, ni restu sen respondo al ĉi tiu demando

Aleš Berka

La 18a kongreso, okazinta la 04-09.08.1936 en Brno (tiam Ĉeĥoslovakio), donas novan Estraron al IKUE. Kiel ĝenerala sekretario kaj kasisto estas elektita **Aleš Berka**, kiu samtempe administras la revuon. Redaktas **Petrus Micheel Brouwer** (Stompwijk apud Hago, 27.04.1897 - ?), nederlandano, kiu lernis Esperanton en 1929 por "konvinki la esperantistojn, ke Esperanto ne estas vivanta lingvo, sed baldaŭ li konvinkiĝis pri la malo kaj fariĝis fervora Esperantisto". En numero de aprilo 1937 li prezentas sian konceptadon pri la revuo: "EK devas iĝi organo, kiu eldevigas de la mondo respekton por IKUE. Programo, al kies plenumado mi kalkulas je Vi, celkonsciaj esperantistoj katolikaj de la mondo, kiuj volas, ke la katolika E-movado iĝu forta mondmovado, kiu vere povos influi la iradon de la mondokazaĵoj".



Brouwer fotita, okaze de la IKUE-kongreso en Brno, ĉe virino vestita per popola kostumo.

En tiuj jaroj EK perdas unu el la dekomencaj kunlaborantoj: la 19.02.1938 en Kaunas mortas p. Dombrovski.

La 35a datreveno de EK estas salutata de la redaktoro per vortoj, kiuj aspektas profetecaj: “Nia organo 35-jara. Kaj nun EK daŭrigos sian vojon en la estontecon. Tiu vojo ne estas facile irebla. Ĉar malhelaj nuboj pendas super nia Katolika Mondo kaj nia Katolika E-Mondo. Stariĝis en nia tempo bariloj, kiuj malhelpas la liberan kaj plenan evoluigon de la Katolika E-Movado. Multaj fidelaj legantoj ne povas daŭrigi sian abonon. Multaj fervoraj kunlaborantoj devas silenti. Sed organo, kiu trifoje dum ĝia ekzistado estas honorita per la Apostola Beno, ne pereos. Kiel ajn malluma ŝajnas la estonto, per kuna penado EK povos daŭrigi sian mondampleksan laboron [...] EK 35-jara. Ĉiam juna kiel nia Sankta Eklezio, ĝi plenumu sian taskon dum la venontaj tempoj”.

La dua mondmilito

Sed la mondo, intertempe, iras renkonte al dua mondmilito. La presado de la revuo estas translokita al Belgio. Anonima letero el Ĉeĥoslovakio iumomente informas, ke Gestapo forprenis la tutan havaĵon de IKUE (dokumentojn, librojn, arkivojn...). Provizora sekretario de IKUE fariĝas L.G.C. De Jong. Malgraŭ la eksplodo de la milito, EK daŭre aperas - jes, kun interrompoj, sed aperas, dank' al la senlaca strebado de la nederlandaj gefratoj - ĝis februaro 1940. Unu el la lastaj informoj entenataj en ĝi estas tiu pri la morto de d-ro J.N.J. Smulders, 67-jaraĝa. La iama redaktoro de EK ĉesis en februaro 1938 sian laboron kiel kuracisto-direktoro de Domo Assisië en Udenhout (vilaĝo apud Tilburgo) por sin dediĉi tute al studado kaj verkado. Meze de siaj libroj li mortis. Li havis naŭ infanojn. Pri li nekrologo en EK memorigas la entuziasmon, la senlacecon, sed ankaŭ la furiozan polemikanton kun tiuj, kiuj kuraĝis ataki aŭ moki Esperanton.

La lasta numero de EK en 1940 estas tiu de januaro-februaro. Ĝia ĉefartikolo demandas

KIO EN 1940 ?

Kio en 1940 ? Jen Demando de ni ĉiuj. Demando, kiu neniu el ni kun sama certeco povas respondi. Kio en 1940 pri la sorto de la mondo ? Kio pri la sorto de nia propra lando ? Kaj ankaŭ : Kio pri la sorto de nia I. E. U. E. kaj ties organo, nia kara « ESPERO KATOLIKA ».

Sed ankoraŭ pli li atendas, ĉar lia konvinko estas ke en niaj rangoj estas pli multe pli da kapablaj personoj, kiuj povus helpi en la tasko pliveligigi la enhavon de « Espero Katolika ».

Oni skribis al la redaktoro multajn deziraĵojn. Kiel eble plej bone li klopodis plenumi

grandlitere: “Kio en 1940?”. La IKUE-estraro planis por EK la publikigon de 8 numeroj. Ili ne estos realigataj. En majo la hitleraj armeoj invadas Nederlandon. EK travivas denovan longan silenton, kiu daŭros ĝis 1946.

Inter la mortintoj dum la dua mondmilito, ni volas mencii fraŭlinon Larroche, estingiĝintan en 1940. Ĉi tiu malforta virino, kiu esperantistiĝis 55-jara en 1909, laŭ instigo de Claudius Colas, estis por IKUE kaj EK plurfoja kaj

neanstataŭigebla gvidantino. Kasistino, ŝi zorgis ankaŭ pri multaj aranĝoj, ofte pagante el siaj poŝoj (ŝi pagis la ŝuldon de 1931 ĉe la presisto) fariĝinte dum kelkaj monatoj ankaŭ aganta prezidantino de IKUE.

F-ino Larroche kun p. Font Giralt en 1929

EK renaskiĝas

La reapero de EK en 1946 ŝuldiĝas precipe al la nederlandano Petrus Heilker (Schiedam, 27.03.1883 - 18.05.1964) IKUE-prezidanto ekde 1935, kaj al L.G.C.

ESPERO KATOLIKA



De Jong, daŭre ĝenerala sekretario, funkcio, kiun li transprenis, kiel ni diris supre, de Aleš Berka post okupacio de la tiama Ĉeĥoslovakio (15.03.1939). La numero de januaro 1946 daŭrigas la nombradon interrompitan en 1940; ĝi estas 16-paĝa, unukolora kaj kun fotoj. La presejo estas "Foreholte", unu el la plej eminentaj presejoj katolikaj en Nederlando, kiu "akiris por ni la necesan paperon kaj ekde septembro 1946 eĉ de plej bona kvalito". Digna reapero: post "kvin jaroj da deviga ripozo" skribas Heilker en la numero de februaro 1946 "ni denove komencis labori por nia internacia unuiĝo, do ankaŭ por ĝia monatrevo Espero Katolika, kies aperon denovan vi sendube vidis kun granda ĝojo". Heilker klarigas, ke "la cirkonstancoj devigis nin ĝin eldoni en Nederlando, kie ni trovis presiston kiu ĝin povas fari je nealta prezo". Efektive, la renaskiĝo de EK multon ŝuldas al la feliĉa koincido, ke en Nederlando la E-movado tuj reekfloris post la dua mondmilito, kaj ke ĉeestis granda grupo de katolikaj esperantistoj, arigitaj ĉirkaŭ la glorplena eldonaĵo "Nederlanda Katoliko": la decido de ĝia jarkunveno (29.12.1945) laŭ kiu ĉiuj anoj de tiu landa ligo estos abonantoj de EK, donis firman bazon por la daŭra apero. Mankis nur redaktoro, kaj pro tio "la ĝenerala sekretario De Jong surpronis ankaŭ tiun multokupan funkcion, tamen nur provizore".

La tiutempa EK ne povis ne respuguli la humanan tragedion de la postmilita mondo.

L.G.C. De Jong



Kortuŝaj estas la anoncetoj publikigitaj por serĉi malaperintajn parencojn, aŭ la sciigoj de movadanoj, kiuj informas, ke ili daŭre vivas, dum mortis familianoj. EK aliĝas krome al la zorgo de la esperantistaro pri la destino de la familio de d-ro Zamenhof, publikigante informojn pri liaj parencoj. Per plurnumera kroniko, EK de 1946 raportas pri la eventoj de la juĝprocezo okazanta en Nürnberg kontraŭ la naziistaj estroj, kaj en septembro 1946 ĝi rakontas la lastajn vivotagojn de p. Kolbe.

La revuo floras, tiom ke la redaktoro povas skribi en junio 1947: "Nun dum unu kaj duona jaro regule aperas nia revuo. [...] Rigardante la laborkampon kaj la rezultaton ni estas dankaj".

Dum reorganiza kunveno (la Internacia Konferenco en "Drakenburgh" apud Hilversum, Nederlando, 03.08.1947), donas novan forton al IKUE; eniras la Estraron sac. Alfons Beckers, kaj oni planas diversajn aranĝojn. Interalie, oni anoncas, ke la abonantaro de EK loĝas en 36 diversaj landoj; sed tio, kio estas riĉeco, fariĝas "problemo" en postmilita tempo. La enveno de la abonmono estas tre malrapida, pro la devizaj malfacilaĵoj: ĉi-foje, la vivo de EK ne dependas de mankanta kresko de abonantaro, sed de la ebleco enkasigi la eksterlandajn abonkotizojn, kiuj alvenas malfrue aŭ ne sukcesas alveni. Kaj efektive la risiko konkretiĝas: post la numero de februaro-marto 1948, EK revenas en

INTERTEMPE...


Kiam en jaro 1936 mi fariĝis studento de teologio kaj transpaŝis sojlon de la granda seminario en Prago, E-kurso ekfunkciis. Tio estis bona rezulto de longa antaŭlaboro de s-ano (nun pastro) Jozefo Pašek. Tamen ankaŭ rezulto de favora sintenado de la seminariestro d-ro Beran. Tial la esperantista "Rondeto Jesu-Infano de Prago" povis vigle rilati kun seminarioj alilandaj. [...] Mons-ro direktoro Beran kun ĝojo aŭskultadis raportojn pri nia laboro. Dum tiuj momentoj mi ankaŭ eksciis, ke la mortinta patro de la mons-ro bone sciis Esperanton. "Li emis - rakontis d-ro Beran - ŝerce inciteti panjon alparolante ŝin esperantlingve". Nia mons-ro ankaŭ kiel seminariestro havis sur skribtablo lernolibron de Esperanto. Li deziris ellerni ĝin perfekte kaj uzi, tamen lia ega apostola laboro ne permesis tion. Nun li estas ĉefepiskopo de Prago. Ankaŭ aliaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis. Ĉu ŝanĝiĝis lia favoro al Esperanto? Du tagojn post la episkopa konsekro mi estis akceptita en la ĉefepiskopa palaco. Aŭdinte mian peton pri instiga vorto kaj beno por IKUE, lia Ekscelenco tuj kun vigla intereso ekparolis pri neceseco de nia lingvo. "Oni diras, ke sufiĉas mondlingvoj, precipe la angla kaj la rusa. Eble por kleruloj. Tamen la aliaj, eĉ simplaj homoj, ankaŭ bezonas interkomprenigilon, kiu alproksimigus naciojn". Kaj je la fino de la interparolado: "Diru al ili, ke mi deziras plenan sukceson al ilia laboro, kaj benas ilin". Pastro Oto Madr (el "Espero Katolika", marto 1947)

Kompreneble, temas pri kardinalo Josef Beran (1888-1969)

la manojn de la legantoj nur per numero de oktobro 1949. Intertempe cirkulero informas la abonantojn pri la valutaj problemoj, konfirmitaj de De Jong en la reaperinta EK: “per fremddevizaj saldoj ni ne povas pagi la presiston”.

La nederlanda subteno kiu ebligis en 1946 la reaperon de EK, konfirmiĝas kaj pligrandiĝas en 1949: “Nederlanda Katoliko” forlasas sian propran ligan revuon kaj akceptas EK kiel ligan revuon. La redaktoro de NK, s-ro A. F. Leideritz jr., fariĝas la ĉefredaktoro de EK. Por la kroniko, fine de 1949 la jarabono de EK estas 4,50 guldenoj por Nederlando (aĉetopovo: 15,86 eŭrojn de 2002), 800 lirojn por Italio (11,40 eŭrojn de 2002), ktp ktp. Estas ankaŭ kotizo en usonaj dolaroj: 1,25 usonaj dolaroj (11,32 dolaroj de 2002), por aboni 8-paĝan revuon, inkluzive de tutpaĝa kovrilo, kiu krome limiĝos, ekde numero de novembro 1950, al nura titolkapo. La limigita spaco devigas al pli kaj pli malgrandaj karakteroj.

La profunda rilatado de IKUE okazas en 1950, pere la 22a IKUE-Kongreso en Romo, kiam Beckers fariĝas prezidanto.



En 1952, EK denove ŝanĝas sian formaton; la granda 18 x 25,5 cm reduktiĝas al 16,5 x 24 cm, kaj la paĝokvanto malgrandiĝas al 8. Krome (plia signo de ŝparemo!), la revuo aperas ne plu presite, sed mimeografite. Kulpas pri tio “...la enormaj plikariĝo de l’ papero kaj plialtiĝo de la salajroj ktp dum la pasinta jaro”, skribas p. Beckers, De Jong kaj Leideritz. La tekstoj estas tajpataj, la E-akcentoj mane aldonitaj. Presejo estas la ofseta librejo “Elinkwijk” de Utrecht.

LETERO DE LA PREZIDANTO 1952

La sekretarioj havigis diskonkordo la kristnaskan feston kiel ŝanĝo de la anĝela kanto antaŭ preskaŭ du mil jaroj. Gloro al Dio en la plejanta, kaj daco al la homoj bonvolaj.

Paco! Ne la paron ili desiras, kiu nuntempe la registaroj alopodas sekulaj filij per kancenoj tanko kaj bombaj, de la paron sigelita per sunnaberaj trakatoj, kaj nova bezitan sur bonvolaj kaj uno.

Truus Durenkamp

Ekde la numero de februaro-marto 1952, Leideritz eksiĝas kiel redaktoro, pro “multokupiteco”. Anstataŭiĝas lin, portempe, De Jong. EK restas en malriĉa vesto ĝis meze de 1953, kiam la provizora redaktoro eksiĝas: kvankam la laboro estis alloga, tamen li devas tion fari, ĉar “la senĉesa aperigo de la revuo kaŭzis tro da laboro por unu persono”, kiu devis prizorgi samtempe ankaŭ la sekretariejon kaj kason de IKUE.

Redaktorino fariĝas f-ino **Truus Durenkamp** (naskita la 27.09.1905, esperantistiĝo en 1934). Dum la jaroj ŝi havos gravajn taskojn kadre de la nederlanda katolika E-movado (jam ekde 1939), redaktante “Nederlanda

Katoliko” kaj fariĝante vicprezidantino de la ligo. Ŝia agado estis multfaceta kaj varia: ŝi faris prelegojn ĉe la nederlanda katolika radiostacio kaj prizorgis la libroservon de NK. Pro siaj altaj meritoj, ankaŭ esperantistaj, ŝi ricevis 2 distingojn en 1962: temas pri medaloj “Oranje Nassau” de la Reĝino de Nederlando kaj “Pro Ecclesia et Pontifice” de la Papo. Nuntempe ŝi vivas en domo por maljunuloj en Schiedam, kun iom da problemoj ligitaj kun la aĝo.



Kiam ŝi komencis la redaktadon de EK tiel skribis pri ŝi Beckers: “La faktoj montros, ke ŝi estas inda okupi tiun postenon. Ŝi komprenas pli ol 10 lingvojn, kaj do kampo de dokumentado estas sufiĉe vasta. Ŝiaj teknikaj kaj ĵurnalismaj scioj estas sufiĉe konataj por ke ni plenplene povas komisi al ŝi la malfacilan taskon de redaktoro. Mi estas certa, ke EK iros novajn vojojn sub ŝia gvidado”.

La “nova vojo” estas tuj alprenita. Kvankam en pli malgranda formato (14 x 21 cm), la revuo revenas al presita formo. Tre simpatie, f-ino Durenkamp komentas: “tio almenaŭ estas avantaĝo rezultante el la transiro de la redakcio al virinoj”. Pli serioze ŝi konfesas, ke ŝi akceptis transpreni la redakcion kondiĉe ke EK povu aperi en bela formo. La juna artisto A. Koonings faris senprofite la dezegnon sur la kovrilo (*foto ĉi-maldekstre*).

Durenkamp estas la redaktorino je la 50a naskiĝdatreveno de EK. Tre ameme ŝi lasas la frontpaĝon de la jubilea numero (oktobro 1953) al p. Camille Duvaux, pioniro de IKUE, tiam 88-jaraĝa (li mortis 97-jaraĝa en 1962), kiu memorigas la fruajn jarojn de nia organo. Kaj IKUE solenas la jubileon per kongres-pilgrimo al Lurdo: la 15.08.1953 la kongresanoj preĝas fronte al la tombo de Peltier.

Sampaŝe kun la resanigo de la kaso de IKUE, EK iom pliampleksiĝas: en 1955 al 12 paĝoj, kaj en 1957 al 16 paĝoj.

En oktobro 1957, la ĝenerala sekretario-kasisto de IKUE De Jong devis



abdiki ĉiujn neprofesiajn funkciojn laŭ ordono de sia kuracisto. Provizore (ho, kiom ripetigaĵas ĉi tiu vorto en nia movado!) zorgas pri la vakantaj taskoj Truus Durenkamp.

Daŭras intertempe la pliboniĝo de la revuo laŭ stilo, enhavo kaj grafika aspekto. En 1957 aperis, interalie, la junulata gazeto "Birdo", eldonita de la nederlanda junularsekcio "La Alta Flugo" (LAF) sub la redaktado de Jacques Tuinder. En 1959 la paĝoj estas 20 plus la kovrilpaĝo. Ekde januaro 1961, E-traduko de la Nova Testamento aperas suplemente.

En 1962, post 10-jara deĵoro, fino Durenkamp forlasas sian poston de redaktoro. En adiaŭa artikolo, ŝi skribas: "Kiel vi jam scias, s-ro N. Hoen transprenos la redaktadon de nia revuo ek de la sekvonta

numero, januaro 1963... Jam multaj esprimis al mi sian bedaŭron pro mia ekŝiĝo: al ili mi diras, ke povas esti tre bone por revuo, se ĝi ne tro longe restas en la manoj de la sama redaktoro. Certe vi rimarkos, ke la nova redaktoro havas aliajn ideojn pri la enhavo kaj aranĝo de la artikoloj, kaj mi opinias, ke EK nur povas gajni per la ŝanĝo".

Nico Hoen

Nico Hoen, naskita la 06.12.1914, fariĝis esperantisto julie de 1935, per radiokurso de s-ro Heilker elsendata de la nederlanda katolika Radio-Disaŭdigo de Nimego. Profesia ĵurnalisto, li tuj aplikis al la E-movado siajn kapablojn, verkante tiutempe - en la jaroj antaŭ la dua mondmilito - ĉiusemajnan rubrikon pri Esperanto en tagĵurnalo. Li faris ankaŭ radioprelegojn per la menciita katolika radio, invitita de Heilker. Proponita de Truus Durenkamp por la redaktado de EK, s-ro Hoen komencis labori por nia organo kelkan tempon antaŭ la oficiala transpreno, por certigi kontinuecon samnivelan en la



INTERTEMPE...

Merkrede 15.8.1962: 29a IKUE-kongreso. "La aŭtobusoj rapidis inter la Centro kaj la Papa somerrestadejo por transporti ĉiujn kongresanojn al Kastelgandolfo, kie precize je 10.30 h. la Sankta Patro Johano la 23a aperis sur la balkono por alparoli siajn infanojn el preskaŭ ĉiuj mondopartoj. Sen-ceremonie, en vere patra maniero, Lia Sankteco alparolis la centojn en la korto [...] Kiam la Papo itallingve menciis, ke Li ĝojas pri la granda grupo da katolikaj esperantistoj, eksplodis tiel laŭta kaj longdaŭra aplaŭdado, ke ni fakte ne scias kion la Sankta Patro volis ankoraŭ diri pri tio, ĉar kiam Li povis daŭrigi sian paroladon, Li jam parolis pri alia temo. Certe multegoj nur komprenis la vorton "esperantisti" kaj tio sufiĉis por tiu brua aplaŭdado!

(el "Espero Katolika", oktobro 1962)



sac. richardson
fondinto de i.k.a.u.

Pr. Wilhelmo Flammer, kiel ĉi tiu jubilea numero ni havas la honoron paroli per telefono kun li, kiu trafis la okazon por peti la peradon de liaj salutoj al ĉiuj IKUE-anoj elkore.

**pola redito
pri "espero katolika"**

La katolika redito pri "espero katolika" estas ĉi tiu artikolo de la redaktoro Nico Hoen, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de EK dum la epoko de ĝia formato 21 oble 27 cm, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de Nico Hoen.

Aliaj artikoloj en la artikolo de Nico Hoen, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de EK dum la epoko de ĝia formato 21 oble 27 cm, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de Nico Hoen.

Wortelude: Heerlen

Wortelude: Heerlen, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de EK dum la epoko de ĝia formato 21 oble 27 cm, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de Nico Hoen.

Wortelude: Heerlen

Wortelude: Heerlen, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de EK dum la epoko de ĝia formato 21 oble 27 cm, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de Nico Hoen.

Ekzemplo de enpaĝigo de EK dum la epoko de ĝia formato 21 oble 27 cm, kiu komenciĝis en 1964 dum la redaktado de Nico Hoen.

redaktado, verkinte jam multajn artikolojn; en la dua parto de 1962 li anonime helpis f-inon Durenkamp kaj ekde januaro 1963 li fariĝis redaktoro oficiale. Hoen estas konata kiel aŭtoro de la unua kompleta biografio pri p. Emile Peltier (publikigita de IKUE en aprilo 1963), kaj de "Historio de IKUE" publikigita de EK en 1992. En 1962, li, kiel dua katolika esperantisto, ricevis de la Papo la distingon "Pro Ecclesia et Pontifice". Hodiaŭ Nico Hoen vivas en Heerlen, kun iom da sanstataj problemetoj ligitaj kun la alta aĝo: por la


realigo de ĉi tiu jubilea numero ni havas la honoron paroli per telefono kun li, kiu trafis la okazon por peti la peradon de liaj salutoj al ĉiuj IKUE-anoj elkore.

Hoen mem estis montrinta siajn ideojn pri EK en artikolo aperinta unu monaton antaŭ lia komenco de redaktado: "La periodo de konfirmo kaj restarigo, kiu komenciĝis post la lasta mondmilito, certe nun povas esti juĝata kiel definitive pasinta. Tute certe ni povas konkludi, ke nia dinamika tempo postulas la plej viglan ritmon, kaj la plej modernajn metodojn de aktiva organiza aktiveco. Ankaŭ IKUE nepre devos transiri al plej progresemaĵoj, pli konformaj al la ŝanĝiĝintaj cirkostancoj".

Vento de novismo

La "vento de novismo", kiu blovas tra IKUE post la Kongreso de 1962 (apud Romo), aperigas en EK vortojn kiaj "reaktivigo, renovigo, gravaj iniciatoj, novaj planoj". Ja la estraro celis kaj "al multe pli intensa organiza kontakto" inter la gvidaj organoj, kaj "al fundamenta renovigo kaj reaktivigo de informaj taskoj de IKUE".

EK estas tuŝita de ĉi tiu blovado tuj post la ekoficiĝo de Hoen. Laŭ iniciato de p. Wilhelm Flammer (09.04.1909-29.08.1977) EK denove publikigas proprajn eldonaĵojn, sub la nomo "Kristana Kulturo".



La unuaj publikaĵoj estis biografio de Emile Peltier (aŭtoro Nico Hoen), broŝuro “Sintrompoj”, encikliko “Pacem in terris”, broŝuro “La turo inter nuboj” (pri sankta Barbara), verkita de d-ro Jan Filip, dum restis en preparo terminaro katolika tute en Esperanto. Depost numero 3, la serio “Kristana Kulturo” estis eldonataj proprakoste de p. Flammer.

Ekde januaro 1964 okazas nova ekbrilo por la 60-jara gazeto: formato 21 x 27 cm, glacea papero, multe da bildoj (fotoj, grafikaĵoj, simboloj), varieco en la presliteroj kaj ĝenerala enpaĝigo.

La julia numero de 1964 enhavas gravan anoncon: Papo Paŭlo la 6a akceptis aŭdienco parton el la IKUE-estraro, kune kun la peranto de la renkontiĝo, pastro Giacinto Jacobitti.

Stefan Maul

Tiu “vento de noveco” daŭre blovdas. Ĉi-foje temas pri personoj: jen nova redaktoro por EK kaj nova prezidanto por IKUE.

Ekde januaro 1966 Nico Hoen, je sia granda bedaŭro, devis rezigni la redaktoran funkcion. Lia tuttaga ofico kiel profesia ĵurnalisto de granda sudnederlanda gazeto postulis de li pli kaj pli da streĉo kaj tempo. Kaj plejofte, li lastatempe devis kromlabori ĝis profunde en la nokto, por ke li povu ĝustatempe sole pretigi la tekston de ĉiu paĝo de ĉiu EK-numero. Sekve, komencas redakti la revuon **Stefan Maul**, germano naskita la 25.09.1940 en Gundinci (tiam Jugoslavio).



Kiel kvarjarulo kun sia (germana) familio li rifuĝis, pro la milito, al Germanio. Sekvis universitata diplomo de katolika teologio kaj profesio de ĵurnalisto. Ĝin li praktikis en pluraj postenoj, fine kiel politika redaktoro de ĵurnalo en Augsburg, kie (kun interrompeto) li vivas de pli ol 30 jaroj. En Esperantujo li aktivis precipe ĵurnaliste; en 1980 – kun Torben Kehlet - li fondis revuon “Monato”. Inter la libroj, kiujn li verkis aŭ editoris, la du plej gravaj estas Manlibro pri Ĵurnalismo kaj Deklingva Manlibro pri Politiko. Lastatempe li krome aktivas en la Akademio de Esperanto kaj estas prezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. De kelka tempo li estas pensiulo, dediĉanta laŭeble plej multan tempon al la familio kun du filinoj kaj kvin genepoj (inter ili ĝemelinoj).

P. Alfons Beckers (Beringen, 15.12.1908 - 18.01.1994)



Koncerne la Unuiĝon, en aŭgusto 1966, p. Beckers forlasas la prezidantecon de IKUE post 20 jaroj; lia posteulo estas la nederlandano Jacques Tuinder (Hago, 10.01.1933), tiam 33-jara. Por esprimi sian dankon kaj admiron pro la longjara laboro por IKUE kaj Esperanto, la IKUE-estraro distingas p. Beckers per la titolo “Honora Prezidanto”.

Vere la sesdekaj jaroj alportas ĉiam pliajn novaĵojn al nia revuo. Aldone al la profesieca karaktero de *Espero Katolika* sub redakto de Stefan Maul, kun ties travidebla koncepto, regulaj rubrikoj eĉ laŭ amplekso egale revenantaj, kun menditaj artikoloj kaj rekonebla temaro, memorindas la numero de septembro 1968 estas “komuna eldono” kun la frata “Dia Regno” (oficiala organo de KELI, Kristana Esperantista Ligo Internacia), sekve de la unua kuna kongreso de la eldonaj asocioj (IKUE kaj KELI) en Limburg/Lahn. La “komuna eldono” ripetigis en septembro 1974.

Ankaŭ la komenco de la sepdekaj jaroj de la 20a jarcento alportas al EK novan ŝanĝon. Por la dua fojo en sia historio, la revuo estas presata ofsete ekde januaro 1970, kaj la granda formato reduktiĝas al iu preskaŭ “poŝa” cm 14,5 x 21. La ĝenerala aspekto, tamen, estas plaĉa kaj eĉ eleganta, dank’ al la grafika inventemo de redaktoro Maul (kiu ankaŭ mem prizorgas la tajpadon kaj enpaĝigon).

Ĉi tiu aranĝo de EK daŭris ĝis marto 1971. Intertempe, estiĝis en la movado intensa debato pri la gvidlinioj de la revuo; la diversaj intervenoj, aparte viglaj en ligo kun temoj tre aktualaj en la tuj postkoncilia periodo, reeĥis la plej novajn aŭ “progresemaĵn” tendencojn en la vivo de la Eklezio. EK tiuperiode efektive prezentiĝas kia neniam ĝi estis antaŭe. Se en 1951 estiĝis akra protesto (kadre de ĝenerala IKUE-kunveno!) pro rakonto aperinta en EK julio-aŭgusto kaj

KOMUNA NUMERO

DE

DIA REGNO - ESPERO KATOLIKA

Septembro 1968

Numero 9 - Septembro 1968

1968 - 1903

Dokumentus kaj Raportus pri la



200 reprezentantoj de KELI kaj IKUE kunvenis al la unua kuna kongreso en Limburg/Lahn. Ĉi tiu foto de la unua kuna kongreso de la eldonaj asocioj (IKUE kaj KELI) en Limburg/Lahn. La foto estas el la numero de la revuo "Espero Katolika" de septembro 1968.

titolita “La cucharacha” (en kiu estis skribite, interalie, ke Sankta Petro ricevis la ordonon de Dio ne akcepti en la paradizon meksikianojn); se en oktobro 1952 leviĝas frontpaĝa protesto pro artikolo “Kiel la vino evoluis en Francujo” (teksto akuzata je propagando de alkoholismo), amason da kritikaj reagoj estigas kelkaj artikoloj de EK aperantaj dum la redaktoreco de Maul. Efektive oni trovis kritikajn kaj foje malrespektajn emojn kontraŭ la establita Eklezio, ekde la titoloj, kiel tiu “Ridinde” per kiu en EK de januaro 1970 oni komentis cirkuleron de la kongregacio por la pastraro, ĝis la vinjetoj (kelkaj cetere prenitaj el komercaj informiloj de germana banko), kiuj montris karikaturajn ekleziulojn.



P. Jacobitti kun, dekstre, p. Henryk Paruzel

Ekstaras du partioj ĉirkaŭ du katolikaj gazetoj. Unuflanke EK kaj aliflanke Katolika Sento, la organo de la itala sekcio de IKUE, redaktata tiuperiode de p. **Giacinto Jacobitti** en Romo. En la respektivaj paĝoj aperas la starpunktoj de la du grupoj, foje per akraj akcentoj (“sana parto de IKUE”, “manipulataj raportoj en Katolika Sento”).

La polemikoj “finiĝas” per la IKUE-balotoj de 1971. La nova Estraro translokas la eldonadon de EK al Italio.

Unuan pritakson pri la ŝanĝo de la irado provas fari Karl Dürschmid (Aŭstrio), prezidanto de la balota komisiono, en letero al la sekretario de IKUE: “... la malsukceso de s-ro Tuinder ĉe la baloto ĉefe estas kaŭzita per la skribmaniero kaj atakemo de la redaktoro de nia EK, Stefan Maul. Pri ĝi, ne nur slavoj, sed ankaŭ la italoj, francoj kaj hispanoj estas ŝokitaj... Pro s-ro Tuinder mi bedaŭras, ĉar li certe estis fervora kaj ambicia prezidanto. Ankaŭ s-ro Maul estis sendube kapabla redaktoro. Sed... tio sole ne sufiĉas. Li ne komprenis, ke la percepto de la religio ĉe la slavaj kaj romiaj popoloj estas tute alia ol ĉe germanaj popoloj. Kaj ĉefe la slavoj, kiuj devas vivi sub la forta premo de la ateista komunismo, estis forte ŝokitaj pro la atakoj al la Papo kaj la Eklezio en EK”.

Al li respondas, en la lasta EK-numero de li realigita (februaro-marto 1971), Maul mem. Post denova publika demando: “kie, kiam kaj kiel mi atakis en EK la papon kaj la eklezion?”, li aperigas parton de sia letero al la nova IKUE-prezidanto, p. Ferdinando Longoni: “mi esperas, ke vi en via nova funkcio ne forgesos nek malatentos la grandan minoritaton de tiuj IKUE-anoj, kiuj -

kvankam ili ne elektis vin - ankaŭ estas kaj restas membroj de la de vi prezidata asocio. Vi devas zorgi pri la diverĝaj interesoj de ĉiuj kaj atenti la dezirojn de ĉiuj flankoj - ne facila tasko, kiel mi povas juĝi el propra sperto kiel ĝisnuna redaktoro de EK. Por tiu via nova tasko mi deziras al vi dian benon kaj multan energion, kaj mi deziras al vi, ke oni ne (de alia flanko ol min) tiel fanatike ataku vin, kiel oni ne malofte atakis min, resp. ankaŭ eksprezidanton Tuinder”.

En Italio

Konservante sian formaton alprenitan en 1970, la “itala” EK komencas aperi... sen havi redaktoron: aktivas respondeca komisiono konsistanta el pastroj Longoni kaj Flammer kaj de s-ro Paul Scherer Graber. La presejo estas en Chieri, apud Torino. Tamen jam de numero septembro 1971 EK denove havas redaktoron: pastro **Felice Ruaro** (Schio, Vicenza, Italio, 24.12.1920). Pro la fakto, ke li naskiĝis la antaŭtagon de



Kristnasko lia kompleta nomo estas Felice Natale - en esperanto: feliĉa Kristnasko. Li studis en Verono kie li sacerdotiĝis la 27an de junio 1943: li estis tre juna ĉar tiam la teologiaj studoj daŭris kvar jarojn (nun ses). De 1943 ĝis 1965 li instruis la lingvojn italan, latinan kaj grekan en la gimnazio de la episkopa seminario de Verono; intertempe li estis direktoro de la malgranda pilgrimloko “Madonna della Salute” apud Verono. De 1965 li estis paroĥestro de Costermano (Verono), kie li havis ankaŭ la taskon prizorgi la korespondadon kun familianoj de la 22.000 soldatoj ripozantaj en la germana tombejo. En 2003 li festis la 60-jariĝon de sia pastreco.

Li estis redaktoro de *Espero Katolika* dum 7 jaroj (1970-1977), kiuj koincidis



*Kovriloj
de 1974
kaj
1976*

kun denova jubilea jaro: 1973, kiam EK ekzistis 70 jarojn. En jubilea artikolo, Miloslav Šváček speciale akcentis la ligitecon de la orienteŭropaj katolikoj al EK-İKUE.

La plej gravaj anoncoj, kiujn EK donis en tiu periodo, estis sendube la alparolo al IKUE-kongresanoj farita de Papo Paŭlo la 6a la 13.08.1975 en placo sankta Petro en Romo kaj la komenco de la E-elsendoj de Radio Vatikana; EK trafe difinis tion “plensukcesa venko de la senlacaj klopodoj de nia roma apostolo”, P. Giacinto Jacobitti, unua redaktoro de la elsendoj.

En 1978 alia italo viciĝas en la redaktoreco: d-ro **Antonio De Salvo** (Romo, 08.06.1943), jam redaktoro de la itala E-revuo. Sub lia prizorgo, la revuo konas sufiĉe longan periodon de regulaj aperoj, kun ĉiujare almenaŭ 200 paĝoj, en la intertempe (de 1977) alprenita formato cm 17 x 24. Ĉi-koncerne, estas rakontenda kuriozaĵo: tia formato - verŝajne nekutima - ŝuldiĝis al la fakto, ke la presejo en Verono kiu komencis realigi EK en 1977, estis ekipita por presi laŭ tiu formato siajn eldonaĵojn, kaj EK devis sekve adaptiĝi. Formato, kiu konserviĝos ankaŭ kiam la revuo (1978) translokiĝos al roma presejo (firmao Aldo Rotatori), kiu male devos adaptigi sian labormanieron.

La jaroj de la redaktado de De Salvo estas la jaroj de rimarkindaj rekonaj kaj sukcesoj de IKUE. El la unuaj ni memorigas la aprobon de la Meslibro (08.11.1990), la unuan esperantlingvan saluton de Papo dum publika ceremonio (Ĉenstoĥovo 1991), la oficialan agnoskon de IKUE fare de la papa konsilio de la laikoj (11.02.1992). Inter la sukcesoj, ni listigas la havigon de la revuo trans la tiama “fera kurteno” dank’ al ĉeno de resendantoj.

En 1983 EK festas sian 80an datrevenon. Por soleni ĝin, oni eldonas “jubilean numeron”, kun resumo pri la longjara historio de la revuo. Ĝin redaktas la 21-jaraĝa

De maldekstre:

Carlo Sarandrea, p. Battista Cadei kaj d-ro Antonio De Salvo, fotitaj en 1984 sur la tegmento de Radio Vatikana en Romo, kun, fone, Kastelo Sankta Anĝelo.



Carlo Sarandrea (Romo, 03.09. 1962), tiam esperantisto depost 5 jaroj.

De Salvo laboras sola por EK, ĝis la fino de 1983 kiam komenciĝas la kunlaboro de p. **Battista Cadei** (Vigolo, Bergamo, 24.06. 1937). Dioceza pastro ekde 1963, magistro pri klasika beletrio, dum 8 jaroj li estis samtempe redaktoro de la elsendoj de Radio Vatikana kaj plenu-

mis paŝtistan servadon en roma paroĥo. Per lia kunredaktado, EK konas pli fortan ekumenan elanon, kun ekzemploj de valora interreligia dialogo (ni memorigas, ĉi-koncerne, la unuteman numeron de EK dediĉitan al Dipatrino Maria, kun publikigo de la konsidero pri Ŝi laŭ diversaj religioj). Pro reveno al sia diocezo Bergamo, p. Cadei kunredaktas perletere. Sed la fakto, ke EK abrupte ĉesas aperi, interrompas lian konstantan kunlaboron. Li nun loĝas en Bergamo kaj estas interalie tre aktiva en la grupoj, kiuj studas la novajn religiojn.

Koloroj

Multaj eventoj devigas d-ron De Salvo ne eldoni la revuon post la numero 5-6/1992 (kiu entenis la tekstojn de la fiksa parto de la Meso en Esperanto). Lia profesia laboro kiel juĝisto fariĝis pli kaj pli peza kaj temporaba. Krome, la kompostisto de EK interrompis sian kunlaboron kun la presejo de EK, translokiĝis kaj kunportis la pretigitan materialon. Plie, De Salvo devas alfronti translokiĝon al nova domo. EK reaperos nur komence de 1993, per numero


INTERTEMPE...

21.05.1981 - delegacio de IKUE preparolis en Romo komun-interesajn aferojn kun kardinalo František Tomášek, ĉefepiskopo de Prago kaj primaso de Ĉeĥoslovakio. La interparolo okazis en la itala lingvo.

(el "Espero Katolika", julio-aŭgusto 1981)

En la foto, de maldekstre: p. Cadei, p. Magnani, kard. Tomášek (1909-2001), p. Kevin Laughery, d-ro De Salvo.






80-paĝa (7-12/1992), kiu aperigas la “Historion de IKUE” verkitan de la iama redaktoro Nico Hoen. Tiu numero, krome, estas la unua kompostata de Sarandrea mem: li tajpas, enpaĝigas la unuajn 26 paĝojn (la cetero estis postrestinta preseja realigo). La tekstoj de tiuj 26 paĝoj aperas kun palaj karakteroj, ĉar la paĝoj estas mimeografitaj.

EK poste denove silentas. La nova numero povas aperi nur komence de decembro 1993, kaj ĝi, malgraŭ nuraj 32-paĝoj, datiĝas “januaro-oktobro 1993”. En aprilo 1994 EK denove alvenas en la manojn de la IKUE-anoj (numero novembro-decembro 1993). Ĝi estas 88-paĝa revunumero, kiu - kiel la nuna! - solenas la

jubileojn de Papo Johano Paŭlo la 2a (publikigante lian biografion) kaj de EK (per la represo de la unua numero de 1903): sur la ĝojo pro la du feliĉaj jubileoj, bedaŭrinde, ŝvebas malĝojo: alvenis la informo pri la forpaso de la honora prezidanto de IKUE, p. Alfons Beckers.

Sarandrea surprenas definitive la taskon realigi EK, prizorgante ankaŭ la fotokompostadon. Lia laboro, ekde numero 11-12/1997, koncernas ankaŭ la fotojn (dank’ al skanilo), por ke IKUE ŝparu monon, aŭ, pli bone, por eviti eviteblajn elspezojn. Samkiale, de 1994/1995 la revuo fariĝas dumonata. Kaj ĝi trovas sian propran hejmon: la nova Centra Oficejo de IKUE en Romo, finfine propraĵo de la Unuiĝo, aĉetita la 18.10.1994. Sed ĝi ne estas la sola grava novaĵo por la jarcentiĝanta revuo. Ĝi eniras ankaŭ la “novajn teknologiojn” kiam inaŭguriĝas la interretaj paĝoj de IKUE (www.ikue.org): ĉiu nova numero estas anoncata al la interretaj navigaciantoj, kiuj povas legi elektitan artikolon de tiu numero, kelkfoje tre pli frue ol la papera versio estu je dispono.



Kaj numero 5-6/1999

gastigas por la unua fojo koloran foton: temas pri unuaaĵo en la historio de EK, kiu ripetigis regule ekde numero 7-8/2000, ekde kiam la foto de la kovrilo estas kolora.

Mil koloroj, kiuj digne kaj trafe ornamas ĉi tiun tutan jubilean numeron de la 100-jaraĝa Espero Katolika.

INTERTEMPE...



Laŭ la horloĝa direkto: mons-ro Otčenášek vizite al la IKUE-tendaro en Sebranice (Ĉeĥio);

kard. Miloslav Vlk dum la 48a IKUE-kongreso (1995);

pastoro Burkhardt, p. Bernhard Eichkorn kaj Marija Belošević, vizite al episkopo Košič de Zagrebo (2001);

mons-ro Mariano de Nicolò, episkopo de Rimini, kun p. Duilio Magnani, dum la ekumena E-kongreso 2003.

Ĉi-sube: la preĝejo de sanktaj Johano kaj Paŭlo en Rimini, kun la E-lingvaj mozaikoj.



LA PREZIDANTOJ DE IKUE (1910-2003)

Ne eblas havi kompletan Historion de EK, sen paroli pri la prezidantoj de IKUE: kelkaj el ili tre aktive laboris por nia revuo.



1. P. Austin Richardson - Bruselo (Belgio) - prezidanto de 01.04.1910 ĝis 21.08.1913

Lia kompleta nomo estis Austin François Richardson Taylor. Li naskiĝis la 21.10.1843 en Amugnoabah (laŭ aliaj grafioj: Abujnoober aŭ Ahmedmigur, ĉiuokaze: en insulo Cejlono, tiama orienta angla Hindio), apud Bombejo. Liaj gepatroj estis Augustin Richardson kaj Catherine Jeanne Boye Cocheteux. Pro la dolorega morto de sia juna edzo, kiu estis armekuracisto, lia patrino baldaŭ poste reiris Anglujon kun siaj du geinfanoj (do, Richardson havis fratinon, pri kiu tute mankas informoj). Li estis anglikano: en 1860 li estis ano fervora de la partio "High Church", popola difino de la "anglo-katolikoj", ankaŭ nomataj "Puseyites" aŭ "oksforda movado", aŭ "ritualistoj". Li pli kaj pli alproksimiĝis al tiu grupo de anglikanoj kiuj havis multon komunan kun la roma Eklezio, kaj rememoros sian ĝojon kiam ĉirkaŭ 1860 li ĉeestis en unu el la unuaj "ritualistaj" preĝejoj en Londono: temis pri la preĝejo de sankta Maria Magdalena Munster Square, kie li vidis unuafoje, en anglikana preĝejo, Diservon kiu similis al la katolika Meso. En alia "anglo-katolika" preĝejo (St Albans) pastro Macknonokie prenis lian unuan konfesion. Richardson, kvankam en sia matura aĝo rekonos la mankon de necesa teologia studado ĉe tiu "konfesprenanto" anglikano, kaj ke li ne estis vera konfesprenanto, tamen deklaras, ke "li certe grade kondukis min ĝis la pordego de la Vera Eklezio de Kristo". 21-jaraĝa li konvertiĝis al katolikismo, pro evento kiun, post lia morto, malkaŝis unu el liaj 200 "spiritaĵoj", la redaktoro de EK Claudius Colas: li vidis lum-radiojn kiuj alvenis el Eŭkaristio (laŭ prof-ro Braive, aŭtoro de libro pri la historio de Instituto Saint-Louis, lia konvertiĝo okazis post lia alveno en Bruselo. Kaj efektive, en EK de majo 1909, aperas ĉi tiu lia indiko: "...jaro 1864, kiam mi, per la dia graco, estis akceptita en la vera Ŝafejo de Kristo..."). Li estis studento de sekcio Filozofio de la "Institut St. Louis" en Bruselo, kiun li vizitis kiel "libera studento" en 1864-65, kaj kiu poste estos la loko de preskaŭ lia tuta instruista kariero. Poste li studis en la Séminaire de Malines en oktobro 1870. La 20.09.1873, kelkajn monatojn antaŭ sia pastrigo (kiu okazis la 20.12.1873) li fariĝis instruisto de la Bazaĵ Lernjaroj ĉe la menciita Instituto Saint-Louis. Li estis seminari-amiko de la estonta kardinalo Mercier.

La 16.08.1882 li partoprenis kun la benediktanoj de Lieĝo en la fondado de la priorejo de Wentnor (insulo Wight). Li estis nomumita paroestro de Wolsey en la diocezo de Birmingham en julio 1890, kaj forlasis tiun taskon en 1894, post la morto de sia patrino, por reveni en Belgion kie li iĝis privata docento de la filoj de la Grafo de 't Serclaes (grava politikisto en Bruselo). En septembro 1897, Monsinjoro Van Aertselaer, direktoro de la Instituto, invitis lin doni kursojn de la angla lingvo en la nova Altlernejo de Komerco, malfermita en Instituto Saint-Louis. Li ankaŭ donis kelkajn kursojn en la scienca sekcio. Post la fermo de la Komerca Lernejo, en 1907, li emeritiĝis, kaj sin dediĉis al la "St Georges literary Club" kies prezidanto li estis, en la Instituto Saint-Louis, al la angla kolonio de Sainte Gudule (la nuna katedralo Ste Gudule et St Michel). Richardson krome estis mem-

bro de la komitato de la Belga ligo kontraŭ la “Blanka sklaveco”, t.e. kontraŭ la fikomercado de virinoj.

Dum la instruo-periodo en Saint Louis, en la baza kaj poste en la altlernejo, li restadis longan periodon en sia naskiĝlando. Difinita “Civitano de la libera Anglio ĝis oste”, Austin Richardson partoprenis en la debatoj pri la valideco de la anglikanaj ordinadoj, multe aktivis por la unuiĝo de la Eklezioj, precipe por la reveno de anglikanoj al la katolika Eklezio (multaj liaj artikoloj ĉi-teme aperas en EK de tiuj jaroj) kaj por pacismo.

La dato kiam li fariĝis instruisto en Instituto Saint-Louis, publikigita en la historia libro de prof-ro Braive, povas ankaŭ esti 1874, laŭ tio, kion Richardson mem deklaris plenigante la demandaron de la “Esperantista Centra Oficejo” en 1909. Laŭ la sama “demandaro”, li esperantistiĝis oktobre de 1906. En letero, kiun li sendis la 01.05.1911 al tiu, kiu estos lia estonta posteulo, Petrus Heilker, Richardson rakontis pri la motivo de sia esperantistiĝo (okazinta en matura aĝo, kiam li estis 63-jariĝa): “En aŭgusto 1906 mi estis en Portsmouth, kiam la franca militŝiparo vizitis Anglujon. Kaŭzis al mi ĝojon, kiam mi vidis amikecon, per kiu la francaj ŝipistoj estis akceptataj, ne nur de aŭtoritatuloj, sed precipe de la popolo, la laboristoj ktp. Tamen estis por mi ĉagrene, ke la lingva diverseco absolute malebligis ĉiam intelektan interrilaton. Ili ridis, reciproke al si donis la manon kaj faris gestojn kiel multaj bestoj, sed fari ion plian ili ne povis. Post kelkaj semajnoj mi ĉeestis la akcepton de ĉirkaŭ 4000 anglaj laboristoj en Parizo. Tie denove okazis la samo. Tiam frapis min la ideo: kiel domaĝe ke ne ekzistas facila lingvo por ili, per kiu ĉi tiuj bonaj homoj povus havi veran interrilaton. Kiam mi denove estis kun miaj kunprofesoroj, mi parolis pri tio. Unu el ili diris al mi: tia lingvo ja ekzistas; ĉu vi ne aŭdis pri Esperanto?”. Kompreneble, la “kunprofesoroj” menciitaj en la letero estis liaj kolegoj en la Instituto St. Louis, en Bruselo.

Detalojn pri tio, kio okazis poste rakontos p. Francisko Meŝtan en EK de la 01.04.1929: “Iu profesoro, pastro Eggers diris al li: “Tia lingvo ja ekzistas, ĉu vi ne konas Esperanton?”. Richardson respondis, ke li ekaŭdis pri ĝi, sed supozis, ke ĝi nur estas imitaĵo de Volapük. S-ro Eggers respondis, ke ĝi estas tute malsimila, kaj li donis al li la malgrandan ruĝan libreton: *Premier Manuel*. Richardson akceptis ĝin. La lingvo ŝajnis al li facila kaj simpla. Post unu semajno de studado, proksimume duonan horon ĉiutage, li diris, ke eble jam li povis skribi poŝtkarton en ĉi tiu lingvo. Li do sendis poŝtkarton al iu s-ro John Lundsgren, kies nomon li trovis en angla ĵurnalo *The Daily News* kaj kiu estis telegrafisto en Hedemora, malgranda urbo en la norda parto de Svedio. S-ro Lundsgren sciis nur la svedan kaj esperantan lingvojn. Pastro Richardson skribis al li, ke li estas studanta Esperanton de unu semajno kaj demandis, ĉu li komprenas lian poŝtkarton. Lundsgren respondis per longa letero ok-paĝa. Dirante, ke li tute komprenis lian poŝtkarton, li demandis, ĉu Richardson komprenis lian leteron. Li estis kompreninta ĉiun vorton. Pro tio li miris. Jen estis lingvo, pri kiu li nenion sciis antaŭ du semajnoj, kaj nun, kvankam li ne povis ĝin skribi nek paroli tute korekte, li tamen povis kompreni *à la lecture* (simple legante) tiel bone kiel anglan kaj francan. Richardson daŭrigis la lernadon, kaj precipe la legadon de libroj kaj gazetoj esperantistaj. En marto 1907, s-ro Lundsgren vizitis lin en Bruselo. Renkontinte lin en la stacidomo, pastro Richardson interparolis en Esperanto la unuan fojon kun ne-belgano. Ili interrilatiĝis perfekte kaj Richardson rimarkis apenaŭ ian diferencon en akcento, certe malpli ol inter angloj el Londono kaj Manĉestro. Li konigis lin en la societo de siaj Bruselaj amikoj kaj ili ĉiuj konversaciis kun li tiel facile kiel li mem. S-ro Lundsgren hejmen reveninte tra Brugge, Gent, Antverpeno, Nederlando, Germanio kaj Danlando skribis, ke li certe pli vidis kaj spertis ol iu ajn alia ordinara turisto”.

Per Esperanto p. Richardson sukcesis realigi la konvertiĝon i.a. de sinjorino Maria Milsom (fraŭlina nomo: Gruner, naskita en Le Pouzin-Ardèche la 21.08.1851, mortinta en Bossey la 14.08.1933. Ŝi estas konata per la pseŭdonimo Ramo – el la komencaj literoj de ŝia kompleta nomo Renée Adèle Maria, plus E-vorta finaĵo O - tradukantino de romano

“Fabiola” kaj de aliaj verkoj). Ŝia filo estis protestanta pastro, kaj ankaŭ li poste konvertiĝis. Richardson interrilatis kun multege da fremdlandanoj en diversaj mondpartoj nur per Esperanto; multaj konvertiĝis kaj plimultaj almenaŭ favore influigis je la katolika doktrino.

Richardson do esperantistiĝis en oktobro 1906 (ses jarojn poste, li skribos: “...jaro 1906, kiam mi komencis vojaĝi per Esperanto”). Tamen jam en EK de julio 1906 unufoje aperis kvarpaĝa E-artikolo subskribita de Richardson pri sia vizito al la anglikana **d-ro Pusey** en 1865. Ni povas nur konjekti, ke: (pli probable) tiu numero de EK estis presita kun malfruo, ĉiuokaze malmultajn monatojn, se ne semajnojn, post la esperantistiĝo de Richardson; aŭ (malpli probable) ke temis pri traduko de redaktoro **Peltier** de artikolo aperinta aliloke. Dua artikolo de Richardson aperos en la numero de novembro (“Kion pensi pri Lord Acton?”). La 21.01.1907 fronte al la “Poliglota rondo”, gastigita en la gotika salono de Hotelo Ravenstein en Bruselo, li faris anglalingvan paroladon pri la temo “ĉu eblas internacia lingvo?”. La antaŭan jaron, samloke, li estis farinta paroladon pri la “*l’entente cordiale*” inter la franca kaj la angla nacioj.

Por la 3a UK en Kembriĝo (1907) Richardson estas membro de la “trio por la tria”, kun pastroj **Emile Peltier** kaj **Luigi Giambene**, por zorgi pri la katolikaj kunvenoj kaj la Diservo: li fariĝas sekretario de tiu komitato por la katolikaj kunvenoj kadre de la 3a UK. Lia grava malsano en majo-junio 1907 minacis, ke li ne povu aktivi en tio, sed feliĉe li resaniĝis, kaj povis liveri al la katolikaj kongresanoj la Benon de **Pio la 10a** al la esperantistaj katolikoj, kaj tio laŭ persona permeso anoncita telegrame de Giambene. Richardson anstataŭigas ĉi-lastan en Kembriĝo kaj predikas anstataŭ li, dum la speciala Meso por la katolikaj esperantistoj en la Preĝejo de Nia Sinjorino kaj de la anglaj Martiroj en Kembriĝo. Parenteze, dum tiu 3a UK movas la paŝojn la ideo starigi katolikan E-asocion: oni fondas la “Societo Katolika Internacia” (14.08.1907) laŭ la projekto lanĉita de pastro **Peltier**. Plie oni fondas ankaŭ (15.08.1907) PEF, la “Pastra Esperantista Frataro” ankoraŭ proponita de **Peltier**. Por ambaŭ du fondoĵojn aktivis en Kembriĝo Richardson, laŭ la indikoj de **Peltier**: li fariĝas sekretario de PEF. Post la Kongreso Richardson restas en Britio kelktempe, kie li publikigas artikolon en “*The Catholic Times*”, prelegas en Ventnor (insulo Wight) kaj helpas la fondon de grupo en Shnklin. Lia laboro ripetigis okaze de la 4a UK en Dresdeno, kie li celebris Meson la 16.08.1908 en la preĝejo de la Sankta Koro de Jesuo, kaj en la posta UK, la 5a en Barcelono, kie li predikas en la “Casa de Caritat” dum la kongresa Diservo (05.09.1909) kaj dum aliaj okazoj.

1908 estas la jaro, kiam EK ĉesas aperi dum tri monatoj pro la malsaniĝo de pastro **Peltier**. Richardson eniras la direktantan komitaton de EK kiu transprenas la redaktadon de la revuo, kun **Claudius Colas** kiel ĉefredaktoro.

Richardson ne ĉesas propagandi Esperanton ekstere. Memorinda estas la parolado, kiun li faris la 10.12.1908 en la malgranda seminario de Malines, fronte al kardinalo **Désiré Joseph Mercier** (1851-1926), al la tuta kanonikaro, la teologiaj kaj filozofiaj studentoj de la seminario kaj proksimume 400 personoj, el kiuj multaj geeminentuloj de la urbo. Preskaŭ 200 studentoj mendis lernolibrojn. La 03.01.1909 li estas en Parizo kaj kun **Claudius Colas** li prelegas en *Chez nous* antaŭ katolika aŭdantaro. La 28.04.1909, denove en Parizo, dank’ al perado de abato **Camille Duvaux** (1865-1962), li prelegas en la tiea malgranda seminario. La pentekostan lundon de 1909 li ĉeestis la ĝeneralan kunvenon de UEA en Huy (sur la bordoj de Mozelo) kaj prelegas. Aliajn publikajn intervenojn li faris la 08.09.1909 en la kunveno de la *Association des Etudiants catholiques en vacances*, en Parizo; la 19.08.1909 li prezidas la kunvenon ĉe la asocio de la “*Militants du devoir chrétien*”, ankoraŭ en Parizo, kie **Colas** prelegas kaj Richardson rakontas kiel li fariĝis esperantisto.

La UK en Barcelono 1909 estas la okazo por la katolikaj esperantistoj antaŭenirigi la projekton pri katolika E-asocio: al la kongresantaj katolikoj alvenas letero el Litovio de pastro **Dombrowski**, kiu pledas por la starigo de katolika E-organizo. La ĉeestantoj, laŭ la

instigo de tiu elokventa letero, fondas (07.09.1909) KUE, Katolika Unuiĝo Esperantista (la nomon proponis s-ro Claudius Colas). Richardson estis elektita ĝenerala prezidanto. Kaj dum tiu sama kunsido ĉe la Universitato de Barcelono estis unuanime balotita de la 61 ĉeestantoj la decidon havi ĉiujare specialan kongreson internacian de katolikoj. Oni fiksas la lokon kaj daton de tiu kongreso: Parizo, 31.03-03.04.1910. La Kongreso, krom pritrakti katolikajn temojn, devos doni definitivan formon de la provizora regularo de la novnaskita KUE. Kiam la Kongreso okazas, Richardson estas elektita prezidanto de IKUE (tamen ankoraŭ nomata IKEU). Tre bedaŭrinde baldaŭ ekŝancelis lia sanstato kaj, per letero al abato Duvaux, li forlasis la direktoran postenon de EK, sed restis ties religia direktoro.

Intempe li fariĝas vicprezidanto de la Belga Ligo Esperantista kaj celebras Meson en la kapelo *Soeurs Maricolles* en Bruĝo okaze de la 2a belga E-Kongreso, dum kiu oni oficiale starigas la belgan sekcion de IKEU, kies sekretario-kasisto fariĝas Richardson.

La 28.8.1910 li estas en Hago por la unua jarkunveno de Nederlanda Katolika E-Unuiĝo, Nederlanda Katoliko. Li celebras Meson (28.08.1910) en la preĝejo de la fratinaro de sankta Karolo Boromeo kaj predikas pri la Eklezio, deirante el Joh. 17,21.

Fine de oktobro 1910 li krize malsaniĝas: oni enhospitaligas lin en la katolika hospitalo de Hago. Pri lia malsano EK titolas frontpaĝe kaj donas jenajn sciigojn: dum li estis en Hago por beni la edziniĝon de sia kuzino, en la nokto inter la 26a kaj 27a de oktobro, li trifoje kraĉis sangon kaj eĉ ricevis la lastajn sakramentojn. Li pensis, ke li baldaŭ mortu, kaj pro tio al s-ro **Sleyffers** kiu gastigis lin, li murmuris: “Forsendu leteron al Abato Duvaux, skribu ke miaj lastaj vortoj estis: “Petege, mi petas vin, daŭrigu kaj la sekretecon kaj la direktorecon por ke nia Katolika Esperantista movado ne mortiĝu”. Tia sentemo por la movado rehas ankaŭ en la posta atesto de s-ro Sleyffers: “la plej bona kuracilo, rilate nian karan prezidanton, estas la penso, ke la estraro de la Katolika Unuiĝo daŭrigas la laboron”. Richardson mem detale rakontos sian malsanon. Dum ok tagoj li kuŝis sur la dorso kun saketo da glacio sur la brusto, ne kapabla ion fari por si mem. Li estis inter la vivo kaj la morto ĉe unu lia kara amiko, unu el la estroj de la Esperanta Katolika movado en Nederlando (Sleyffers), kaj flegis lin du el la karaj Fratinoj de la Gildo de Sankta Aŭgustino. Poste oni transportis lin al la katolika hospitalo de Hago, kiu iĝis lia hejmo dum 3 longaj semajnoj. Tie li estis admirinde flegita de la Fratinoj de la Karitato de Nia Sinjorino de Kompatato. Post la longa konvalesko, la 13.11.1910 li skribas unuan leteron al Duvaux, per kiu li sciigas ke li fartas pli bone, sed sentas grandan malfortecon. Li eskapis el morto, sed li bone sciis pri la graveco de sia sanstato. Li tre limigas sian agadon. Nur la 28.11.1910 li reveturis al Bruselo. En 1911 kadre de la 3a belga Kongreso en Charleroi li celebras Meson, sed kiel okazis ĉe li de post la malsano, li ne povis paroli kun forta voĉo. Kelkajn monatojn poste li estas en Hago por la 2a kongreso de IKUE (14-18.08.1911), kie li interalie prelegas pri “la katolikoj kaj la pacifismo”. Antaŭe Richardson submetas la projekton de la kongreslaboroj al ekleziaj aŭtoritatoj, i. a. al episkopo **Augustinus Josephus Callier** de Haarlem (1849-1928), kiu faras siajn rimarkojn. Je la fino de la Kongreso la konkludoj (i. a. plado por la unueco de la kristanoj), estas sendataj al la Sankta Seĝo kaj al multegaj episkopoj. Kaj Richardson ricevas leteron de sia iama kunseminariano kardinalo Mercier per kiu li donas al la kongresaj dezirospimoj sian plenan aprobon, “kaj li estas preta, zorge ekzameni la demandon, kiamaniere oni povus en Belgujo doni al tiuj dezirospimoj praktikan efikon”.

Post la kongreso, la zorgemo de Richardson turniĝas al EK. De kelka tempo “tro multaj okupadoj devigis la ĉefredaktoron s-ron **Gautherot** kaj la direktoron Abaton Duvaux disigi de la situacioj, kiujn ili unue akceptis tiel sindoneme”. Por helpi IKUE kaj eviti halton de la regula apero de ĝia oficiala organo, Richardson kaj d-ro **J.N.J. Smulders** aĉetis EK de la ĝistiamia posedanto (abato Duvaux), kun la celo transdoni ĝin poste al kreota internacia societo, konsistanta el membroj de IKUE. Ekde la numero de novembro 1911 Smulders fariĝas redaktoro kaj Richardson, direktoro.

Sed denove malsano atakas Richardson: jam fine de tiu monato novembro de 1911 li informas la redaktoron de EK, ke la kuracisto ordonis resti absolute trankvile dum kelka tempo kaj petas al li zorgi sole pri la decembra numero de EK. La malsano ne estas tiel gravega kiel la antaŭa jaro en Hago, ĉar lia sangokraĉo ne estis tiel danĝera kiel la tiama. Malgraŭ la kuracista malpermeso, li havigas al la ĝenerala sekretario de IKUE, Frans Knaapen, letereton per kiu li “certigas al vi ke mi sentas jam la efikon de la preĝoj de miaj amikoj kaj la propeto de mia karega patrino la Dipatrino Maria. Kiel vin danki por viaj preĝoj kaj la preĝoj de viaj geamikoj? Tie mi estas postulema, tie mi estas senhonta almozulo: daŭrigu kaj daŭrigu ĉe viaj amikoj la preĝojn por mi, kaj petu ankoraŭ aliajn, sed nur ke la Sankta Volo de Dio ĉiam kaj ĉie fariĝu”.

EK februaro 1912 publikigas du artikolojn de Richardson pri la praktika plenumo de la deziresprimoj de la 2a IKUE-kongreso kaj pri la reunuiĝa movado en la oriento. En la unua artikolo li pledas por informado al la episkopoj pri la proponoj de la katolikaj esperantistoj, sed li ĉefe relanĉas la aktivadon por la reunuiĝo de la kristanaro, ankaŭ pere de la instruado en la seminarioj pri la movado favora al unuiĝo.

Intertempe konkretiĝas la projekto realigi societon, kiu posedu EK. La 01.05.1912 oficiale naskiĝas la “Anonima Akcia Societo: Internacia Eldona Societo Espero Katolika”, kun kapitalo de 12.100 guldenoj dividita en 200 akcioj.

La postaj elpaŝoj de Richardson koncernas la defendon de la Papo kaj de la Eklezio kontraŭ la atakoj kiuj alvenas el la ĝenerala esperantista movado. Dum la UK en Antverpeno Richardson protestas per flugfolio al la publike disdonita cirkulero de la liberpensuloj, kiu entenas pezajn atakojn kontraŭ katolikismo. En EK de marto 1912 li lanĉas averton al la katolikaj esperantistoj pri danĝero kiun la “nuna granda disvastiĝo de nia internacia lingvo neeviteble naskas”. Esence temas pri la ekzistantaj E-revuoj kiuj estas “maltaŭgaj el la vidpunkto de la kristana ĉasteco”, kaj Richardson invitas la katolikojn esti singardemaj, kaj “neniam aĉeti ĉu ĵurnalon, ĉu libron, sen antaŭe peti la konsilon de lerta esperantisto, kiu estas samtempe fidela katoliko”.

Kiam revuo “Germana Esperanto-Gazeto” eldonita en Magdeburgo (kiun oni ne devas konfuzi kun “Germana Esperantisto”, eldonita en Berlino), en siaj numeroj de la 03.12 kaj 31.12.1911 publikigis akrajn atakojn kontraŭ iu “motu proprio” de papo Pio la 10a, Richardson, per letero de la 03.02.1912, petas rebonigon de la okazinta ofendo. Lia iniciato ricevas kiel eble plej vastan subtenon de EK, kies numero de aprilo 1912 entenas 32-paĝan artikolon de d-ro Smulders pri la temo.

Ankaŭ okaze de la 4a belga kongreso esperantista (Gent, pentekosto de 1912) Richardson ĉeestas kaj predikas en esperanto. Por la 8a UK (Krakovo 1912) li lasas la zorgon por la katolikaj kunsidoj al Claudius Colas, kaj la 14.08.1912 li vojaĝas al Budapeŝto por partopreni en la 3a IKUE-Kongreso. Lia vojaĝo estas plia okazo por propagandi: de Bruselo al Nürnberg surtrajne li varbas plurajn kunvojaĝantojn, inter ili klera pastro de Munkeno kiu skribos al li en Esperanto ne multajn semajnojn post la renkonto. Post etapo en hotelo Kaiserhof de Nürnberg, li daŭrigas sian vojaĝon trajne al Passau kaj de tie vaporŝipe laŭ la Danubo ĝis Sintz kaj fine al Vieno. En la ĉefurbo de la Augsburga Imperio li celebras Meson en kapelo kiun la aŭstria imperiestro konstruigis je la memoro de sia mortigita Imperiestrino: Richardson preĝas por la animripozulo “de tiu malfeliĉa Princino” (kaj kompreneble temas pri Elisabeth “Sissi”).

Ankaŭ laŭlonge de la posta itinero el Vieno al Budapeŝto Richardson daŭrigas propagandi, disdonante flugfoliojn. En Budapeŝto li loĝas en la centra Seminario, ricevante de la vicrektoro, de profesoroj kaj seminarianoj la promeson lerni Esperanton (la vicrektoro eĉ paroletos en Esperanto al Richardson, okaze de lia foriro).

La lasta artikolo de Richardson por EK aperas en la numero de junio 1913, kaj ĝi estas

defendo de Esperanto kontraŭ la akuzo levita de belga katolika revuo, laŭ kiu ĝi estas nur batalilo de la framasonaro. Lia nomo aperas krome en la listo de la organiza-komitato de la "internacia telegrafagentejo", entute, de katolika informagentejo, kiu uzu Esperanton.

Dum li estis vojaĝanta al 9a U.K. en Berno, por iri de tie al la 4a IKUE-Kongreso en Romo, li mortas, pro sufokatako, en la nokto inter la 20a kaj 21a de aŭgusto 1913 en la domo de la parohestro de Bossey, tiam "lasta franca vilaĝo apud la svisa landlimo". En tiu vilaĝeto de Savoie, tute apud Genevo sed en franca teritorio, li akceptis anstataŭigi la parohestron dum kelkaj tagoj.

Antaŭsentante ke li mortos baldaŭ, en Bruselo li estis aĉetinta nur ir-bileton. S-rino Milsom rakontis tiel la lastajn vivohorojn de Richardson: "Ĝis la deka nokthoro li parolis pri spiritaĵoj kun pia farmistino, kiu deziris ricevi liajn konsilojn. Li priparolis la feliĉon de la ĉielo kun tia fajro kaj entuziasmo, ke li ŝajnis esti en ekstaza stato. Du horojn poste la fratino de la parohestro estis subite vekita per elvokoj; ŝi levigis kaj alkuris en la ĉambron de Richardson. Li estis sufokanta. Tuj li vidis, ke la lasta momento alvenis; li montris sur sia tablo kajereton de adresoj. Post kelkaj minutoj li forpasis". Anoncante lian morton al Smulders, redaktoro de EK, s-rino Milsom mem skribis: "Lia perdo estas por ni tre doloriga. La bona Patro donis al mi la plej veran ĝojon en mia vivo: mia riceviĝo en la Katolika Eklezio". En Bossey oni entombigis lin, post ceremonio dum kiu partoprenis Colas kaj la Bossey'aj samideanoj kune kun preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj, ĉe kiuj Richardson, kvankam restinta malmulte da tempo, jam estis konata. En Bossey oni entombigis lin la 25.08.1913. La 26.08.1913 en katolika preĝejo de Berno, dum la UK, okazis funebra meso por lia animo. Predikis pastro Lajos el Debrecen kaj Colas rakontis la lastajn vivotagojn de Richardson. D-ro Zamenhof, kun sia familio ĉeestis la Diservon, volante alporti omaĝon al li, kaj la samon faris la vendredon antaŭe s-ro Edmond Privat kun ĝenevaj esperantistoj.

La tombo de Richardson en Bossey, laŭ la informoj kolektitaj de s-ro Jean Amouroux, estis deklarita laŭleĝe "forlasita" kaj liberigita. Laŭ la informoj ricevitaj de alia esperantisto, s-ro Raymond Boré, la tombo daŭre ekzistas, tamen sen iu ajn indiko, aŭ steleo.

La informojn pri la vivo de Richardson antaŭ esperantitesteo ni ĉerpis el libro de prof-ro Gaston Braive, emerita profesoro kaj historiisto en la fakultato de Instituto Saint-Louis, titolita "Histoire des Facultés Universitaires Saint-Louis - Des origines à 1918", publication des Facultés Universitaires Saint-Louis, Boulevard du Jardin Botanique 43, 1000 Bruxelles. La libro entenas 2 paĝojn pri Richardson kaj grupfoton de 1878-79 kun li. Tiu libro mencias ankaŭ jenajn aliajn verkojn: AMICUS, A la mémoire de l'abbé Richardson, dans BAAE, 3e s., n° 2, janvier 1914, p. 113-119; artikolon de Austin Richardson pri la "langue Internationale" publikigita en "L'universitaire catholique", 12e a., 1910-11, n° 19, 30 mars 1911, p. 1CDE, 2AB. Koran dankon al Flory Witdoeck, kiu sukcesis kontakti prof-ron Braive kaj ricevi la libron.



2. P. Patrick Parker - Kilmyshall Ferns (Irlando) - prezidanto de 07.09.1913 ĝis 16.08.1920

Li estis filo de James kaj de s-rino Parker, Coolamain, Oylegate, kaj nevo de la Tre Respektinda Pastro Kanoniko John Parker, parohestro en Ferns, kiu mortis en aŭgusto 1900. Li studis unue en la Kolegio Sankta Petro (Wexford) kaj poste en la Irlanda Kolegio en Salamanko (Hispanio). Li estis ordinita pastro, kune kun alia studento de la Salamanka Kolegio (Sylvester Cloney) en la Kolegio Sankta Petro fare de episkopo Brown dimanĉe la 02.12.1894.

En la postaj jaroj Parker estis paroĥa pastro en Screen (ekde decembro 1894), en Adamstown (ekde februaro de 1898); en Kilmysshall (ekde la 24.08.1902), kaj paroĥestro en Cushenstown (ekde la 16.05.1919). Li estis membro de la Dioceza Kapitulo de Ferns. Parker estis klera studulo pri klasikaj lingvoj kaj ankaŭ tre interesata al la refloredo de la gaela lingvo: li estis unu el la pioniroj de la movado por la gaela lingvo en Co. Wexford. Li estis aktiva membro de la asocio Enniscorthy Feiseanna, kaj li donacis stipendion. Dum la 4a IKUE-Kongreso en Romo, li estis elektita prezidanto: pro “tempomanko” kaj post hezitiĝoj li akceptas por unu jaro. Li tamen restis prezidanto ĝis 1920 ĉar ĉesigis la agado de IKUE pro la unua mondmilito. Parker mortis dimanĉe la 19.09.1948, 78-jaraĝa. Li estis entombigita ĉe la preĝejo de Cushinstown.

Biografiaj informoj ĉerpitaj ankaŭ el la libro de Kanoniko John V. Gahan, The Secular Priests of the Diocese of Ferns, Editions du Signe, 2000. Ĉi tiu verko represas la informojn pri la diocezaj pastroj de Ferns publikigitajn en la libro History of the Diocese of Ferns (1916), de d-ro Grattan Flood. Koran dankon al pastro Paul Butler, nuna paroĥestro de Kilmysshall Bunclody, kiu havigis al ni ĉi tiujn detalojn.



3. P. Lambert Johan Joseph Marie Poell - Gemert (Nederlando) - elektita 16.08.1920

Li naskiĝis en 's-Hertogenbosch (Nord-Brabanto, Nederlando) la 22.03.1872 kaj pastrigis en 1895. Unue lia pastra agado efektiviĝis en Tilburg, poste, de 1915 ĝis la morto, li estis paroĥestro en Gemert. Li estas konsiderata unu el la pioniroj de la sociala instruado de la Eklezio. De 1909 ĝis sia morto li estis la religia konsultanto de Nederlanda Katoliko, kies kunfondanto kaj unua prezidanto li estis. En 1920, okaze de la IKUE-Kongreso en Hago, li estis elektita prezidanto de Internacio Katolika, la asocio en kiun estis kunfondita IKUE dum iom pli ol unu jaro. Gravas rimarkigi, ke, striktasence, li ne povus esti listigita en la serio de IKUE-prezidantoj (kiel neniam listigis lian nomon ĉiuj verkoj pri la historio de IKUE), sed pro la fakto, ke en la malmultaj monatoj dum kiuj li rolis kiel prezidanto, preskaŭ ĉiuj tiutempaj IKUE-anoj aktivis en ĝi, ni taksis ĝuste fari tion. Post la rezigno el prezidanteco li kunfondis kaj prosperigis la Internacia Katolika Informejo'n (IKI) en Nederlando kaj estis ĝia prezidanto. Li mortis, post mallonga malsano, en Gemert la 07.01.1937. En 1985 estis titolita je lia nomo Kapelo en Tilburg, kaj en 1990 eldoniĝis universitata disertacio pri li (Poell, L. - THELEN, A.A.J. Lambert Poell (1872-1937) en de katholieke sociale beweging. Sociaal-klerikaal spanningsveld in het Bossche dioceses 1896-1915. Tilburg 1990).

4. S-ro Paulus Antonius Schendeler - Nederlando - prezidanto de 1921 ĝis 1924 (foto je paĝo 169)

Preskaŭ unu jaron post la kunfandiĝo de IKUE kaj Blanka Kruco por krei la “Internacio Katolika”-n (IKa), la malsama konsidero pri Esperanto (ĉu celo aŭ nura rimedo?) kondukis grupon de esperantistoj al klopodado por restarigo de sendependa IKUE, post la IKA-Konferencoj en Graz. La ĉefa iniciatinto estis P. A. Schendeler, al kiu aliĝis d-ro **Johan Nikolaus Joseph Smulders** (1872 - 16.11.1939), direktoro de la akcia societo EK (kiu posedis la revuon Espero Katolika). Per korespondado ili serĉis la estraranojn de IKUE, kiuj restis ankoraŭ tiaj jure (t.e. kiuj neniam ekzistis aŭ estis de neniu eksigitaj) por ke estu kompletigita la estraro. Konkrete, la sola restanta membrino de la Estraro estis f-ino **Marie Larroche**, kiu, la 12.11.1921, post multe da hezitiĝoj, per persona letero (“tiel valida kiel mi povas

rajti”) nomumis provizora prezidanto, kasisto kaj sekretario, S-ron Schendeler el Nederlando kaj estrarano Pastron Becker el Germanio. Schendeler akceptis per letero de la 19.11.1921.

Li naskiĝis la 26.02.1878 en 's-Hertogenbosch kaj fariĝis esperantisto en 1909. En sia naskiĝurbo li akiris la diplomon de instruisto. Tiel li deĵoris en Raamsdonkveer kaj Den Dungen kaj kiel lernejestro en Mariaheide. Poste li fariĝis profesoro pri geografio en la katolika kolegio *St Joris* en Eindhoven. Li multe okupiĝis pri stenografio. Li mortis en Eindhoven la 26.01.1953. En IKUE li estis plej konata kiel ĝenerala sekretario kaj kasisto de, kaj dum jaroj li ankaŭ estis redaktoro kaj direktoro de EK. Pro diferenco pri la estraro li abdikis tiujn postenojn en 1935. Tamen lia idealismo ne forlasis lin. En 1937, dum la IKUE-kongreso en Hago, li faris altnivelan prezentadon (traduko kaj reĝisorado) de la klasika teatraĵo *Jozefo en Dotan* de la plej fama nederlanda poeto **Joost van den Vondel**. En nekrologo aperinta en EK de marto 1953, ni legas: “ofte li estis kaŭzo de miskompreno, de kvazaŭ rivaleco. Vere ni devas konstati, ke li estis geniulo kun multaj diversaj kapablecoj, kaj li uzis ilin ĝisfunde profite al nia movado, eĉ ĝis kelkaj horoj antaŭ la morto”.

5. P. Francisko de Paul Meŝtan - Vieno (Aŭstrio) - prezidanto de 1922 ĝis 05.08.1927 (foto je paĝo 161)

Li naskiĝis la 01.04.1865 en Hlinsko kaj fariĝis pastro en la ordeno de la Piaj Lernejoj (Piaristoj) la 21.06.1888. De 1906 ĝis 1925 li estis provincestro de sia ordeno en Krems. Esperantisto ekde majo 1917, jam la 24.03.1918 li gvidis en Krems la fondadon de loka grupo de “Aŭstruja Katolika Ligo Esperantista”, kies nacia prezidanto li estis. En 1930 li estis elektita membro de la Lingva Komitato Esperantista. Direktoro de Espero Katolika (1920-1921), por kiu dum la postaj jaroj li estis aktiva kunlaboranto (i.a. li verkis artikolaron pri “La problemoj de la lingvo tutmonda kaj historio de la katolika E-movado”, kiu estis la unua tre detala rekonstruo de la historio de IKUE, post la teksto de 1910 de prof-ro **Gustave Gautherot** (1880-1948), kiel oficiala inaŭgura parolado de la unua IKUE-Kongreso). Kiam, laŭ la tiama regularo de IKUE en 1927 lia prezidanteco finiĝas, li ne rekandidatiĝis. Li mortis en 1941.

6. P. Juan Font y Giralt - Gerona (Hispanio) - prezidanto de 05.08.1927 ĝis 08.08.1935 (foto je paĝoj 169 kaj 172)

Pastro Juan Font Giralt (aŭ, nacilingve, Joan Font i Giralt) naskiĝis en Gerona la 4.08.1899, pastrigis en 1924 kaj estis instruisto ĉe la seminario-kolegio de Collell (Gerona-provinco). Je la lasta tempo de sia vivo, tamen sen forlasi la instruadon, li responsis pri la paroĥo de Torn. En la porpastra seminario de Gerona aktivis pastro **Josep Casanovas i Genover** (1884-1965), profesoro pri latina lingvo kaj prezidanto de la grupo “Ĝirona Espero”, agema esperantisto ĝis sia morto, kiu plej entuziasme kaj sukcese disvastigis Esperanton kaj eĉ starigis grupon ĉe la seminario: “Studenta Juneco”. Tio ĉi konjektigis, ke Font Giralt lernis Esperanton en la seminario. Male, dum intervjuo ĉe Radio Vieno (24.08.1931, publikigita de EK mar.-apr. 1932) li mem konigis la originon de sia esperantisteco: “Kiam okazis en septembro 1909 la 5a UK en Barcelono mi estis 9-jara knabo. Mia patro lernigis al mi la lingvon iomete antaŭ la Kongreso. Ĉiam kun fiero mi memoros la momenton, kiam mi salutis la Majstron Zamenhof”.

En tiu sama perradia intervjuo, li sciigis, ke li prezidis kelkajn el la “Floraj Ludoj” en Esperanto de Katalunio (temas pri kataluna tradicio el la 13a jarcento: tiam la provencaj trubaduroj en belaj poemoj prikantis siajn amatinojn. Kaj en la unua semajno de majo okazis konkurso. La venkinto ricevis floron kiun li publike donacis al sia amatino, kiu tiel fariĝis la “reĝino de la floraj ludoj”. Tiu antikva kutimo, kiel dirite, estis kulturata pasintjarcente ankaŭ pere de la esperantistoj). En 1933 la Floraj Ludoj entenis ankaŭ “Premion Espero Katolika”: dujara abono.

De 1920 li laboris en unu aŭ alia grava posteno en esperantistaj societoj aŭ organizaĵoj. De tiu sama jaro 1920 al Esperanto li oferdonis sian tutan libertempon kaj entuziasmon. Proponita de la franca kaj de la nederlanda ligoj la 05.08.1927, kadre de la 12a IKUE-Kongreso en Asizo, li estas elektita prezidanto.

Dum la UK en Krakovo 1931 li partoprenis kaj gajnis la unuan premion en la oratora konkurso. Li tiam estis faranta sian sukcesan vojaĝon tra Eŭropo: li vitizis dek unu landojn, 8 ligojn aŭ grupojn de IKUE, 13 urbojn, faris 10 paroladojn, inter kiuj 2 per radio (nome, en Vieno kaj Breslaŭ) kaj kvarfoje li estis intervjuita. Li estis redaktoro kaj eldonanto de EK ekde numero jan.-feb. 1932 “laŭ persona entrepreno, provizore”. Tiu “provizoreco” daŭris ĝis la numero de oktobro 1934 kiu estis la lasta eldonita de li ĉe la presejo Ramon Bonet de Olot (Hispanio): la eldonado sen klarigo abrupte ĉesis. Oni scios poste, ke Font Giralt estis ege malsana, tiom grave, ke post longa tempo da suferado (dum kiu li same strebis publikigi EK) li metis sin sub la zorgoj de kuracisto d-ro Pi Figueras en kliniko de Barcelono por operacio, kiu okazis la 29.12.1934. Ĝis la fino de januaro, komence de februaro 1935, li daŭre estis en la hospitalo, kaj poste li revenis al Collell por daŭrigi siajn okupojn kiel profesoro en tiu Seminario.

Dum IKUE kaj EK renaskiĝas en Nederlando, en Hispanio eksplodas la interna milito, dum kiu estis murditaj 12 episkopoj, 300 monahinoj, 2365 monaĥoj, 4184 pastroj. Laŭ noto de la diocezo de Gerona (publikigita de “Katolika Esperantisto”, aŭtuno 1999) “je la unuaj tagoj de la ribelo li trovis rifuĝon en paroĥan domon kvankam li estus povinta facile fuĝi. Li preferis resti kun siaj paroĥanoj fide kredante, ke al li okazos nenio. Venis la 15.08.1936 kaj li estis arestita de la “Komitato de la Popolo”. Ili kondukis lin al teritorio de urbo Cellent, kaj, sur la vojo iranta de Banyoles al Olot tra Santa Pau, ĉe la ponto konata sub la nomo Esparragueras ili murdis lin post parolaj kaj fizikaj turmentoj. Unu el la ekzekutintoj, por ke estu pruvo pri tiu heroaĵo inter milicanoj, tranĉis al li orelon, kiun li konservis dum kelkaj tagoj en sia poŝo. Li konsideris, ke tiu viktimo estis grava kaptajo”.

Jean Amouroux en la sama numero de “Katolika Esperantisto” transrakontas tion, kion “iu nevino” de Font Giralt deklaris en 1985 al ĵurnalisto de “Presència”, ĉiusemajna aldono de “El Punt”, tagĵurnalo de Gerona: “jes, mia onklo, Pastro Joan Font, estis instruisto en Collell. Li estis mortigita en 1936 kaj ni scias, kiu faris tion, tamen mi ne diris kaj neniam diros kiu. Mia onklo estis alta kaj fortika, li defendis sin kaj tiam ili forte frapis lin ĉe la nuko pere de kulaso de fusilo”. Tamen ĉi tiu deklaro neniam estis publikigita de la menciita ĵurnalo. Atesto pli proksima al la murdo estas tiu, kiun svisa esperantisto (St. Simeon, el Luzerno) havigis al EK en 1937: li hazarde konatiĝis kun kataluna pastro, kiu sciigis al li jenon: “Font Giralt estis terure martirigita de la maristoj, la 17an de aŭgusto 1936 sur la vojo de Colell al Gerona. La manoj estis forhakitaj kaj la korpo bruligita”.

7. F-ino Marie Larroche - Parizo (F) - prezidantino de 18.08.1934 ĝis 08.08.1935 (foto je paĝoj 164 kaj 172)

Ekde 1933 dum du jaroj la prezidanto de IKUE Font Giralt pro malsano ne povis aktivi por IKUE kaj por EK (kiu de oktobro 1934 ĝis januaro 1935 ne aperis). Dum tiu periodo P. A. Schendeler, kiel ĝenerala sekretario de IKUE, klopodis rekontakti Font Giralt kiu ne donis vivsignojn (krom telegramo de 03.10.1934, kiu nur anoncis leteron, kiu neniam alvenis). La 18.08.1934 la kunveno de IKUE-anoj en 's-Hertogenbosch decidis sendi leteron al Font Giralt por peti ke li transdonu siajn rajtojn kiel prezidanto de IKUE al la vicprezidantino Larroche: lian plian nerespondon oni interpretis kiel jeson, kaj sekve, ĝis la posta Kongreso (1935 en Romo) f-ino Larroche estis la anstataŭanto de la prezidanto de IKUE. Tial, estas iom “arbitra” nia elekto enlistigi ŝin kiel “prezidantino de IKUE”, sed efektive ŝi meritas tion pro du motivoj: unue, dum preskaŭ unu jaro ŝi efektive oficiale agis kiel prezidanto, kunvokante interalie la ĝeneralan kunvenon de 1935, al kiu ŝi iris

vojaĝante el Parizo al Romo “fororgesante sian aĝon (81-j.) kaj malatentante ĉiujn malfacilaĵojn”; plie, ŝi estis dekomence la animo de IKUE, al kiu ŝi sin dediĉis anime kaj korpe, dum 30 jaroj.

Marie Félicité Larroche naskiĝis la 20.03.1854 en Metz (Francio), filino de Jean Pierre Larroche kaj Marie Paule Foi Vergnes. Dum sia vivo ŝi okupis sin precipe pri blinduloj, “por ke ili povu akiri siajn vivrimedojn ne per almozpetado, sed per laboro”. Ŝi esperantiĝis en 1909, sub la entuziasma gvidado de Claudius Colas, al kiu ŝi helpis en la propagando, precipe inter katolikoj. Dum multaj jaroj ŝi estis administrantino de EK, organizantino kaj kasistino ankaŭ de pluraj IKUE-kongresoj. Tiom sindona ŝi estis al la movado, al kiu ŝi dediĉis multe da laboro, da penoj, da mono, ke la tiutempaj IKUE-anoj kutimis nomi ŝin “nia patrineto”, kaj poste “nia avineto”. Pro la militaj cirkonstancoj en 1940 ŝi devis translokiĝi al Rodez-Aveyron kaj ne plu revenis al Parizo. Ŝi mortis en Rodez la 27.05.1940, je la 7a matene, 86-jaraĝa.



8. S-ro Petrus Heilker - Schiedam (NL) - prezidanto de 08.08.1935 ĝis 15.08.1950

Petrus Heilker naskiĝis la 27.03.1883 en Schiedam. Profesie li estis lernejestro. Lingva Komitato de 1931. Membro de la ekzamena komitato de 1917. Li verkis altkvalitan lernolibron por instrui Esperanton en mezlernejoj kaj gvidis E-kurson ĉe nederlanda katolika Radio-Disaŭdigo de Nimego (la famaj Nimegaj E-kursoj), kaj ankaŭ dusemajnajn sciigojn en Esperanto antaŭ la mikrofono. Li prezidis diversajn kongresojn kaj estis prezidanto de la nederlanda ligo Nederlanda Katoliko kaj kelktempe de la samnoma revuo. Li krome estis aktiva sur sociala kaj politika terenoj en sia regiono: li estis membro de la provinca deputitaro en sia regiono. Li mortis la 18.05.1964. La Ĝ.K. estis elektinta prezidanto mons-ron Antonio Eltschkner (la unua esperantista episkopo en la

mondo) kaj se ĉi-lastata rifuzus s-ron Heilker. Mons. Eltschkner rifuzis per karto de la 01.10.1935.

9. P. Alfons Beckers - Overpelt (Belgio) - prezidanto de 15.08.1950 ĝis 23.07.1966 (foto je paĝo 179)

Li apartenis al la dua generacio de la IKUE-pioniroj: tiuj, kiuj ekagis post la unua mondmilito. Al lia sacerdota vivo aldoniĝis sindona agado por la katolika esperantomovado, kies prezidanto li estis dum multaj jaroj. Pastro Beckers naskiĝis la 15.12.1908 en Berigen. Jam en 1923, 15-jara, li lernis esperanton; en 1930 li aliĝis al IKUE per la flandra sekcio (FUKE), kies religia konsilanto li fariĝis en 1935, la sama jaro en kiu li sacerdotiĝis kaj fariĝis profesoro en instruista seminario. Tie li ankaŭ gvidis plurajn E-kursojn, ĝis en 1947 li fariĝis vikario en Overpelt; en 1956 parohestro en Kwaadmechelen, kie li devis konstrui novan preĝejon. Siajn unuajn IKUE-kongresojn li partoprenis en Ljubljano kaj Antverpeno. Post la milito la jam altaĝa prezidanto Heilker petis lin fariĝi nova prezidanto; Beckers rifuzis. Sed en 1946 (precize la unuan de majo kaj dum tri tagoj) Heilker kaj de Jong riparolis la staton de IKUE kaj EK: je la fino Beckers estis elektita vicprezidanto de IKUE, por anstataŭigi la mortintan f-inon Larroche; tasko, kiun oni konfirmos dum la internacia Konferenco de IKUE en Drakenburgh (1947). Dum la IKUE-kongreso en Romo (1950) Beckers fariĝis aganta Prezidanto. En la posta Kongreso (Munkeno 1951) oni forigis tiun provizorecan “aganta” kaj Beckers restis prezidanto ĝis 1966. En 1965 li estis elektita ankaŭ komitatano de UEA.

Kiel Prezidanto de IKUE Beckers estis vere nelacigebla, kaj lia entuziasmo kaj laboremo kunaktivigis multajn validajn personojn; ni menciuj kelkajn eventojn: nova Statuto, kontrakto kun UEA por ke IKUE estu kunlaboranta faka asocio, revigligo de Espero Katolika, serio de "Kristana Kulturo" (kajeroj kun ekleziaj dokumentoj kaj pri religiaj temoj), la Eŭkaristiaj Esperanto-Mondkunvenoj, beno de Johano la 23a, felietona apero en EK de la esperanto-traduko de la Nova Testamento, propono havigi latinlingvan varban leteron al la Patroj de la Dua Vatikana Koncilio, aŭdienco ĉe Papo Paŭlo la 6a, anonco (en 1966), ke la Papo permesos esperantlingvajn legaĵojn kaj preĝadon de la fideluloj en la sankta Meso, ktp. Dum pli 15 jaroj seninterrompe Pastro Beckers estis Prezidanto de IKUE. Pro siaj multaj taskoj, interalie en sia paroĥo li devis rezigni je rekandidatiĝo en 1966, okaze de la 3a IKUE-kongreso en St. Gallen. Tiam li diris: "pli junaj fortoj transprenu la taskojn". La svisa kongreso, laŭ propono de la ĝenerala sekretario, Flammer, lin elektis Honora Prezidanto, unuanime kaj kun forta aplaŭdo. Dum la postaj jaroj li daŭre subtenis IKUE'n per konsiloj kaj laboro. Li zorgis interalie pri la reto de la Landaj Rerezentantoj. Oni povis renkonti lin ofte ĉe IKUE- kaj Universalaj Kongresoj: lia lasta UK estis tiu en Vieno. Lastatempe lia vid-kapablo sufiĉe malfortiĝis: tamen Espero Katolika ĉiam estis en lia koro (kiam perdiĝis ekzemplero, li tuj skribigis por ke la C.O. resendu alian). Li forpasis la 18.01.1994 en sia naskiĝurbo Beringen.

10. S-ro Jacques Tuinder - Nederlando - prezidanto de 23.07.1966 ĝis 04.02.1971

Jacques estas lia voknomo, plene li nomiĝas Jacobus Antonius; li naskiĝis la 10.01.1933 en Hago. Liaj gepatroj estis benitaj per ne malpli ol 10 infanoj. Li studis teologion kaj sociologion kaj iom antaŭ la elekto al prezidanteco, la tiam 33-jaraĝa Jacques estis ĵus fininta siajn studojn kaj laboris en la sociala fako de sia diocezo. En 1951 li konatiĝis kun esperanto per artikolo pri la katolika E-movado en eklezia gazeto. Aŭtodidakte li lernis la lingvon. Dum la jaroj 1957/58 li redaktis la rubrikon "Tra la katolika mondo" en EK, poste dum du jaroj "Birdo" n. En 1962/63 li estis prezidanto de "Nederlanda Katoliko" kaj redaktis ties organon. Li edziĝis al esperantistino, flegistino kaj lia kursanino, kiun li rekontis la unuan fojon dum la UK en Varsovio (1959). Ili havis 3 filojn. Elektita prezidanto dum la IKUE-kongreso en St. Gallen, lia prezidanteco karakterizi-



ĝis ĉefe per la ekumena elano: kulmino estis la Unua komuna Kongreso de IKUE kaj KELI, okazinta de la 25a de julio ĝis la unua de aŭgusto 1968 en Limburg/Lahn, kun la partopreno de 200 esperantistoj, membroj de la du kristanaj asocioj, el 18 landoj. Ĝi estis la unua el tiuj, kiujn oni nun nomas Ekumenaj E-Kongresoj. Je la balotoj de 1971 li ne estis reelektita. En la postaj jaroj ĝis hodiaŭ li interalie streĉe sin dediĉas al bonfaraj agadoj (tre fama estas lia porblindula agado, konata sub la siglo Agado E 3, aŭ nun E-vid-ente). En 2000 li estis elektita prezidanto de KELI. Li vivas en Heemskerk kun sia edzino Vera Tuinder Dekker.



11. P. Ferdinando Longoni - Milano (Italio) - prezidanto de 04.02.1971 ĝis 24.10.1975

Li naskiĝis en Milano (Italio) la 01.10.1916, en tre nombra familio de laboristoj. Li pastrigis en 1939 kaj estis parohestro (dum 16 jaroj en Cerro, Lago Maggiore kaj dum 17 en Limbiate, Milano). Sur la tereno de la karita agado li fondis la Asocion de la "Arĝenta Kruco", unu el la plej aktivaj en kazoj de urĝa helpo, kaj sidejon por volontulaj sangodonacantoj. Li esperantiĝis en 1954 kaj partoprenis en multaj kongresoj kaj kunvenoj, naciaj kaj internaciaj, en okcidento kaj oriento. Kiel prezidanto de IKUE li partoprenis la kongresojn de Como (1972), Hamburgo (1974) kaj Romo (1975). De la kongreso de Como li estis la ĉefa organizanto; por la kongreso de Romo 1975 li preparis belan preĝaron malgraŭ sia malbona farto. Li estis longtempe vicprezidanto de la italaj katolikaj esperantistoj. Elektita prezidanto de IKUE en 1971, en 1974 li estis reelektita preskaŭ unuanime (168 el 183 voĉoj). Li mortis en Limbiate la 24.10.1975.

12. P. Czesław Biedulski - Lublino (Pollando) - prezidanto de feb. 1976 ĝis 06.02.1979

Naskita la 11.04.1936 en Vilno (tiam pola teritorio, nun Litovio), en 1956 li aniĝis al la kapucena ordeno en Varsovio kaj pastrigis la 29.06.1963. Poste li studis naturfilozofion en la Katolika Universitato Lublina. Ekde 1968 li laboris kiel sciencisto ĉe la katedro de Teoria Biologio en la fakultato de kristana filozofio de la lublina katolika universitato. En 1974 li doktoriĝis en la menciita fakultato. Ekde 1962 li estas aktiva esperantisto. Kune kun pastro Henryk Paruzel (1904-1977) li fondis la esperantan bibliotekon ĉe la universitata biblioteko de Lublino. Li eniris la estraron de IKUE por la unua fojo sekve de la rezulto de la perletera baloto de aŭtuno 1974. Post la neatendita forpaso de pastro Longoni, la IKUE-membroj per denova perletera baloto elektis lin. Pli precize: pro la fakto, ke la tiama Estraro ĝis la morto de prezidanto Longoni ne dividis inter si la koncernajn postenojn, en februaro 1976 oni elektis lin, per absoluta plejmulto, vicprezidanto kun la tasko de aganta prezidanto. Dum lia prezidanteco (por kiu i.a. li translokiĝis el Varsovio al Romo) movis la unuaj paŝoj la unua centra oficejo de IKUE en Romo, okazis la memorinda 37a IKUE-kongreso en Ĉenstohovo (700 kongresanoj, el 23 landoj, 4 episkopoj kaj pli ol 40 pastroj), revigliĝis la eldona agado, komenciĝis la E-elsendoj ĉe Radio Vatikana, estis aprobita la nuna Statuto de IKUE (kun la sekva, 31.01.1978, leĝe registriĝo de IKUE fronte al la itala leĝo kiel asocio sen profita celo), kaj Espero Katolika ricevis, 11.02.1978, juran agnoskon ĉe la Tribunalo de Romo. En 1978 li anoncis sian rezignon je la prezidanteco kaj nuntempe li vivas en Varsovio.



13. P. Duilio Magnani - Rimini (Italio) - prezidanto de 06.02.1979 ĝis 12.07.1995 (foto kaj biografio je paĝo 205)

14. D-ro Antonio De Salvo - Romo (Italio) - prezidanto de 12.07.1995 ĝis 04.09.2003 (foto kaj biografio je paĝo 208)

15. S-ro Miloslav Šváček - de Penčice (Ĉeĥa Respubliko) - nuna prezidanto de IKUE ekde 04.09.2003 (foto kaj biografio je paĝo 206).

RADIO VATIKAN A - Elsendoj en Esperanto

La elsendoj okazas en tri tagoj de la semajno en la sama **horo 21.20 MET (20.20 UTC)**

DIMANĈE - daŭro 9'20" - frekvencoj: mezonde 527 kaj 1530 - kurtonde 4005 kaj 5885 kHz. La dimanĉa

elsendo estas ripetata je la mezeŭropa horloĝa horo 23.50, per la mezondaj frekvencoj. * **MERKREDE KAJ**

JAŬDE - daŭro 9' - frekvencoj: mezonde 1260 kaj 1611 - kurtonde 7250 kaj 9645 kHz.

Oni povas aŭskulti ankaŭ per la Interreto: <http://www.vaticanradio.org>

Peru la senpagan sesmonatan program-bultenon. Skribu al: **RADIO VATIKANA - ESPERANTO-REDAKCIO,**

SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO (E-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>)



57a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

03 - 10 julio 2004

KRETINGA (Litovio)

Temo: "Venku malbonon per bono" (Rom 12,21)

La kongresurbo - Kretinga (elp. Krétinga) havas preskaŭ 20.000 loĝantojn, kaj ĝi situas je distanco de

11 km. el la Balta Maro, 12 km. el la ripozloko Palanga kaj 21 km. el Klaipeda. El ĉefurbo Litovio ĝi estas atingebla per rekta trajno; per buso tra Klaipeda aŭ Palanga. El Germanio estas ebleco uzi pramsipon Rostock-Klaipeda. Aviadile oni povas atingi ĉefurbon Vilnius kaj daŭrigi la vojaĝon per trajno aŭ buso. El Berlino, Frankfurto kaj Hamburgo (Germanio) oni povas aviadile atingi la najbaran urbon Palanga kaj de tie perbuse la kongresurbon Kretinga. Ĉiu aliĝinta kongresano ricevos pli detalajn informojn pri ating-eblecoj.

Kretinga estas administra centro de distrikto en Okcidenta Litovio, t.e. Jemajtio. Legendo diras, ke la fondinto de la urbo estis gota reĝo Armono, posteulo el gento Grutingoj. En la 4a jc. li iris tien kaj ravita de la beleco de la naturo kaj de ĝia riĉeco, li konstruis tie kastelon Grutinga. De tio devenas la nuna urbonomo Kretinga. La urbo havas longajn kaj profundajn kulturajn tradiciojn. Por la unua fojo Kretinga estas menciita en dokumentoj de 1253, kaj pro tio en 2003 Kretinga festis la 750-jariĝon de sia ekzisto. La ĉarma panoramo de Kretinga etendiĝas el la tuto de la preĝejo de la Anunciacio ĝis la preĝejo de la Sankta Virgulino Maria. La internon de la preĝejo, en kiu okazos la kongresaj diservoj, ornamas unikaj kreaĵoj de ligno-plastiko. Al la preĝejo sin apogas franciskana monaĥejo kaj en la valo malantaŭ la preĝejo estas Groto de Lurdo. Pri la spirita vivo en Kretinga zorgas 11 katolikaj pastroj, unu luterana pastoro, franciskanaĵoj kaj monaĥinoj, fratulinetoj de Sankta Tereza kaj fratinoj de sankta Klara.

En la urba blazono de Kretinga estas la Sankta Virgulino Maria, kiu tenas enmane la Infanon Jesuon. Tiu ĉi simbolo en la blazono estas ligita kun la franciskanoj, kiuj antaŭ longe ekloĝis en Kretinga. Laŭ privilegio de la jaro 1609 pri Magdeburgaj Rajtoj la Sankta Virgulino Maria estas nomata Protektantino de la Eklezio kaj de la urbo. En la urbo kaj en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj ekzistas multaj vidindaĵoj, kun kiuj la kongresanoj konatiĝos.

En la interreto eblas viziti la paĝojn: www.kretinga.lt.

Kongresejo - La Kongresejo estos la Instituto Sankta Antonio pri religiaj studoj. Tie estas salono por 250 personoj (kongresejo) kaj 2 - 3 - 4 - litaj ĉambroj por 60 personoj kun lavejoj. Necesejoj kaj duŝejoj estas en koridoro. Pliaj loĝeblecoj por 150 personoj en 4-litaj ĉambroj estas je dispono en la Agrikultura Lernejo, je nur 5-minuta piedira distanco de la kongresejo. Por 6 pastroj estas la ebleco loĝi en tute apuda franciskana monaĥejo. Pli komfortemaj personoj, kiuj emas plie pagi, povas loĝi en Hotelo Gelme (Zemaiciu g. 3, 5700 Kretinga, Tel. +370 445 76931, fakso: +370 445 76930), kie estas 7 dultitaj ĉambroj, inter ili du luksaj. La manĝejo por la kongresanoj troviĝas apud la Kongresejo.

<http://www.ikue.org/kong2004/kong2004.html>

57a Kongreso de IKUE - Aliĝilo

sendota al doc. Laurynas Algimantas Skupas
str. A. Stulginskio 4-13, LT-2001 Vilnius, Litovio

Mi aliĝas al la 57a Kongreso de IKUE 2004 en Kretinga, Litovio

Plena nomo: S-ro, S-ino, _____

Bonvolu skribi vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan nomon minuskle

Adreso: _____

Poŝtkodo: _____ Lando (en Esperanto): _____

Naskiĝdato: _____ Sekso (signu per kruceto): _ ina , vira

Telefono: _____ Fakso: _____ Retadreso: _____

Mi deziras dividi la ĉambron kun: _____

Mi/ni planas alveni je (dato kaj horo, se eblas): _____

Mi/ni planas foriri je (dato kaj horo, se eblas): _____

Mi/ni planas alveturi per:
aŭtomobilo , trajno , buso , aviadilo/ŝipo/trajno

Loĝado:

Mi/ni mendas en la kongresejo:

Tranokton en plur-lita ĉambro (*dulitaj ĉambroj estas rezervitaj nur por geedzoj*)

Ni estas geedzoj kaj petas du-litan ĉambron en la kongresejo.

Mi/ni mendas en **Hotelo Gelme**: 1-litan ĉambron,

2-litan simplan ĉambron 2-litan luksan ĉambron

Mi/ni ne mendas tranoktadon:

Mi/ni mendas en la kongresejo nur manĝojn:

matenmanĝojn , tagmanĝojn , vespermanĝojn

Mi/ni estas vegetaranoj

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon pri jena temo: _____

Programerojn por distra vespero: _____

Alian programon: _____

La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.

Pagmaniero: Mi pagis (sendis) la sumon de _____ je la _____

al banka konto de Laurynas Algimantas Skupas (kontnumero 10014558095, bankokodo 73000, Hansa LTB, SWIFT: HBALT22; tra banko korespondento DEUTSCHE BANK AG, Frankfurt/Main SWIFT: SEUTDEFF BLZ 50070010

al "skup-y"-konto de UEA; per poŝtmandato, per letere al s-ro Laurynas Skupas, str. A. Stulginskio 4-13, LT-2001 Vilnius, Litovio

Dato: _____ Subskribo: _____

Kongresaj kotizoj (ĉiuj esprimitaj en eŭroj EUR)

Tarifo A: ĉiuj landoj ne en Tarifo B

Tarifo B: Eŭropa Unio (stato 2003), Skandinavio, Nord-Ameriko.

1. Aliĝkotizo (nerepagebla) por ĉiu persono, pagenda antaŭ la Kongreso:

Limdato	Tarifo A	Tarifo B
ĝis 2004.03.31	10,- EUR	20,- EUR
ĝis 2004.05.31	15,- EUR	30,- EUR
ekde 2004.06.01	20,- EUR	40,- EUR

Gejunuloj malpli ol 25-jaraĝaj ĝuas 50% rabaton de la koncerna kotizo laŭ grupo/periodo.

2. Kongresa kotizo pagenda en la kongresejo

(inkluzivas tranoktojn, manĝojn kaj ekskursojn. Ĝi ne inkluzivas antaŭ- kaj post-kongresojn).

Tarifo A: 100,- EUR

gejunuloj: 70,- EUR

Tarifo B: 150,- EUR

gejunuloj 100,- EUR

Nur manĝoj (sen tranoktoj)

Tarifo A:

50,- EUR

Tarifo B:

80,- EUR

3. Prezoj en Hotelo Gelme por 7 noktoj

(pagendaj en la kongresejo, alkalkulu eblan inflacion)

luksa ĉambro dulita:

360,- EUR

simplo dulita ĉambro:

280,- EUR

Grava atentigo! La menciitaj kotizoj inkluzivas neniun asekuron.

Ĉiu kongresano por la kongresaj tagoj prizorgu por si la asekuron (precipe sanitaran) en sia lando.

La aliĝon oni traktos kiel validan post ricevo de la aliĝkotizo.

Aliĝkoton oni povas sendi al:

banka konto de Laurynas Algimantas Skupas: kontnumero 10014558095, bankokodo 73000, Hansa LTB, SWIFT HBALT22; oni devas sendi ĝin tra banko-korespondento DEUTSCHE BANK AG. Frankfurt/Main SWIFT: SEUTDEFF BLZ 50070010

aŭ al UEA-konto: skup-y

aŭ per poŝtmandato je nomo kaj adreso:

Laurynas Algimantas Skupas

str. A. Stulginskio 4-13

LT-2001 Vilnius, Litovio.

Al la supra adreso sendu la aliĝilojn kaj (kun ebla risko de la sendinto) oni povas sendi la aliĝkoton en bone pakita kaj registrita leterkoverteto.

Retpoŝtaj adresoj: <skupasl@yahoo.fr> <aidute@mail.lt>



REZULTOJ DE LA IKUE-BALOTOJ 2003

La balota komisiono kunsidis en Rimini la 4an de septembro 2003 kaj kontrolis ĉiujn slipojn alvenintajn perpoŝte kaj tiujn metitajn persone en la keston fare de la balotantoj. Je la fino oni konstatis la jenan rezulton:

Slipoj alvenintaj perletere	254
Voĉoj dum la Kongreso	41
entute estas	295 slipoj

El ili estas:

<i>validaj</i>	291
<i>ne-validaj</i>	4

POR LA ELEKTO DE LA PREZIDANTO

Validaj voĉoj	287
voĉoj nulaj	4
sen esprimita elekto	0

RICEVIS VOĈOJN:

Boschin Serio	81 (28,22%)
Kóbor Lajos	53 (18,47%)
Šváček Miloslav	153 (53,31%)

S-ro Miloslav ŠVÁČEK rezultas elektita PREZIDANTO DE IKUE

POR LA ELEKTO DE LA ESTRARO

Validaj voĉoj	287
voĉoj nulaj	0
sen esprimita elekto	0

RICEVIS VOĈOJN:

Belošević Marija	209
Boschin Serio	168
De Salvo Antonio	190
Kalný Jan	156
Kóbor Lajos	217
Magnani Duilio	234
Sarandrea Carlo	231
Sobol Bogusław	182
Skūpas Laurynas	165
Šváček Miloslav	144
Von Hatzfeld Hatto	159

Surbaze de la Statuto kaj laŭ la decido de la ĝenerala kunveno, la voĉoj ricevitaj de la kandidatoj por la prezidanteco estas sumigendaj kun tiuj ricevitaj por la elekto de la Estraro. Sekve, la definitiva rezulto estas:

ELEKTITAJ

Šváček Miloslav	297
Kóbor Lajos	270
Boschin Serio	249
Magnani Duilio	234
Sarandrea Carlo	231
Belošević Marija	209
De Salvo Antonio	190
Sobol Bogusław	182

NEELEKTITAJ

Skūpas Laurynas	165
Von Hatzfeld Hatto	159
Kalný Jan	156

Pro la elekto al prezidanteco de S-ro Miloslav Šváček, la oka elektita membro de la Estraro estas S-ro Laurynas Skūpas.

La balota Komisiono: Giovanni Daminelli - Pavol Petrík - Armando Zecchin

LA NOVA ESTRARO JAM EKFUNKCIIS KELKAJN HOROJN POST ELEKTO

La nov-elektitaj estraranoj kunsidis jam en Rimini (kun la nura malĉeesto de De Salvo kaj Skupas). Post profunda danko al la antaŭaj estraranoj, kiuj ne estas en la nova Estraro, estis farita la divido de la internaj taskoj laŭ indikoj de la prezidanto, kun kiu plene konsentis la estraranoj.

Spirita Asistanto: p. Duilio Magnani - **Vicprezidanto:** p. Lajos Kóbor - **Vicprezidantino, kunlaboro kun EK:** Marija Belošević - **Sekretario, redaktoro de EK:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estrarano por la rilatoj kun la ekleziaj instancoj kaj por revizio de la IKUE-statuto:** Serio Boschin - **Estrarano por enlanda agado:** Bogusław Sobol - **Estrarano por la kongresoj:** Laurynas Skūpas

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informo gazeto pri la esperanto-mondo, estas de 1920 je la servo de la nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Abontarifo 45 svissaj frankoj. Mendu prov-ekzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

La Itala Radio elsendas en esperanto ĉiun sabaton je horo 22a laŭ la mezeŭropa tempo, laŭ jenaj frekvencoj: **6040 kaj 9710 KHz** satelite: Eutelsat Hot Bird 1 (13° E subp. 7.56 de RAI2, 11.446 MHz) Vi povas ricevi senpage bultenon. Skribu al: **RAI INTERNATIONAL, Esperanto C.P. 320, I-00187 ROMA, Italio** <http://www.raiinternational.rai.it/radio/multilingue/presentazioni/esperanto.shtml>

Mesaĝo de la nova prezidanto de IKUE

Estimataj gefratoj en Jesuo Kristo kaj Virgulino Maria, tre karaj membroj de IKUE! Alparolas vin Miloslav Šváček - la nova prezidanto de IKUE por kvarjara balotperiodo.

Pacon kaj bonon al vi ĉiuj!


Tre mi dankas al ĉiuj, kiuj metis esperon je mi kaj donis la voĉon por mia elekto je prezidanta posteno. Ankaŭ mi tre dankas al tiuj, kiuj donis la voĉon al ceteraj du kandidatoj por la prezidanta funkcio. La dankon meritas do ĉiuj sufiĉe multnombraj voĉdonintoj, kiuj per sia voĉdono pruvis, ke IKUE ne estas por ili indiferenta afero. Tio estas bona kaj donanta esperon por estonteco de nia kara unuiĝo.

Tre karaj, sincere mi povas konfesi al vi, ke mi ne avidis kaj speciale ne aspiris pri akiro de la prezidanta posteno. Jam antaŭ du jaroj estis proponite al mi, ke mi serioze pripensu mian kandidatigon por prezidanta funkcio por venonta balotperiodo. Mi tre bone konsciiĝas, ke transpreni la prezidantan funkcion post meritplenaj funkciperiodoj de Pastro Duilio Magnani kaj D-ro Antonio De Salvo, dum kiuj estis atingitaj gravaj celoj, inter ili la eklezia agnosko de IKUE, agnosko de Esperanto kiel liturgia lingvo kaj oficiala eldono de Meslibro kaj Legafaro, ne estas facila tasko. Sed mi esperas, ke helpe de la IKUE-Estraro, helpe de vi ĉiuj kaj precipe helpe de la Sankta Spirito mi sukcesos esti utila prezidanto de IKUE, malgraŭ tio, ke miaj personaj kapabloj estas sufiĉe limigitaj.

Mi esperantistiĝis en la jaro 1956 kaj ekde la jaro 1958 mi estas membro de IKUE. Eĉ dum tre malfacila periodo por aktivadoj de la katolikaj esperantistoj en nia lando dum komunista jugo kaj speciale por mi, kiam mi estis pro tiuj aktivadoj persekutita, miaj ligoj kun IKUE kaj la katolikaj esperantistoj en diversaj landoj restis ne interrompitaj. Tial mi persone interkonatiĝis kun ses eksprezidantoj de IKUE: P. Alfons Beckers, Jacques Tuinder, P. Ferdinando Longoni, P. Czesław Biedulski, P. Duilio Magnani kaj D-ro Antonio De Salvo. Retrorigardante mian ĝisnunan esperantistan vivperiodon, mi povas konstati, ke mia vokiĝo al esperantisteco estis direktita de Providenco, por ke mi plenumu mian E-mision laŭ volo de Dio ĝis la nuna prezidanta posteniĝo. Dum ĉiutagaj renkontiĝoj kun Jesuo Kristo en Eŭkaristio mi metis la aferon de mia kandidatigo kaj eventuala elekto de IKUE-prezidanto en lian la Plejsanktan Koron kaj en la Plejpuran Koron de lia kaj nia Patrino, la Virgulino Maria, petante de la Sankta Spirito helpon en mia fina decidiĝo. La finan rezulton de la balotoj mi do akceptis kiel plenumon de la volo de Dio kaj kiel plenumon de via volo, karaj gefratoj. Mi do strebos, ke nia kara IKUE plu daŭrigu sian iradon antaŭen en spuroj signitaj de ĝiaj lastaj prezidantoj. Ĝi forte staru ankrita sur la fundamentoj de la Sankta Katolika Eklezio, kiun mi ege amas kaj sur ĝia Instruofico. La beno de la Papo, kiun mi persone dufoje de li ricevis, kaj la benoj de kelkaj al nia movado favorantaj Episkopoj, estu por mi fortigo kaj kuraĝigo dum la tuta mia funkciperiodo.

Ekde la jaro 1968, kiam okazis la Unua Ekumena E-Kongreso en Limburgo en Germanio, kiun mi ankaŭ partoprenis, bone evoluiĝas ekumenaj rilatoj kaj kunlaboraj kontaktoj inter IKUE kaj KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia). Atestas pri tio ne nur jam okazintaj dek ses komunaj kongresoj, sed ankaŭ fruktodona

laborado de la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI. Tial mi esperas, ke tiu fruktodona ekumena kunlaborado plu evoluigos sen eksceso, kiuj povus damaĝi al ĝi. Ni plu kune kongresadu, kune preĝadu por la unuigo de la kristanoj, por forigo de la malfeliĉa dividiĝo, kiu estas skandalo, malbone reprezentanta kristanojn en la mondo.



Venontjare okazos apartaj kongresoj de IKUE kaj KELI. La 54a Kongreso de KELI okazos en Ĉehio, en Bystrice, situanta sub Sankta Hostýn - surmonta pilgrimloko de la Virgulino Maria - La Venka Protektantino de Moravio, kiun konas partoprenintoj de la 48a kaj la 55a Kongresoj de IKUE, okazintaj en Ĉehio. Mi tre dankas al reprezentantoj de KELI, por ilia afabla invito de mi esti gasto de ilia kongreso. Kun ĝojo mi akceptis la inviton por la vizito de ilia kongreso, kiu estas por mi facile vizitebla, ĉar la kongresloko troviĝas nur tridek kilometrojn de mia loĝloko. Mi do jam nun antaŭĝojas revidi miajn karajn gefratojn de KELI.


Post bele travivita nunjara 16a EEK en Rimini, la rigardo de IKUE-anoj sin turnas al Litovio, kie okazos venontjare la 57a Kongreso de IKUE. Mi estas konvinkita, ke en Litovio okazos tre bela kongreso, promesanta profundajn travivaĵojn. Tial mi instigas vin, karaj IKUE-anoj: ne hezitu kaj aligu vin baldaŭ al partopreno de tiu kongreso. Por via dispono jam ekzistas kongresaj informiloj kaj aliĝiloj. Facile vi povas ilin ankaŭ akiri pere de TTT-paĝoj (<http://www.ikue.org>). Memoru, ke vi tre faciligos la organizajn laborojn de LKK, se vi longe ne prokrastos forsendi vian kongresan aliĝilon.

Tre karaj Gefratoj, konklude de tiu ĉi mia mesaĝo mi esprimas koregajn dankojn al organizintoj de la nunjara 16a Ekumena E-Kongreso en Rimini, precipe al karegaj patroj Duilio Magnani kaj Bernhard Eichkorn, sur kies ŝultroj kuŝis la plej grava parto de la organizaj laboroj. Mi tre bedaŭras, ke la malsano malebligis partoprenon de nia karega KELI-Frato Adolf Burkhardt, kun kiu mi persone interkonatiĝis jam antaŭ 35 jaroj. Tre kore mi ankaŭ dankas al karega frato Giovanni Conti, kiu praktike pruvis sian helpopretecon en la situacio, en kiu la ĉeha kongresanino bezonis sanitaran helpon. Koran dankon tiurilate meritas ankaŭ fratino D-rino Ilona Biksádi.

Dezirante al vi ĉiuj, karaj Gefratoj, Dian benon, ŝirmon de la Virgulino Maria kaj propeton de la ĉiela Patrono de la katolikaj esperantistoj la Sankta Pio la 10a, kies 100-jara jubileo de lia papiĝo oni solenis aŭguste, tre kore vin salutas, via frato kaj prezidanto:

MILOSLAV ŠVÁČEK

Estraranoj de IKUE 2003-2007 - Biografioj



**HONORA PREZIDANTO,
SPIRITA ASISTANTO
PASTRO DUILIO MAGNANI**

Pastro Magnani naskiĝis en Misano Adriatico, 10 km sude de Rimini (Italio), la 11an de junio 1928. Filo de malriĉaj gekamparanoj, li deziris studi, kaj tiucele li eĉ almozpetis. Dum la dua mondmilito, li vizitis la mezgradajn lernejojn en Trento, kaj poste la gimnazion en Rimini. Li studis teologion ĉe la regiona Papa Seminario en Bolonjo, kaj pastrigiĝis la 28an de junio 1953 en Rimini (unua

Meso, la postan tagon). Post tri-jara helpopastrado, li iĝis paroĥestro en kampara vilaĝeto ĉe Rimini, kaj, samtempe, dioceza Asistanto de la Virina Junularo de Katolika Agado. Ekde 1964 ĝis 2003 li estis la paroĥestro de paroĥo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo en San Giuliano Mare, Rimini, kiun li plibeligis ne nur el paŝtista, sed ankaŭ arta vidpunktoj per la famaj esperantlingvaj mozaikoj. Ĉi-jare, okaze de sia 75-jariĝo, li prezentis laŭ la preskriboj de la Kanona Juro siajn demisiojn al la Episkopo. Per dekreto la Episkopo unuigis lian iaman paroĥon kun alia ekzistanta en la ĉirkaŭaĵoj kaj pastro Magnani devos forlasi la paroĥan domon en kiu li loĝis dum preskaŭ 40 jaroj kaj kiu fariĝis konata adreso ĉe la tutmonda esperantistaro ("Viale Carlo Zavagli 73"). Dum multaj jaroj li estis "spirita" filo de Pio el Pietrelcina, gvidante multajn pilgrimojn al San Giovanni Rotondo kaj havante personajn kontaktojn kun la estonta Sanktulo. En 1969 Pastro Magnani eltenis la unuagradan ekzamenon de Esperanto. Lasinte la spiritan gvidadon de la dioceza Katolikaj Blinduloj, li dediĉis sian tutan liberan tempon al la E-movado. En 1976 li estis elektita ĝenerala sekretario de la itala sekcio de IKUE. En 1979 li iĝis Prezidanto de IKUE, kaj dum la jaroj li estis reelektita, ĝis 1995, kiam li rezignis je la prezidanteco, obeante la indikojn de sia Episkopo. La ĝenerala kunveno de IKUE en Olomouc elektis lin honora Prezidanto. La jaroj de lia prezidanteco estis tiuj dum kiuj, dank' al lia senlaca, insista agado, IKUE havis la plej gravajn atingojn: oficiala agnosko de IKUE kiel privata asocio de fideluloj ĉe la Sankta Seĝo; aprobo de la roma Meslibro kaj Legajaro por dimanĉoj kaj festotagoj (kaj ĝia eldono); aĉeto de roma sidejo; E-lingvaj salutoj de la Papo je Kristnasko kaj Pasko, kaj multo pli.

PREZIDANTO - MILOSLAV ŠVÁČEK

Naskita la 2an de februaro 1941 (dimanĉe kaj festotago de la Prezento de Jesuo) en terkulturista familio kiel kvara el kvin infanoj en vilaĝo Střítež (Ĉeĥio). Profesie li estas konstruteknikisto, nuntempe jam ĝuanta belan tempon de emerito. Estante 16-jaraĝa li trovis en tiutempe jam de komunistoj likvidita gazeto "Gardanĝelo" rubrikon de Esperanto. Unu semajnon post tio la Providenco entrajne lin renkontigis kun instruisto de Esperanto. Ekde tiu tempo li fariĝis aktiva esperantisto, partopreninta en ĉiuj ŝtupoj de E-kleriĝo. En 1968 li partoprenis la unuan Ekumenan E-Kongreson en Limburgo, kie li ekligis personajn kontaktojn kun tiamaj IKUE kaj KELI-



estranaroj. En 1969 li fariĝis junulargvidanto kadre de la fondita IKUE-Sekcio de Ĉeĥa E-Asocio, kaj samjare li jam estis ĉefaranĝanto de la unua IKUE-Tendaro en Herbortice. Dum la 9a IKUE-Tendaro en 1977 ĝin invadis kaj perforte likvidis ŝtata polico. En 1979 li estis kondamnita pro permeso de mescelebroj, religienhavaj kantado kaj diskutado kaj kruco farita el arbobranĉoj. Spite de tio li neniam interrompis rilaton kun Esperanto kaj la katolika E-movado. Post la falo de komunismo li refondigis en 1990 la Ĉehan IKUE-Sekcion, kies prezidanto li estas ĝis nun. Ekde 1991 li estas ĉefaranĝanto de la IKUE-Tendaro en Sebranice; krome li aranĝis la 48an kaj 55an IKUE-Kongresojn en Ĉeĥio. Li estas redaktoro de gazeto Dio Benu. Ĉu li sukcesos esti ankaŭ bona prezidanto de IKUE? Kun Dia beno kaj homa helpo li pri tio strebos.



VICPREZIDANTO PASTRO LAJOS KÓBOR

Naskita la 4an de septembro 1937 en vilaĝo Csepreg (Hungario) li estas esperantisto ekde 1960. Li parohestras en la hungara vilaĝo Pereszteg. Landa reprezentanto en Hungario ekde 1979 kaj unua vicprezidanto de IKUE ekde la fino de 1983. Li estas ankaŭ prezidanto de la Ekumena Komisiono IKUE-KELI. Li kunorganizis la ekumenajn Kongresojn en Velence kaj en Szombathely.

VICPREZIDANTINO MARIJA BELOŠEVIĆ

Marija, la unua vicprezidantino de IKUE depost pluraj jardekoj, naskiĝis la



18an de julio 1965 en Zagrebo (Kroatio) kaj esperantiĝis en la bazlernejo. Ĉe la Pedagogia akademio en Ljubljana (Slovenio) ŝi studis E-fakon. De 23 jarojn ŝi gvidas E-kursojn kaj organizis kaj kunorganizis plurajn eventojn, i.a. la 15an Ekumenan E-Kongreson en Zagrebo 2001. Ŝi estas krome TEJO-komitatano C, A-komitatano de UEA, sekretario de ILEI, B-komitatano de UEA (2001-2004), membrino de la Kroata asocio de la katolikaj ĵurnalistoj, kunlaborantino de kelkaj naciaj kaj esperantaj informiloj (gazetoj, radioj). Kiel estraranino ŝi deziras okupiĝi pri rilatoj kun

E-asocioj, grupoj, ĉefe alikonfesiaj.

SEKRETARIO CARLO SARANDREA

Naskita en Romo la 3an de septembro 1962, kiam li estis 16-jaraĝa legis la bildstrian gazeton "Museto" (Mickey Mouse) en kiu aperis artikolo pri Esperanto. Post kontakto de la indikita adreso por ricevi informojn (por la historio: telefonnumero de la nuna UEA-prezidanto Corsetti) li komencis viziti la katolikan E-grupon de Romo, gvidatan tiam de pastro Giacinto Jacobitti. Memlernanto, Carlo estis tuj aplikita al movadaj taskoj, kaj fariĝis dum la paso de la tempo estrarano de la roma katolika E-grupo, prezidanto de la itala IKUE-sekcio, kunredaktoro de la itala



E-revuo, konsiliano de Itala E-Federacio, parolisto kaj poste redaktoro de la E-elsendoj ĉe Radio Vatikana, redaktoro de Espero Katolika, sekretario de IKUE, aldone al multaj portempaj taskoj kaj oficoj. Lia karaktero estas ĝoja kaj ĉiam ŝercema: sufiĉas pensi, ke la plej ofta demando kiun oni faras al lia edzino, Antonella, estas: "Sed... ĉu li kondutas ĉiam tiel?"

KASISTO, DIREKTORO DE LA C.O.

ANTONIO DE SALVO

Li naskiĝis en Romo la okan de junio 1942, en malriĉa laborista familio migrinta el Sicilio. Ekde infanaĝo li lernis ne cedi fronte al malfacilaĵoj kaj maljustaĵoj, laŭ la ekzemplo de sia patro, presisto, kiu dum la nazia okupado de Romo (1943-1944) kaŝe presadis ribelajn flugfoliojn kaj gazetojn. Jam tre juna li eklaboris, farante plej diversajn kaj laŭokazajn agadojn (interalie, jam 11-jara li donis privatajn lecionojn al siaj lernejaj kamaradoj), por povi daŭrigi la studojn, en epoko kiam en Italio estis devigaj nur la kvin jaroj de la baza lernejo, kaj nur riĉuloj vizitis pli suprajn lernejojn. Por atingi pli rapide la finon de la studoj, li saltis la kvinan klason de la baza lernejo, eltenante senpere la ekzamenon por allaso al mezgrada lernejo, tiel ke li diplomigis (ĉe Klasika Liceo) nur 18-jara, sed aliflanke li ne posedas la ateston pri kompletigo de baza lernejo! Ĉar li ne havis monon por aĉeti vortarojn, li prunteprenadis ilin de la samklasanoj (hodiaŭ, reage al tiu periodo, li havas kolekton da pli ol 700 diverslingvaj vortaroj!). La 5an de decembro 1956, irinte al kamarado por pruntepreni vortaron, li rimarkis sur la pordo de la apuda loĝejo la ŝildon "Esperanto" de familio Minnaja; scivoleme, li sonorigis, kaj oni donacis al li gramatikon. Memlerninte Esperanton, en aŭgusto 1958 li partoprenis sian unuan kongreson (li vojaĝis tute sola al Palermo, en epoko kiam la plenaĝo estis atingata je 21 jaroj); li prezentiĝis por la duagrada ekzameno, sed li parolis tiel flue, ke oni aljuĝis al li la triagradan. Li baldaŭ fariĝis unu el la plej striktaj kunlaborantoj de Pastro Giacinto Jacobitti (interalie, li tradukis por la tiama "Nova Civito", kaj kunaranĝis la IKUE-kongreson de 1962 en Rocca di Papa). En julio 1961 li petveturis, kun tornistro surdorse, cele al esperantista laborkampo en la tiama suda Jugoslavio, sed li haltis jam en Kroatio pro serioza strata akcidento (rompiĝis lia dekstra submakzelo). Nemanĝinte solidaĵojn dum du monatoj, li tiomgrade malgrasiĝis, ke li estis rifuzita al soldatservo. En 1962 li eklaboris kiel fervoja oficisto (interalie, li kunlaboris por la enigo de esperantaj klarigoj en la fervojan horarlibron). En 1968 li edziĝis al fervoja koleginino (Adriana); tial ankoraŭ hodiaŭ, kiel edzo de (pensiita) fervojistino, li rajtas vojaĝi per trajno senpage en Italio kaj duonpreze en preskaŭ ĉiuj aliaj landoj de Eŭropo. Pro la samtempa laborado, li doktoriĝis (pri juro) nur en 1969; en tiu sama jaro li estis aprobita kiel profesoro pri juro kaj ekonomiko, kaj ekdeĵoris kiel funkciulo ĉe ministerio pri Publika



Instruado. En 1972 li ekdeĵoris kiel funkciulo ĉe ministerio pri Transportoj. De 1976 li estas juĝisto ĉe la itala Kortumo pri Kontoj, komence en Venecio (en la tempo, kiam tie deĵoris kiel fervoja funkciulo Serio Boschini), kaj poste en Romo, kie de 1977 li kontrolas la agadon kaj revizias la kontojn de la ministerio pri Internaj Aferoj. Li estas ankaŭ sekcia vicprezidanto ĉe la Apelacia Tribunalalo pri Impostoj en Romo. Direktoro de la Centra Oficejo de IKUE kaj respondeca direktoro de ĝia organo “Espero Katolika”, kaj iama Prezidanto de IKUE, li kunlaboris por la traduko kaj revizio de la Meslibro kaj la kontaktoj kun la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto, kaj por la agnosko ĉe la Pontifika Konsilio por Laikoj. De 1971 li redaktas la E-lingvajn programojn de la Itala Radio Internacia (RAI). Li estis vicprezidanto de la Itala Esperanto-Federacio. De dudek jaroj li prizorgas la redaktadon kaj la enkomputiligon de kolosa “Enciklopedia vortaro itala-esperanto”; li ankaŭ kolektis (kaj parte enkomputiligis) dekmilojn da proverboj en itala lingvo kaj en ĝiaj dialektoj, laŭeble kun traduko al Esperanto. Menciindas, ke ĉe lia hejmo troviĝas neniu libro pri juro kaj ekonomiko, sed nur pri lingvoj, religio, arto, historio kaj beletro. Li ŝatas aŭskulti leĝeran kaj popolan muzikon, kaj kolektas tekstojn kaj registraĵojn pri Napolaj kanzonoj.

ESTRARANO POR LA RILATOJ KUN LA EKLEZIAJ INSTANCOJ SERIO BOSCHINI

Li naskiĝis la 3an de februaro 1931 en Carbonera (Treviso, Italio), antaŭlasta el 7 gefiloj (ses viroj kaj unu ino). Kiam li estis apenaŭ 8 jaraĝa lia familio, pro malriĉeco, migris al Libio, sed unu jaron poste, pro la eksplodo de la 2a mondmilito, li kun du fratoj devis reveni al Italio: pro militaj kaŭzoj la naŭ membroj de lia familio estis disigitaj en sep lokojn. En 1951 li povis reĉirkaŭbraki siajn gepatrojn kaj nur en 1957 la aliajn gefratojn, inkluzive la ununuran fratinon, kiu naskis naŭ gefilojn. Dank’ al bonfarado li povis studi, dum unu jaro eĉ piede traŭrante 10 kilometrojn por atingi la lernejon. Pro malsaniĝo li devis interrompi la studojn dum kelkaj jaroj kaj nur post resaniĝo kaj dank’ al manlaboro li povis daŭrigi private la studojn. Li doktoriĝis en 1967. Ekde 1962 ĝis 1990 (kiam propravole li emeritiĝis por sin dediĉi al sia familio kaj Esperanto) li laboris en la italaj fervojoj kiel administra oficisto. Li edziĝis en 1965 kun instruistino Lucia. Li memlernis Esperanton ekde aŭgusto 1968 kaj startigis intensan



de lia familio estis disigitaj en sep lokojn. En 1951 li povis reĉirkaŭbraki siajn gepatrojn kaj nur en 1957 la aliajn gefratojn, inkluzive la ununuran fratinon, kiu naskis naŭ gefilojn. Dank’ al bonfarado li povis studi, dum unu jaro eĉ piede traŭrante 10 kilometrojn por atingi la lernejon. Pro malsaniĝo li devis interrompi la studojn dum kelkaj jaroj kaj nur post resaniĝo kaj dank’ al manlaboro li povis daŭrigi private la studojn. Li doktoriĝis en 1967. Ekde 1962 ĝis 1990 (kiam propravole li emeritiĝis por sin dediĉi al sia familio kaj Esperanto) li laboris en la italaj fervojoj kiel administra oficisto. Li edziĝis en 1965 kun instruistino Lucia. Li memlernis Esperanton ekde aŭgusto 1968 kaj startigis intensan

agadon, unue por la fervojista movado, poste pli kaj pli en tiu katolika. Li fondis aŭ kunfondis E-grupojn (en Venecio, kaj du en Treviso). Li multe kunlaboris en la terminara fervoja komisiono de IFEF kaj preparis la fervojan terminaron Itala-Esperanto kaj Esperanto-Itala. De 1998 ĝis 2003 li estis prezidanto de la itala IKUE-sekcio.

ESTRARANO POR ENLANDA AGADO BOGUSŁAW SOBOL

Li naskiĝis el familio de instruistoj la 1an de januaro 1935 en vilaĝo Jankowicze, distrikto Stolpce (tiutempe pola teritorio, nun apartenanta al Bjelorusio). Li nun loĝas en Milanówek (Pollando). Post kompletigo de sia pedagogia klereco li laboris kiel instruisto ĝis la deviga soldatservo, dum kiu li akiris radiotelegrafistajn konojn. Post soldatservo li komencis profesian laboron en la flughaveno de Varsovio, laboro kiu daŭris ĝis emeritiĝo. Jam dum juneco li interesiĝis pri literaturo, fremdaj lingvoj kaj sporto. Iufoje ekinteresis lin lernolibro de Esperanto kaj memlernis la lingvon, kaj iom poste pere de korespondaj kursoj. Dank'



al Esperanto eblis por li viziti plurajn landojn, konatiĝi kun diversaj kulturoj, homoj kaj kutimoj. Li verkas poemojn, kiuj estis publikigitaj en pluraj antologioj. Li revas pri unuiĝo de katolikaj esperantistoj sub la flugiloj de IKUE. Lia ĉefa - kaj tre sentata - celo kiel estrarano estas la restarigo de unueco kaj forto en la pola katolika movado.



ESTRARANO POR LA KONGRESOJ

LAURYNAS SKŪPAS

Doktoro pri humanaj sciencoj, docento, li naskiĝis la 10an de aŭgusto 1937 en u. Kupiskis, Litovio. En 1959 "*cum laude*" finis superajn pedagogiajn studojn (franca lingvo kaj literaturo). 1959 - 1961 instruisto de franca lingvo kaj Esperanto en mezlernejo de u. Seduva. 1961 - 1964 superaj lingvistikaj studoj pri doktoriĝo en Moskva Instituto pri fremdaj lingvoj. 1964 -2002 - profesoro de fonetiko de franca

lingvo, provenca lingvo, Esperanto, interlingvistiko kaj esperantologio en Universitato de Vilnius, tradukisto, interpretisto, aŭtoro de multaj sciencaj artikoloj. Poligloto - flue parolanta litove, ruse, france, Esperanto kaj malpli flue pole, hispane germane, provence, turke. Li okupiĝas pri katolika edukado de studentoj, verkas aŭ tradukas por litova katolika gazetararo. Ek de 2003 li emeritiĝis, sed li daŭre laboras laŭ aŭtoro kontrakto en Universitato de Vilnius. Li esperantiĝis en 1959. En 1987 li verkis kaj eldonis litovlingvan libron "Esperanto - lingvo internacia". 1979 - 1988: prezidanto de Litova E-Filio de ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj). 1988 - 1993: prezidanto de restarigita Litova E-A. Dum 1989 - redaktoro kaj parolisto de esperantaj radioelsendoj en Litova Radio. Ĉi-jare li aperigos sian lernolibron de Esperanto por litovoj. Ek de 1996 li agas en IKUE, peranto de "Espero Katolika" por Litovio. Li estas prezidanto de Organiza komitato de la 57a kongreso de IKUE 2004.

DANKON!

Por la realigo de ĉi tiu jubilea numero de EK mi ŝuldas egan dankon al multaj personoj. Por verki la historion de EK mi uzis - kiel bazon - mian tekston de 1983, sed mi povis ĝin kompletigi kaj korekti nur dank' al la helpo tutunue de **Jean Amoureux**, sed ankaŭ de **Simon P. Smits**, **p. Manuel Casanoves**, **Antonio De Salvo**, **Raymond Boré** (ĉiuj "turmentataj" de miaj telefonvokoj) kaj de **Flory Witdoeckt** (al ŝi mi ne telefonis, sed mi sendis multajn retroŝtajn mesaĝojn). Mi ŝuldas dankon ankaŭ al **Nico Hoen**: el lia "Historio de IKUE"

ESPERO KATOLIKA

Mi esperas, ke alvenos tago,
Kiam ektriumfos idealoj
Kaj pereos sur la ter' bataloj
Forigitaj per kristana ago.

Mi esperas, iam la popoloj
Sin rekonos kiel veraj fratoj,
Kaj, ĉesinte servi al idoloj,
Sekvos Kriston siaj en rilatoj.

Mi esperas, en la Kristanaro
Malaperos polemikoj flamaj,
Kaj estiĝos unu en ŝafaro
Ĉefpaŝtisto unu de l' Di-amaj.

Mi esperas, ke la regnoj teraj
Kunfandiĝos en la Regnon Dian,
Kaj la homoj de mizer' liberaj
Faros unu rondon familian.

Trudas dubon pri tio la saĝo,
Sed la sento kredi ĝin preferas;
Do kun supren levita vizaĝo
Mi triumfon de la bon' esperas.

P. A. DOMBROVSKI (1928)

mi ĉerpis abunde (kaj mi ĝojas, ke mi povis paroli kun li per telefono). Kunhelpis ankaŭ neesperantistoj, kiel la **paroĥestro de Kilmyshall** (Irlando). Dankon ankaŭ al mia edzino Antonella, kiu eltenis mian konduton, kiam pro trovita informo mi abrupte ekkriis kontenta aŭ kiam por kompletigi ĉapitron, mi restis algluita al komputilo lasante, ke la vespermanĝo frostiĝu. Kaj tio estas nenio: por miaj esploroj mi vagadis ankaŭ tra tombejo, kun la celo trovi la precizan mortodaton de nia pioniro p. Giambene. Mi konscias, ke la historiaj tekstoj ĉi tie estas nekompletaj kaj kelkloke eraraj: ĝi estas la natura postsekvo de la manko de dokumentoj, kiun suferas IKUE. Sed mi ankaŭ certas, ke mi sukcesis aldoni ion novan al la faktoj jam konataj.

Ĉi tiu jubilea numero kompletigas la jarkolekton 2003 de EK. Ĝis relego venontjare! Dio benu!

Carlo Sarandrea

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe informante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La baza jara kotizo de membroabonanto estas 25 €, sed ĝi varias laŭ la lando: petu informojn rekte de la landaj reprezentantoj.

Membroj de IKUE rajtas aboni tra IKUE la KELI-revuon "Dia Regno" kontraŭ 10,00 €.

Membroj de KELI rajtas aboni EK kontraŭ 12,50 €, pagendaj al la KELI-kasisto.

Albanio	Eliza Mjeda, L. "Ndoc Maro", Rr. kong. u Lushujes, N°32 Shkoder
Argentino	Daniel A. Cotarelo García, Rivera Indarte 232 P.1 A, RA-1406 Buenos Aires
Aŭstrio	Hans M. Maitzen, Endemanngasse 6-18/1/24, A-1238 Wien <i>EK-peranto:</i> Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg
Belgio	Walter van den Kieboom, Witte-Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende
Brazilo	<i>EK-peranto:</i> Brazila E-Ligo, C.P. 03625, Brasília (DF) 70084-970
Britio	P. Charles C.Dornan, St Stephen's, Paddock St. Coatbridge, ML5 4PG, Scotland
Ĉeĥa Resp.	Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice
Danlando	Eugeniusz Rybarczyk, Bispeparken 29.1th, DK-2400 Copenhagen NV
Estonio	Vjaĉeslav Hromov, p.k. 623, EE-12602 Tallinn
Francio	Roger Pons, 3 rue du 8 Mai 1945, F-87510 Nieul - pêk Limoges 3 644 92 N
Germanio	Hans Moser, Gasteiner Str. 31, D-10717 Berlin
Hispanio	P. Manuel Casanoves, Str. A.M. Claret 8, E-08500 Vic
Hungario	P. Lajos Kóbor, H-9484 Pereszteg
Italio	Paola Ambrosetto, Via Emo 9/C, I-30173 Mestre VE
Japanio	Hatiroo Matubara, Namimatu-tyo 4/5, 596 Kisiwada-si, Oosaka-hu
Kanado	Janusz Sulżycki, 88 Kinrade Ave., Hamilton ON, L8L 6L6
Kongo	Jean Bosco Malanda Lutete, B.P 761, Kinshasa XI
Kroatio	Marija Belošević, Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb
Kubo	Alberto José García Fumero, Calle 26 No 3313 E/33 y 35 Playa CP-11300 Ciudad Habana
Litovio	P.Lionginas Vaičiulionis, str. Milikoniu 18, LT-3040 Kaunas <i>EK-peranto:</i> Laurynas Skupas, str. A.Stulginskio 4-13, LT-2001 Vilnius
Madagaskaro	Roger Randrianekena, Lot.9.180 Antsahatanteraka, 503, Ambatondrazaka
Meksikio	P. José M. Claramunt, apartado 318, MEX-68000 Oaxaca, Oax
Nederlando	S.P.Smits, Lange Noordweg 3, NL-4453 RC 's-Heerenhoek
Nov-Zelando	Mike Leon, 171 Oxford Terrace, Lower Hutt
Pollando	Janina Wereszka, ul.Kłodnicka 43/27, PL-54-217 Wrocław
Portugallio	Portugala E-Asocio, rua Dr J.Couto 6 r/c A, P-1500 Lisboa
Rumanio	Ignatiu Orha, str. Odobescu Nr. 2, Ap. 34, R-4800 Baia Mare
Ruslando	Daniel Vorontsov, Puškinkaia 272 - 82, 426008 Ijevsk
Slovakio	Magda Šaturová, Javorinská 33, SK-811 03 Bratislava
Tajlando	P. Marcel Perray, G.P.O. Box 1846, Bangkok 10501
Togolando	Jean-Louis Basile Agbolo, BP 12316 Lomé, Togo
Ukrajnio	P. Serhij Prudko, a.k. 250, 07300 Vyšhorod
Usono	P. Mubarak Anwar Amar, Our Lady of Guadalupe Seminary P.O.Box 147, Denton, NE 68339-0147